



LA OLDULO

KAJ LA ANIMVORA VORTUMBRA

CARLOS ROCHA



LA OLDULO KAJ LA ANIMVORA
VORTUMBRA

Traduko de
Said Pontes de Albuquerque

CARLOS ROCHA



Selo Multiversos - 2020

"Alveni al la fino de la vivo povas esti nur la komenco de nekredebla Vojaĝo".

Proverbo Hiarăuă

1 — La maljuna akriĝisto de tranĉiloj

La oldulo vekigis. Tre frue en la mateno, la Suno ankoraŭ ne estis aperinta. De antaŭ kelkaj jaroj li vivis en soleco kaj provis realĝustigi sin al nova vivrutino, ekde kiam lia edzino, Dalje'ra, mortis.

Li jam ne multe pensis pri ŝi, sed mankis al li vekigi kaj flarsenti la bonodoron venantan el la kuirejo. Ŝi tro babiladis kaj la triĉambra dometo ŝajnis duoble pli granda post kiam ŝi foriris. Li tamen plej ŝatis la silenton de la antaŭmateno.

Li flanken lasis la litkovrilojn kaj sentis la akran malvarmon ĉe la kruroj. Lia veziko estis peza, li do devis eliri por ĝin malplenigi. Li palpis en la mallumo ĝis la momento kiam li trovis sian fajrilon kaj la oleolampon. Unu, du, tri farjroj kaj jen la flamo lumigis lian suferan vizaĝon. Li havis restaĵon da blankaj glatigitaj haroj kaj barbon, kiu estis pli abunda ol tiuj.

Lia maldekstra piedo tuŝis la glacian plankon, sed la plej malagrabra sensacio estis tiu veninta el lekado ĉe lia kruro. Farelo, lia maljuna hundo, jam malofte eliradis el la hejmo. Duonblinda, ĝi ŝatis dormi sub la lito de la oldulo.

– Ha vi, malpurulo... – la oldulo grumblis kaj karesis la mallongharan haŭton de la besto ĉe ties malvarma muzelo. Farelo respondis per duonjelpo kaj ree rondkuŝis sur la apuda tapiŝeto.

La oldulo streĉis la krurojn kaj brakojn kiuj grincis, lia teniĝo estis iom kurba, kaj tiam li aŭdis tiun krudan voĉon de la serĝento Sompiro en sia menso.

La sinteno, soldato! ŝultroj malantaŭen!

Li reĝustigis la ŝultrojn kaj ekiris al la kuirejo. La sola novaĵo ĉe li estis la dentoj. Li elspezis ĉiujn siajn ŝparitaĵojn nur por denove senti la sensacion mordi iun frukton kaj maĉi viandon. Li ne plu eltenis nur manĝi supon kaj malsekiĝintan panon.

Li movetis la langon sur la dentoj, tre blankaj, faritaj el osto de drako kaj kiuj estis nekonformaj al lia vizaĝo, sed tre bone funkciis.

Ĉe anguleto la fajro sur la metala kameno jam estingiĝis. Pli supre, la rustiĝinta ŝildo kun preskaŭ neperceptebla blazono de la ruĝa *gatigro* estis memoraĵo de lia junaĝo, kiam li servis en armeo kaj luktis por defendi la regnon.

Per la postlasaĵoj de la milito, li havis la bonŝancon aĉeti malgrandan domon interne de la muroj de la urbo. Ĝi havis korton kie li ankaŭ bredis Han'jakuojn, birdoj kiuj bone grasiĝis kaj havis tre molan karnon kovrantan la ostojn.

Ili ĉiuj estis dormantaj sur siaj grimpiloj. La fortaodoro de la birdaj sterkoj miksitaj kun pajloj kaj kadukaj grajnoj estis pli bona ol laodoro, kiun li sentis tra la stratoj de la urbo. En la alto, la kovrita ĉielo ne montris stelojn aŭ lunojn.

La altaj muroj plenaj de vitropecoj kaj malgrandaj kaptiloj preskaŭ ĉiam forturnigis ŝtelistojn de Han'jakuoj. Farelo estia maljuna kaj laca tiel kiel li mem. Antaŭe li sin donis al la laboro forigi tiujn malbenitojn. Antaŭ kelkaj monatoj li havis la plezuron trafi unu el ili per sago en la kruron. La malnova arbalesto malrapidis je ŝarĝado, sed ankoraŭ plenumis sian funkcion.

Nun, kio ne bone plenumis sian funkcion, tio estis la malbenita veziko. Li malfermis la pordeton de la banĉambro sur la malantaŭo de la korto kaj atendis. La doloro provi urini, klopodo kiu igis lian korpon interne bruli kun jena rezulto: unu gutu. Alia gutu. Ia malpreciza kaj oscilanta ĵeto. Li forte klopodis por elĵeti. Kaj fine ĉio elvenis, kun granda malpeziĝo kaj enspiro. La plezuroj de la maljunaĝo estis aliaj.

Li sidiĝis sur trunko-stumpo en la korto kaj ekbruligis sian pipon per la flamo de la lampo. Li ĝuis tiun fortodoran herbon, revekante kelkajn rememorojn pri sia junuleco.

Ĝuste en tiaj horoj, trankvilaj, revenadis la eĥoj de lia pasinteco. La krioj el tiu terura batalo. Kiam mortis ĉiuj membroj de lia taĉmento.

– Atentu, Vedd! Malleviĝu! – lia amiko, Jorg'ek, savis lian vivon, falpuŝante lin en la koton. Kiam li rigardis supren, li vidis Jorg'ekon envolvitan en tiu infera verda fajro. Post sekundoj ties vizaĝo fandiĝis kaj li ekvidis ĝian formon aliĝi en nigran kranion tuj antaŭ ol ties kruroj perdis la forton kaj tiu renversiĝis surgrunden.

En malespero, li treniĝis for de la fajro kaj lasis sian lancon mergita en la koto. Tiu terura blekego vokis lian atenton kaj li povis vidi tiun kreitaĵon el la abismoj. La monstron elvokis unu el tiuj *kuneaj* sorĉistoj. La ostofarita demono portis surmane nigran falĉilon kun lumanta klingo. La flankoj de lia buŝo plena je dentegoj ankoraŭ elspiris restantajn postsignojn de la verdaj flamoj, kiujn tiu kapablis vomi. La osto-demono rekte rigardis liajn okulojn kaj tio hirtigis de teruro ĉiujn liajn harojn.

Revene al la korto, la oldulo premis la brakon kaj balancis la kapon, provante liberigi sin el tio. Liaj brakaj haroj denove estis hirtaj, post kiam li elvokis tiun memoron.

Almenaŭ ĉe la fino ni venkis.

Kelka tempo pasis dum li penis forigi la sonojn kaj bildojn de la milito el sia menso. Iom da heleco el la maten-krepusko tinkturis la korton per grizaj tonoj kaj elmontriĝis nuancitaj koloroj de la greso kaj de lia *linoĵuso*-arbo, kun ĝiaj vivoplenaj longformaj fruktoj.

Li penis stariĝi, plendante kaj kun iom grincanta dorso. Li estis sufiĉe sana konsidere al iu aĝanta kiel li. Li neniam pensis, ke li vivus tiomlonge. Li vidis kvar reĝojn surtroniĝi kaj detroniĝi. Du mortintaj sur batalkampo, unu venenita de la edzino, unu infektita de la blanka tusado... Ŝajnis ke reĝoj propradire ne havis la rajton morti en maljuneco.

Ĉe la mateniĝo ekestis la sonoj de la urbo. Li nutris siajn Han'ĵakuojn, kiuj ĉiam vekiĝis hirtiĝintaj kaj bruemaj. La bluaj mallumaj plumoj donis al ili nigrajn konturojn, escepte kiam tiujn prilumis la suno, kaj tiam ili montris tre belan kaj metalecan brilon. Li kolektis blue farbitan ovon por la matenmanĝo, kaj metis brullignon en la fornon. La birdoj estis pligrandaj ol kokinoj, kaj tio donis utilan grandon al la ovoj. Kune kun la ovo li fritis pecegon da lardo, kiun li tenis en ladskatolo por graso. Farelo kune alvenis lamanta, kun petema rigardo, lekante siajn lipegojn kaj nazegon. La oldulo apartigis parton de la lardo kaj ĝin pinĉe tenis per la ŝrumpitaj fingroj.

– Jen ĉi tie, sentaŭgulo...

La hundo englutis la lardon per unu fojo kaj malrapide svingis sian densharan kaj lacan voston.

La oldulo sidiĝis rimarkante per akvohavaj okuloj la malplenan lokon kie lia edzino kutimis sidiĝi. Li skrapis la ŝimon de la nigra malmola pano. Por favori plenan engluton, teo de bluflo, tre varma. Bona matenmanĝo. Des pli bona, ĉar li povas maĉi.

Li metis sian ekipaĵaron en la sakon traŝultran, liajn bonutilajn akrigajn ŝtonojn kaj du metalajn akrigilojn. Li strebis por kaŭriĝi kaj dorloti Farelon sub ĝia kolo. La hundo lekis lian mentonon kaj mallaŭte bojetis.

– Pli malfrue mi revenos portante bonan lunĉon al vi! Iru, iru! Al la korto! Kaj almenaŭ boju por fortimigi tiujn banditetojn, ĉu bone?

Li fermis la pordon kaj iris tra la stratoj frapante sian latunan sonorilon. Li supreniris la deklivajn stratojn por aliri al la alta parto de la urbo. Liaj kruroj kaj piedoj plendis, sed tie oni plibone pagis por lia laboro. Li havis kelkajn klientojn ie kaj ie, kiuj ĉiam alportis la klingojn por ke li ilin reakrigu.

Li sidigis sin sur la nigraj ŝtonaj ŝtupoj kiuj lasis aliron al la palaceto, flanken metis la ilaron sur amelgladitan tolaĵon. Tedriso estis urbo kun kontrastoj... palacetoj en iu kvartalo, kaj dometaĉoj en aliaj, sed ĉu ne tia estis iu ajn urbo?

Ekestis farenda laboro. Tio estis tri hejmaj tranĉiloj kaj unu poŝtranĉileto. Ĉi tiu lasta nur bezonis akrigon, sed la tranĉiloj... Li rigardis ilin per malbonhumora vizaĝo. Ilia stato estis malbonega.

Mi asertas, ke ili uzas norukojn en la kuirejo. Neglektemaj bestuloj!

Li utiligis la pli dikan metalan akrigilon. Ili estis plene dentitaj kaj ankaŭ ne havis tranĉrandon. Li akrigis kaj testis ilin tranĉante ledan restaĵon. La sono de la metala skrap-skrapo estis muziko al liaj oreloj. Nun jes, perfektaj, bonaj kvazaŭ novaj.

La ilaro, kiun li aĉetis de komercisto el Zanzidio, estis multekosta, sed valoris ĉiun oran moneron. Ne estis alia tranĉil-akrigisto tiel lerta kiel li en la tuta urbo, almenaŭ tiel li pensis.

– Dankon, klientino!

La sendenta sinjorino surhavanta bluan kaptukon ridetis al li – ili estas bonegaj, sinjoro Vedd!

– Certe ili estas – li fiere kontraŭmetis kaj faris komplimenton al ŝi. Li erare agis per rideto. La sinjorino rigardis liajn dentojn kaj tordis la lipojn. Ili estis strangaj dentoj!

Li gardis la ilojn en la sakon, la du monerojn en la internan poŝon de la jako kaj iris sian vojon.

Supozeble tiu devus esti nura ordinara tago, sed tiam li aŭdis la kriojn.

2 — Fajro kaj furiozo

Kiam juna, dum vojaĝo de Ĵafo al la ĉefurbo, Vedd vidis unu el tiuj flugantaj estaĵoj. Ĉiuj restis kvietaj kaj surtere kuŝiĝis por eviti voki la atenton de la besto. Ili havis bonŝancon, diris iu komercisto.

Tiumomente, pluraj nigraj drakoj malsupreniris super la ĉefurbo. Akceliĝis la korbatoj de la oldulo.

Kuŝi nun surtere nenion solvos!

Ili kune flugis kaj rapide malaltiĝis, organizitaj kiel bando da birdoj.

Li jam estis aŭdinta malnovajn legendojn pri bandoj da drakoj, sed estas vero, ke li dum tuta sia vivo sciis pri ne pli ol duona dekduo da renkontoj de homoj kun drakoj en Kedpir. En nur unu okazo, drako estigis viktimojn en la fora Lampito, vilaĝo en la ekstrema nordo de la regno.

Skvamoj, dentoj, ungegoj kaj draksango estis valoraĵoj, kaj fojfoje ĉasistoj eliris el la ĉefurbo celante tion. Kelkaj grupoj neniam revenis, aliaj sukcesis reveni kun tiaj trofeoj, unu-dufoje en jardeko.

Lia dua filo, Pevolo, estis unu el tiuj junuloj kiuj neniam revenis. Li eble mortis alfrontante la bestojn, aŭ dum atako de sovaĝaj norukoj, banditoj aŭ de aliaj danĝeraj kreitaĵoj, kiuj loĝas en senhomaj regionoj.

Unu ploranta kaj kuranta infano rememorigis lin pri Pevolo. Li tiel same ĉiam ploris, kriante kaj malakorde spiregante, kiam la pli maljuna frato batis lin.

Homoj kuradis iele trapele, virinoj kaj infanoj ploradis de timo. Gardistoj tenantaj glavojn aŭ pafarkojn kuris responde al la voko de la trumpetoj.

La maljuna Vedd restis tie haltinta, rigardante la malleviĝon de la bestoj super la urbo. La horora blekado de la kreitaĵoj estis akuta kaj iritis la orelojn.

Kiam la unua sputis fajron sur la tegmentojn, la oldulo instinkte kunpremis la cikatron de brulvundo, kiun li havis sur la maldekstra brako. Tiun vundon li suferis en la milito kontraŭ la kuneoj. Ĝi ne estis draka fajro, sed tamen havis magian originon. Tiu malbenita verda fajro. Li rememoris la junan *guld*on kiu savis lian vivon.

La armeo de la kuneoj plej timis la guldojn ol kelkajn vicojn da kavalerioj. Duon-dekduo da tiuj magiistoj, trejnitaj por batali, povus venki batalionon, se forestus sorĉistoj en la malamika trupo por ilin haltigi. La verda fajro ne tiom dolorigis tiumomente. La problemo fariĝis poste...

Vedd ne sukcesis kalkuli, li eĉ tion ne provis, sed pli ol tridek drakoj surŝprucigis fajron sur plurajn lokojn de la urbo. El la tiea supraĵo li vidis grandan incendion forbruligantan la Fiste-Templon. La templo estis grandega, tute konstruita el ligno; post du momentoj ĝi estus nenio alia ol stako da cindroj. Lia domo staris ĉe la strato, ĝuste malantaŭe.

Fiste, protektu nin! Protektu nin!

Tiam la penso pri liaj Hanĵakuoj malliberigitaj en ĉirkaŭbariloj, bruligataj ankoraŭ vivaj, igis la oldulon ekpaŝi. Poste, li pensis pri Farelo, same bruligata. Paŝon post paŝo, dum ĥaoso ekregis la stratojn de la urbo, kaj tuj poste la oldulo estis kuranta. Io, kion li jam de multaj jaroj ne faris.

De supre, li vidis drakon bruligantan viron sur la strato kaj lin poste ekprenantan en la buŝon, dum tiu ankoraŭ estis en flamoj. Post kiam li malsupreniris pli krutan deklivon, li ekvidis sian straton, de tie distancan je du kvartaloj. La domo de la najbaro ardis en flamoj, nigra fumo leviĝis el ĝi. La fumo miksiĝis kun la odoro de bruligita karno. La oldulo tusadis, kovrante la vizaĝon per la kolumo de sia jako.

Li bezonis liberigi Farelon kaj siajn birdojn... Post tio, se li estus bonŝanca, li povus forkuri de tie, same kiel faris multaj personoj. Granda fluo da homoj sekvis direkte al la pordego de la ĝemeloj, sed li iris ĝuste en la kontraŭa direkto.

– Iru for de la antaŭo, freneza maljunulo! – iu kriis ĵetante lin sur la grundon.

Li falis batante la dorson kontraŭ la pavimon kaj gratvundante la manplaton, kiun li uzis por apogi sin per refleksa gesto. La personoj pasis preter li, neniuj havis intereson helpi lin stariĝi. Li ĝemis, sentante ekpuŝon ĉe la dorso kaj sukcesis stariĝi. Li iomete lamis ĝis la strata flanko, kie li sukcesis laŭiri kontraŭ la alfluo, ĝis kiam li sin turnis al la strato de sia domo.

Tiu tuta malordo vekis ĉe li memorojn pri la milito, scenojn de la ĥaoso, sed li ne lasis sin distri per tio. Li decide antaŭeniris ĝis sia domo. Li tre tuis, jam sentis la varmon de la proksimiĝantaj flamoj. Li eniris domen, kaj ĝin vidis kolorita per ruĝo de la lumo de l' fajro kiu konsumis la domon de la najbaro.

– Farelo! Farelo – lia voĉo eliĝis pli raŭka ol kutime. Li forte tuis. La gorgo doloris.

Li iris al la korto kaj malfermis la barilon. Li prenis tukon kaj envolvis la sangantan manon.

– Farelo! Kie vi estas, malpurulo!

Li havis iom da laboro por peli la birdojn for de la birdtenejo, kie ili ordinare restis. Iel klopode li sukcesis ilin elirigi surstraten.

– Farelo! – Lia voĉo apenaŭ eliĝis.

Tiam la tegmenton de lia domo jam ekkonsumis la fajro.

Li prenis la malnovan ŝildon, metis ĝin sur la maldekstran brakon kaj per la dekstra mano kaptis sian arbaleston, ĝin portante per la tenilo. La dominterne ekvarmiĝis kaj estis invadita de la fumo.

La oldulo sukcesis eliri, multe tusante, kaj falis surgenuje sur la trotuaro, eltusante la internaĵojn kaj kun inflamitaj okuloj.

– Farelo... ĝuak haf haf kof – li mallaŭte murmuris.

Nenion li povis klare vidi, sed benita vento blovis la fumon lin envolvantan. Li pli libere spiris kaj sukcesis stariĝi.

Tiam li aŭdis tiun timegigan sonon.

Ĝi estis kvazaŭ la ronronado de giganta kato. Li sin turnis kaj vidis la kreitaĵon sin kunpremanta por ekokupi lian straton. Unu el la piedegoj staris sur la pavimo, la alia sur unu el la domoj. La longa kolo enmetita en la strato kaj tiuj du flavaj okuloj fikse rigardantaj lin.

Ili havis ion komunan inter si, ili montris dentojn de drako unu al alia. La buŝo de la oldulo malfermiĝis de teruro.

Lia korpo glaciigis. Venis lia morthoro.

La drako malfermis sian buŝon, iomete. Ĝia dentaro estis tute nigra ĉe la brilo de la fajra lumo venanta el la fundo de la gorgo.

Tiumomente Vedd aŭdis Farelon, kiu freneze bojis. La maljuna hundo atakis la drakon kun maksimuma feroceco ebla al ĝi. La drako klinis sian kolon kaj buŝkaptis la hundon, ĝin englutante kvazaŭ frandaĵon.

– Farelo! Redonu mian hundon, mizera lacerto!

La oldulo ekpafis sagon kontraŭ la drakon, kaj ĝi pikis la felon protektitan de skvamoj, trafante raran breĉon. La bestaĉo enspiris aeron kaj estigis

strangan ĝemon. Tuj poste la drako malfermis la buŝon kaj Vedd vidis la brilantajn flamojn ŝprucantajn el la fundo de ĝia gorĝo.

Vedd metis la ŝildon antaŭ la vizaĝo, forte premis la cikatron de la brako kaj atendis abomenindan morton.

Merdo! Mi ne volis morti bruligite!

Sed tiam li aŭdis akregan krion. Ĝi ne estis krio de drako, sed de homo, kiu duone kriis kaj duone kantis.

– Jaj'la'raj!

Li aŭskultis la sonon similan al tiu, kiun lia hakileto faris kiam li rompis la korpojn de la Han'ĵakuoj sur trunka stumpo en lia korto.

Li akiris kuraĝon por denove rigardi kaj vidis homegon, fremdulon, kiu tenis militan hakfosilon enigitan en la supran parton de la draka nazego.

De alia flanko, venis kavaliro, el tiuj kun kompleta armaĵo kaj flava mantelo.

Li malsuprenigis pezan ambaŭmane tenatan glavon en la kolon de la besto. La drako respondis svingante la kapon de unu flanko al alia.

La kavaliro estis pelata malantaŭen, penis ekvilibriĝi kaj fine sidfalis surteren.

Siavice la grandulo firme tenis sian hakfosilon kaj pendis flanke de la draka kapego. Almovata ungego ĵetis lin tute makulitan de sango surteren.

Vedd observis la batalon, tremante, konsternite. Li atente rigardis la ŝildon de la kavaliro, provante ĝin identigi, sed li neniam ĝin estis vidinta antaŭe.

Je Sankta Gideso! Tiu kavaliro ne estas unu el la servantoj de la reĝo. Kiuj estas tiuj homoj?

La drako laŭŝajne ne estis serioze vundita kaj eligis furiozan blekon, kiu zumigis la orelon de la oldulo, kiel se li estus sub la granda sonorilo de la templo.

Tiam, tiu eksplodo de blua lumo lin blindigis.

La jam lacigitajn orelojn de la oldulo invadis ia tondra sono, kiu ŝajnis esti falinta sur lian kapon.

Vedd side falis, frotante al si la okulojn. Nur tiam li vidis la longajn botojn el ruĝa ledο altigitajn ĝis la genuoj.

Tuj dupre de ili, lazuran mantelon, ligitan ĉe la maldika talio per dekduo da koloraj bendoj kaj cento da strasoj kaj ornampendaĵoj. Ŝiaj kapflankoj estis razitaj, sed densa tufo da mielkoloraj haroj de supre atingis ĝis la mezo de la dorso.

Li ne bone vidis ŝian vizaĝon, sed ŝia bastono ankoraŭ pulsas kun magia energio, eliganta bluajn fajrerojn, kiuj gutis sur la pavimon kaŭzante mikroeksplodojn, simile al akvofalo gutanta el malsupre sur ŝtonojn.

Sur loko iom antaŭa, la korpo de la drako estis inerta, eliganta maldikan strion da blanka fumo.

La virino helpis la grandulon stariĝi. Li havis du terurajn tranĉvundojn, kiuj ŝiris lian veston, haŭton kaj muskolojn. La sorĉistino ĵetis bluan radion sur la vundon, ĝin bruligante. La viro ellasis blekegon, tamen tuj dankis al ŝi.

– Ni sukcesis detruĝi unu plian – diris la kavaliro kun flava mantelo.

La grandulo diris – Tiuj damnaj drakoj ĉi tie en Tedriso? Tio nur povas esti io rilata al...

– Ne prononcu tiun nomon! – la sorĉistino interrompis lin.

La oldulo spiregis kaj gape daŭris rigardante tiun triopon.

– Hej, Aveto! – diris la kavaliro – vi estas pli kuraĝa ol duono de ĉi tiu urbo, ĉu ne?

– Mi? Ne mi... – Vedd tre ĝeniĝis pro la maniero laŭ kiu lia voĉo ĉiam sonis raŭka kaj malforta.

La kavaliro aliris al la oldulo. Li estis juna, havis vastan kaŝtanan barbon kaj verdajn malicajn okulojn. Li streĉis la okulojn por provi deĉifri la desegnaĵon de la blazono sur la ŝildo de la veterano.

– Prenu ĉi tion! – la kavaliro metis manplenon da or-moneroj sur la manojn de la oldulo. – Pro tio, ke vi helpis nin mortigi unu drakon.

– Sed mi ne...

– Estis bela la pafo kiun vi faris, Aveto. Plejparto de la sagoj eĉ ne sukcesas eniĝi en la kirason de la besto.

– Jen tie ankoraŭ unu! – la sorĉistino almontris alian malsupren flugantan iom proksime. La oldulo povis bone vidi ŝian vizaĝon. Ŝi neniel estis junulineto, male. Matura mezaĝa sinjorino, iomete grasronda, sed kiu ankoraŭ havis radiantan brilon de beleco en sia rigardo.

– Nu, Renkiono, ĉesu moki tiun sinjoron.

– Ĉu vi venu kun ni, Siro Aveto de la Ruĝa *Gatigro*? – Renkiono vokis lin per gesto kaj rideto sur la lipoj.

La oldulo rigardis la urbon en flamoj, drakojn flugantajn kaj tuj poste, la bastonon de la sorĉistino ankoraŭ fulmantan per magia energio.

*Je Sankta Gideso! Tiu sorĉistino... ŝi estas mirinda! Mi devas resti apud ŝi.
Tio estas mia sola ŝanco.*

Vedd ĝustigis la ŝildon al la brako, deviŝis la ŝviton kaj fumajon de sia kalvo
kaj ilin sekvis.

3 — Sen hejmo kaj sen rutino

La oldulo vekigis kaj rigardis la stelplenan ĉielon. Tiu estis bela. Lia maldekstra flanko ankoraŭ ricevis iom da varmo el la lignofajro, la dekstra, estis frosta. Li turnis sin.

Li ja deziris esti vekiginta sur sia lito, elirinta el la domo por urini, fuminta sian pipon, esti farinta karesojn al Farelo, nutri siajn birdojn, kaj poste, manĝi bongustan matenmanĝon kaj eliri tra la urbo por revigligi la klingojn de siaj klientoj. Sed jen li tie, ne klare sciante kie, kampadante en maldensejo apud vojirejo. Li multe grimacis dum li stariĝis. Obstina larmo fluis sur lia vizaĝo, ĉar li ĵus memoris, pliafoje, la morton de sia hundo.

Li havis la morton de batalanto. Tiu malpurulo!

Lia dorso ankoraŭ doloris al li pro la falo, sed la vundo en la mano jam estis pli resaniĝinta. Li viŝis la larmojn, iris kelkajn paŝojn kaj sufiĉe penis malpezigi la vezikon.

La triopo dormis ĉirkaŭ la fajro. Proksime, la fantoma lupu elvokita de la sorĉistino gardostaris en la tendaro. La oldulo provis fari kontakton kun ĝi, sed li estis ignorita. Ankoraŭ mankis tuta horo antaŭ la sunleviĝo, sed al la oldulo jam ne venis ian ajn dormo.

Li observis la formon, laŭ kiu la sorĉistino dormis, ŝajniganta kadavron kovritan de mortotuko. Ŝi tenis la bastonon ĉe la brusto kaj ŝia spirado estis tiel subtila, ke oni povus kredi, ke ŝi estas mortinta. Li fiksis sian rigardon sur ŝia vizaĝo.

Ŝi estis belega.

Sur alia flanko, la grandulo, Motokuo, ronkis kvazaŭ iu furioza *diromio*. Siavice la kavaliro dormis duonsidanta, apogita al la aro da metalaĵoj de sia armaĵo, kiu estis envolvita en lia mantelo. Li konstante sin movis kaj iam kaj iam laŭte grumblis pri io.

Antaŭ kelkaj tagoj la oldulo ankoraŭ havis la okazon vidi tiun triopon mortigi plian drakon, antaŭ ol Eriana decidis, ke jam estas tempo foriri lasante Tedrison malantaŭe.

Tiu Motokuo estas ventkapa, jes ja! Kiel li kuraĝis tiamaniere ataki drakon?

Motokuo estis grimpinta sur la kolo de la drako per sia pikpioĉo. Kaj sur ĝia kapo li freneze kriis ripete batante la vereton de la drako. Certe li nur sukcesis fari tion, ĉar la piedegoj de la drako esti katenitaj sur la grundo. La flava mukaĵo, kiun Eriana elvokis lasis la kreitaĵon preskau paralizita.

La urbo estis forskuita, fine. Miloĵoj da loĝantoj malsupreniris la monton, direkte al Ĵafo.

Kial diable mi ne iris al Ĵafo kun la ceteraj? Mi devus esti irinta al la domo de Rin'le. Tiu lia edzinaĉo neniel ŝatus min vidi. Same ankaŭ mi rilate ŝin, afektema virino! Rin'le ne lasus min sub libera ĉielo, mi tion scias, sed...

Sekve la sorĉistino diris al la kavaliro – Ni iru al Gin'uĵio.

Kaj Renkiono prezentis unu el tiuj malicetaj ridetoj – Ĉu vi venos kun ni, Siro Aveto? Ni bezonas bonan arbalestiston en nia grupo!

– Mi ne estas arbalestisto...

Motokuo, tute kovrita de draka sango tuŝis lian ŝultron per sia manego.

– *Ki'estas via nomo?*

– Mia nomo estas Vedd'teris Mol'empro, sed ĉiuj min nomas Vedd.

– Kun tuta sento de respekto, sinjoro Mol'empro – intervenis Eriana – Gin'uĵio estas tre malproksima kaj Renkiono parolas sensencaĵojn!

Ba! – la kavaliro ŝin frontis. – Ĉu vi volas veni kun ni, aŭ ne?

La oldulo vidis sin diranta – Mi iros kun vi. Mi havas jam nenion kaj nenion. Cetere mi ĉiam volis koni Gin'uĵion.

Liaj memoroj regresis kaj li sin trovis revene al la fina malvarmo de la mateniĝo.

Ĉu mi ĉiam volis koni Gin'uĵion? Je Fiste! Kien mi metis mian kapon?

La oldulo sin trovis ekvidanta Erianan, pensante pri aferoj kiuj al li ne plu konvenus en lia aĝo.

Vi freneziĝas, Vedd! Ĝuste tio! Krome vi eĉ ne havus energion por tio. Ha, kiel se ŝi... Je la Sankta Gideso! Ĉu mi estas tiel malsaĝa? Ĉu mi kaptiĝis en tia embaraso logite de jupulina afero?

Vedd skuis la kapon kaj decidis, ke ne. Li nur inteligente agis. Iradi sub la ombro de potenca sorĉistino estis eble la plej bona maniero esti sekura. Ankoraŭ pli bone se tio, kion li aŭdis, estus ja vera, ke tiu bando da drakoj kiuj detruis la ĉefurbon estus nur la unua signo de okazontaĵoj multe pli malbonaj.

Eriana ne volis, ke la oldulo venu post ili. Ŝi ĉion faris por restigi lin en Paburio, du tagojn poste. Vedd ankoraŭ portis sian sakon kaj ĉiujn siajn laborilojn. Turmentis lin la ĵusa perdo de lia domo, de la hundo kaj de lia bird-bredado. Por forigi tiajn pensojn, li ekprenis la glavon de Renkiono kaj la pik-fosilo de Motokuo por akriki kaj pintigi. Lia bona servo estigis diskuton inter la sorĉistino kaj la kavaliro.

– Neniĉ, Eriana! Ja vidu la tranĉrandon de mia glavo! – li montris ĝian klingon al la sorĉistino.

– Kaj do? – ŝi estis incitiĝinta.

– Avineto Vedd valoras oron! Kaj rigardu ĉi tiun tranĉilon! Ĉi tio povas tranĉi eĉ paperon!

– Mi konsentas, sed li bezonas esti utila, fari ion por la grupo.

– Mi scias kuiri... – diris Vedd.

Eriana rigardis lin surprizite. – Ĉu vere? Do preparu al ni vespermanĝon, se ĝi plaĉos al mi, vi povos veni kun ni.

Vedd malfermis larĝan rideton lasante la triopon iel konfuzita. Motokuo alproksimiĝis kaj fingromontris liajn dentojn.

– Kaj tio, kio estas?

La oldulo frapis la dentojn per la ungo de la indikfingro – Dentoj de drako! Metiisto enplantis al mi pasintjare.

– Dentoj de drako? Tio ĉiumomente fariĝas pli ridinda! – malkontente murmuris Eriana.

Dum la vespermanĝo, la oldulo pacience aŭdis la historiojn rakontatajn de Renkiono. Tio pli animis la kavaliron rilate la novan kuiranton, precipe ĉar Eriana kaj Motokuo jam ne plu toleris liajn rafinitajn rakontojn.

La sorĉistino ne volis konsenti, ke lia ĉeesto en la grupo estis io bona, sed post kelkaj tagoj, Vedd rimarkis ke ŝi kontente ripozadis dum li preparis la manĝaĵojn ŝialoke. Koncerne Motokuon, tiu estis konkerita per la stomako. Li tre laŭdis la manĝaĵon de la oldulo. Li flustris al Vedd, ke lia manĝaĵo

estis pli bona ol tiu de Eriana, sed li estis sufiĉe sperta por ne menci tiun al la sorĉistino.

Ili ankoraŭ havis sufiĉe da provianto aĉetita en Paburio, vilaĝo ĉe la oriento de Tedriso. La oldulo havis lertajn okulojn por aĉetado de manĝaĵo, spicoj kaj koncernaj aĵoj. En dubo, ĉu jes aŭ ne, li aĉetis kelkajn sagojn por sia malnova arbalesto. Teni ĝin ŝarĝita ŝajnis io saĝa.

La oldulo metis pliajn branĉaĵetojn sur la lignofajron, prenis kelkajn ingrediencojn kaj ekpreparis la matenan manĝon per la malnova kuirpoto de Renkiono, la sola en ilia posedo. Vole nevole li estis iom lerninta tion, observante la mortintan Daljer'ran kuiru dum multaj jaroj. Ju pli maljuna, ŝi des pli akiris la kutimon resti parolante kun si mem kaj laŭtparolante receptojn.

Nun oni aldonu pinĉprenon da musunito kaj oni iomete bruligu ŝaŭalan en larda graso. Ĉio preta, tri splitoj el sovaĝligno. Nur ĉe la fino oni devas enmiksi la grajnoj, ĉar kontraŭe ili perdas la tutan akvon. Tiu estis la sekreteto, kiun avineto rakontis, hahaha!

– Bonan tagon, Aveto – la aromo igis Motokuon vekiĝi vigligita. Li estis granda, muskolforta, lia haŭto estis ruĝeta kaj liaj okuloj longaj, kiel tiuj de la hiaraŭa gento. Liaj nigraj kaj plataj haroj falis sur la vizaĝo kun franĝo, kiun li ĉiam emis puŝi per la manoj. Li kaj Renkiono lin nomis Aveto, aŭ Aveto Vedd, dum la sorĉistino menciis lin kiel la *oldulon* kaj ĉe rekta alparolo lin nomis sinjoro Mol'empro.

– Bonan tagon – la skrapa kaj raŭka voĉo de Vedd preskaŭ ne eliĝis.

– Kion vi havas ĉe vi? – Li flaris kun intereso.

– Lardon, radikon de *ŝaŭala* kaj grajno de *kub*.

– La odoro estas bonega! – li etendis la bovlon al la oldulo.

– Ĝi ankoraŭ ne estas preta. La radiko bezonas pli da kuirado.

Motokuo sidiĝis, senpacience.

– Kia estas Gin'ujio?

– Stranga loko... infestata de norukoj – Motokuo havis fortan akĉenton, sed li tre bone parolis kedlingvon. – Mi ne scias, al mi ŝajnas strangaj ĉiuj viaj urboj... Ankaŭ malbonodoraj kaj malpuraj.

– Mi neniam iris en Gin'ujion, sed oni diris al mi ke ĝi estas bela loko.

– La montoj estas belaj. Sed vi iras tien kaj konstruas tiun kvanton da malpuraj turoj kaj difektas la lokon.

– Kiaj estas la urboj de via popolo?

– Ni ne havas urbojn. Nur vilaĝojn. Nia vilaĝo iun tagon estas apud rivero, alian ĉe montbazo. Kiam ni foriras, la tero restas tiel sama kiel antaŭe. Ni utiligas nur lignon kaj vaksitan tolon por starigi niajn loĝejojn. La lignon ni bruligas, la tolon ni forportas kun ni. Ĉio estas tre simpla, kaj plibone, ne malbonodoras.

– Mi ŝatus vidi tion...

– Sed vi ne vidos.

– Mi ne estas tiom multe maljuna, eble...

– Ne temas pri tio, Aveto Vedd. Mia popolo ne plu havas vilaĝojn. Ĉiuj estas mortintaj, aŭ sklavigitaj de la zanzidoj.

– *Dio! Kia misfaro! Mi kaj mia granda buŝo.*

Motokuo skuis la ŝultrojn – Al kiu tio gravas?

Ili momente restis silentaj. La oldulo montris la bovlon.

– Estas prete.

Motokuo malfermis rideton, sed mankis fronte du dentoj. Tio neniel malpliigis lian simpation. La oldulo ree ridetis, kun perfekte skulptitaj dentoj de drako, tre blankaj kaj ĝustigitaj, tute strangaj en lia velkinta buŝo.

4 — La urbo de la norukoj

Malgraŭ tio, ke lia korpo estis doloranta kaj liaj piedoj estas vunditaj, la oldulo bone fartis, kiel jam de longe li ne tiel sentis sin. Komence li supozis, ke tiel estis ĉar nun li fariĝis utila, sed bone pensante, li estis utila en Tedriso, restarigante klingojn. Li do eksciis kial.

Li ne plu estis sola.

Efektive, kvankam li eliradis dum la tago kaj paroladis kun personoj, li tamen ĉiam nokte kaj matene troviĝis sola. Li vespermanĝis, ĉiam manĝis tute sola. Ne plu estis iu, kun kiu li povus dividi sian vivon, kaj la personoj kun kiuj li parolis estis klientoj, aŭ komercistoj. Li ne havis verajn amikojn. Pli ĝuste pensante, li havis amikojn. Kelkaj el ili, kiel Jorg'ek, mortis dum la milito. Aliaj mortis poste, transloĝiĝis aŭ malaperis, ĝis kiam neniu plu restis, krom li mem.

Antaŭ kvin jaroj, li ĉiun vesperon vizitadis la tavernon de la vila pugtruo kaj ludis damspecan tabulludon kun Tumul kaj la fratoj Brosk. Tiuj du stultuloj vivis en konstanta malpaciĝo. La malgranda Brosk trejnadis kun li antaŭ la invado de la kuneoj, sed ili luktis en malsamaj batalfrontoj. Ekde tiam ili fariĝis amikoj, la grandan Broskon li nur ekkonis poste, kaj tiu estis amuza ulo. Ili estis tre similaj, escepte de la preskaŭ dupalma alto ilin diferenciganta.

– Jen li denove ŝtelis, ĉu vi vidis Vedd? Ĉu vi vidas kiel ĉi tiu ŝuna pugulo estas senhonta?

– Li faris nenian ŝtelaĉan agon, Tiko! Fermu la buŝon kaj lernu ludi laŭregule, fiaĵo! – diris Tumul. La maljuna konstruanto iĝis senhara en la supro de la kapo, sed li havis blankan malkombitan hararon, kiu kovris liajn orelojn kaj la ŝultrojn. Vedd ŝategis lian krudan, tamen ĉiam justan konduton. Tiu ĉiam riparigis la tegmenton de lia domo, ĉiujare, post la ruĝaj

tempestoj. Li resopiris havi amikojn... Sed la malsanoj de la maljuneco falĉis la vivon de ili ĉiuj, ĝis kiam Vedd restis sola kaj ne havis novajn amikojn.

Jes, ĝuste tio! Li nun komprenis. Li sentis mankon de societo. Li rimarkis ke post lia vojaĝo kun la triopo, li denove sentis sin vigla. Motokuo jam estis intima kiel malnova amiko, kaj Renkiono ĉiam havis ion por rakonti kaj ŝatis demandi pri lia partopreno en la milito kontraŭ la kuneoj. Pri Eriana, nu, ŝi estis ĉiam kun ili, malgraŭ ke ŝi ne multe interparolis kaj ne konsideris lin atentinda homo. Li nur sentis sin en pli bona rilato al ŝi, kiam li propre konkludis ke tiu estis ŝia maniero.

Unu nokton, post kiam Renkiono kaj Motokuo endormiĝis, Vedd akiris kuraĝon por demandi.

– Kial vi tiom ĝeniĝas pro mi? Ĉu vi havas antaŭjuĝon kontraŭ maljunaj homoj?

– Antaŭjuĝo? Hahaha! Mi estas multe pli maljuna ol vi, mi nur ne aspektas tia.

– Vi ne ŝajnas esti pli maljuna ol mi. Je Fiste, verdire vi estas... – Vedd embarasiĝis kaj ne sukcesis diri ke li admiras ŝian belecon.

– Vidu, mia intenco ne estas esti maldelikata. Mi nur estas praktika persono. Mi konfesas, ke via ĉeesto min iom ĝenas, sed tio neniel rilatas al vi mem. Tio rilatas nur... Nur al Renkiono...

– Kiamaniere?

– Pardonon, sed mi ne devas paroli pri tio. – ŝi turnis la okulon, ĉagrenita.

– Ĉu li ne estas parenca al vi, aŭ io tia?

– Ne... Mi ne havas parencojn. Iun ajn. – Ŝia voĉo sonis tre lace kaj amare.

– Ĉu vi neniam volis havi infanojn?

– Magiistoj ne povas havi infanojn – ŝi respondis jetante al li mortpafan rigardon.

– Mi ne sciis, pardonu al mi. – li restis sensprita, sed tuj poste ŝi rekonsidere diris.

– Vi min senkulpigiu. Vere neniu scias sufiĉe bone pri ni. Estas multe de stulta superstiĉo pri nia ordeno kaj pri nia laboro. Nur tio.

– Mi do restas feliĉa scii ke tio ne temas pri io persana ĉe mi.

Eriana levis sian bastonon kaj elvokis la gardolupon por gardi la dormadon de la grupo.

– Mi estas laca, havu bonan nokton, sinjoro Mol'empro.

Ĉe la noktaj lignofajroj, Renkiono multe parolis pri sia patro, Siro Gram, ke tiu estis la plej granda ĉasisto de drakoj el ĉiuj tempoj. La oldulo iam aŭdis la nomon Gram, sed tio, kion li aŭdis, estis nek duono de tio, kion la juna kavaliro diris.

– Paĉjo ĉasis *kolenkon* kun rektaj kornoj. Ĝi estis rara drako kun bluaj skvamoj, la plej feroĉa kaj timeginda drako en la mondo!

– Jes... – diris Motokuo – kaj sepdek kvin *skotenkojn* kun altstaraj skvamoj! Kaj grandan *purkon* kun *viŝerinensaj* flamoj!

Ha, ĉiam unu drako pli malbona ol la antaŭa. Renkiono devus skribi teatraĵojn!

– Serioze, Motokuo, la rektkorna *kolenko* havas pli akrajn ungegojn, kaj ĝi ankaŭ sputas mukecan fajron. Unu guto de mukflamaĵo sur vi, kaj finite! Tutcerta transiĝo al la transmondo!

– Certe, vi diris ke Siro Gram estis sur la supro de krutegaĵo, ĉu ne? – Vedd petis, ke li daŭrigu la historion.

– Jes ja! Tiam li altiris la atenton de la *kolenko* kantante la melodion de la perdita maristo, per falseto. Kaj li imitis la incitan kanton. 'La maro min apartigis de tiu, kiun mi amas! Min apartigis!'

– Ha, ĉu do tiel estis? Li ĝin surdigis! Bonega strategio!

– Fermu la buŝon, Motokuo! Ne zorgu aŭdi lin, Aveto Vedd. Estas fakto, ke lia kanto lasis la drakon duonkonfuza.

– Ja vere! Ĉu ĝi eble restis sin demandanta? Kial, Fiste? Kial mi naskiĝis?

– Motokuo!

La oldulo ekridegis, ankaŭ Motokuo. Eĉ Eriana kaŝe ridis. Sed Renkiono trovis nenion sprita.

Ledd ridetis rememorante tiun vesperon. Eĉ tiam li ankoraŭ estis tre scivola pri la historio de Eriana, sed ŝi neniam parolis pri si mem. Motokuo ne sciis multon pri ŝi. Li nur sciis, ke ŝi kaj Renkiono jam estis kune vojaĝantaj kiam la kavaliro lin aĉetis kaj lin liberigis de la sklaveco antaŭ multe da jaroj.

Kelkafoje la oldulo restis pli malantaŭe kaj interparolis kun Motokuo, dum la sorĉistino kaj la kavaliro flustris inter si antaŭe.

– En Kedpir, vi estis dironta, ke la drakoj estis afero de iu, sed sinjorino Eriana ordonis, ke vi prisilentu.

– Kio? Ha, bone... – Motokuo mallaŭte parolis. – Mi mem ne bone scias kiu estas, sed mi aŭskultis ilian interparolon, pli ol unu fojon. Iu Le'Daman, ĝuste tion mi estis dironta.

– *Le'Daman? Ĉu eblas?*

– Ĉu do estis tiu ulo kiu venigis la drakojn? Li estas granda fripono! – Vedd kolere tordis la lipojn.

– La mondo estas plena de malŝatinduloj.

Prave! Ja plena de malŝatinduloj!

Ili tiam daŭrigis la vojaĝon, dume la provianto pli kaj pli iĝis nesufiĉa. La sekvintaj tagoj kunportis glaciajn ventojn laŭmezure kiel ili supreniris la padojn meze de la montoj de Verharŝo.

Je tiu punkto, nur Renkiono ankoraŭ kuraĝis paroli dum ili vojiris.

– Ĉu mi jam rakontis pri la okazo kiam Siro Gram kaj la granda Fapolosio savis la vilaĝon Gap'pa dum la sekeco en la fino de la reĝado de Larasto?

– Jam, ĉirkaŭ dek fojoj! – Grumblis Motokuo.

– Ĉu, Aveto Vedd?

– Mi opinias ke ne, Renkiono, mi ne memoras pri ĉi tiu.

– Eriana, faru sorĉaĵon por plibonigi la memoron de Aveto Vedd, je l' amo de Fiste. – Petegis Motokuo.

– Restu kvietaj, bonvole. – Eriana laŭŝajne estis daŭre streĉita, atentanta la aeron, rigardanta al la ĉielo serĉe de signaloj.

Definitive, la plej bona horo estis kiam ili haltis por starigi tendaron kaj dormi. La oldulo sentis ioman timon ne al drakoj, sed al la *ŝunoj*. Ili estis grandaj katoj kun griza kaj striita harkovraĵo. Ili ĉasis kune en malgrandaj bandoj. Ili estis ekvidintaj kelkajn malproksimajn fine de tiu vespero.

La gardostaranta lupo de Eriana atentigis pri la danĝero dum la nokto. La oldulo eksentis froston ĉe la ekvido de tiuj timegigaj kataj okuloj, rondaj kaj fulmantaj, kiuj ilin gvatis. Eriana simple ilin forpelis per siaj radioj, zorgante por ne vundi ilin.

Renkiono plendis – Vi preferinde povus esti tostinta unu el tiuj *ŝunoj* por la vespermanĝo.

– La kreitaĵoj estas gravaj kie ili estas. Krome, ni malŝparus la plejmulton de la viando.

La oldulo rimarkis, ke Motokuo laŭŝajne malkonsentis, sed li decidis nur resti silenta.

– Ĉu Gin'ujio ankoraŭ estas tre malproksima? – la oldulo pensis, ke li povus morti se li ankoraŭ vojaĝus dum multaj tagoj en tiuj kondiĉoj.

– Du tagojn – Eriana respondis rigardante la stelplenan ĉielon.

La oldulo kontente apogiĝis. Li opiniis, ke li povus almenaŭ postvivi du tagojn.

– Mi dankas, ke vi savis nin de tiuj *ŝunoj* – li murmuris.

Ŝi momente lin rigardis, lian vizaĝon duone kaŝitan de la ombroj de la fajro, kaj ŝi nur faris lakonan geston per la kapo.

Gin'ujio disestendiĝis laŭlonge de la deklivo de pli malalta verdeta monto, meze de altaj grizaj montoj kun suproj kovritaj de neĝo. Ĝi estis bela vidinda urbo, kie trafluis pluraj riveretoj, plena je malgrandaj lignaj pontoj ornamitaj per diverstipaj drakaj skulptaĵoj.

Fine de tiu vojaĝo, ili ĉiuj estis lacaj, malpuraj kaj bezonantaj baniĝon. Banejo estis ĝuste la unua haltloko de la grupo. La oldulo malfermegis la okulojn kiam li ekvidis tiom da norukoj. Tuta trupo el norukoj laboris en tiu ejo.

– Ĉi tien, sinjoro! – unu el la etuloj kondukis Veddon ĝis la banĉambroj.

Kaj tiu bano estis tiel bona samkiel reviviĝo.

– Hej, ne prenu mian brakon. He, tiu ŝuo estas mia! – Vedd provis malpermesi al tiu aro da norukoj, ke ili palptuŝu lian korpon, demetante liajn vestojn, sed ili videble preteratentis. Vere, ili ŝajnis esti surdaj kaj dronintaj en stranga tranco.

Ili estis malbelaj uletoj, kun griza haŭto kaj malgajaj okuloj, sen vigleco. Ili plejparte ne havis sufiĉan altecon por tuŝi la kapon de la oldulo sen helpo de benketo. Ili estis maldikaj kaj ilia haŭto estis faltaspekta, eĉ kiam ili havis fortajn muskolojn kaj efektive ne aspektis esti maljunaj. Kelkaj havis malhelan haŭton ĉe la vangoj, kun densaj haroj, longaj kiel kataj lipharoj.

Sankta Gideso! Tiuj bestuloj ŝajnas pli mortaj ol vivaj!

Sed kiam ili frotis al li la dorson, masaĝis liajn piedojn kaj tiel plu, la oldulo komencis pensi, ke li eble estis vorita de la *ŝunoj* kaj nun lia animo alvenis al la paradizo. Ili ankaŭ tondetis liajn harojn kaj lian barbon. Li eĉ povus ŝajni esti rejuniĝinta dek jarojn post ĉio ĉi.

– Kie estas miaj vestoj? – la oldulo demandis al la noruka estro, kiu havis longajn lipharojn kaj uzis verdan lozan tunikon ligitan ĉe la maldika talio per nigraj ledrimenoj. Liaj nudaj piedoj vidigis bone zorgitajn oranĝkolorajn ungojn, kiuj tamen ankoraŭ montris bestecan originon antaŭ la okuloj de la oldulo.

La noruko faris komplimenton al li, kliniĝante je preskaŭ naudek gradoj. La oldulo sentis sin senkomforta ĉe tioma ĝentileco. – La sinjorina moŝto ordonis bruligi viajn vestaĵojn.

– Bruligi? Nu, sed...

Noruka helpanto, surhavanta zontukon kaj unu el tiuj verdaj kuriozaj ĉapeletoj, alproksimiĝis portante falditajn vestaĵojn. Ili estis paro da ĉemizoj kaj pantalonoj el *ŝenim* brile ruĝa, broditaj laŭ flora modelo, en subtila maniero, kun paŝtelaj nuancoj de flavo.

La oldulo streĉis la vestojn antaŭ si kaj tordis siajn lipojn ĉirkaŭitajn de sulketoj. Estis al lia dispono ankaŭ kalsonetoj el kruda teksaĵo. Li singene vestis tion, sentante sin kiel pajaco, kiu surmetas tiajn kolorajn vestojn. Almenaŭ la novaj ŝuoj estis komfortaj. Ekster sia banĉelo, li renkontis Motokuon kaj Renkionon, kiuj same surhavis novajn vestojn, tamen ne tiom kolorajn kaj malbelegajn kiel tiujn, kiujn li uzis.

– Vi estas bonegaspekta, Aveto! – ekkriis Renkiono malfermante la brakojn. La oldulo tenis sin iom kuntiriĝinta ĉe tiu neatendita brakumo.

– Tiu, tiu vesto... estas posedaĵo via?

– Estas bonege havi multe da mono, ĉu ne? – li palpebrumis al la oldulo.

– Mi ne volas plendi, neniel, sed se mi havus monon, mi aĉetus ion pli diskretan.

– Lasu esti grumblema, Aveto. Via aspekto estas tre distingiĝa.

– Mi estas certa ke oni sukcesos distingi min en iu ajn loko...

Elirinte el la interna parto de la banejo, ili alvenis al la verando, kie estis bela vidaĵo de Gin'uĵio. Ĝi efektive estis tute malsama kompare kun la ĉefurbo, kun Ĵafo, aŭ kun iu ajn alia urbo, kiun li konis. Kiel se ĝi estis

konstruita de alia popolo. La domoj estis entute tre vertikalaj, kun pintoformaj tegmentoj faritaj el flavbruna ceramiko, sed tre malpuraj. Ĉiuj fenestroj estis rondaj kaj tro malgrandaj, sed ankaŭ estis abundo da verandoj, balkonoj kaj ĝardenoj. Tamen io pli vokis la atenton de oldulo ol la urba scenejo.

Sankta Gideso! Nu, senkulpigu min, sinjoro, tial ke mi elvokas vian nomon pro tiel profanaj kialoj!

La kombitaj haroj de Eriana enkadrigis ŝian ŝminkitan vizaĝon kaj la robo el blua ŝenim reliefigis ŝiajn konturojn. La oldulo englutis aeron kaj riproĉis al si mem, ke tiajn sensaciojn kaj pensojn jam de longe li devus esti forpelinta.

Ŝi fikse rigardis lin kun malaproba rigardo. La oldulo havis dubon, ĉu tio ŝuldiĝis al la fakto, ke li nekonvene ekrigardis ŝin, aŭ ĉu tio rilatis al liaj novaj vestoj.

– Renkiono, mi pensis, ke mi petis al vi elekti decajn vestojn al li.

La militisto ŝultrolevis.

– Ili ŝajnas sufiĉe decaj al mi! – li sin defendis.

– Ili ne konformas al via rango.

– Ĉu? – la kavaliro sin montris iom ofendita – Kial?

– Ili estas vestoj taŭgaj por servemulo.

La oldulo volis diri ion, sed li ne sukcesis. Li levis la fingron, malfermis la buŝon sed eliĝis neniun sono.

– Servemulo? – replikis Renkiono. – Li estas nia amiko, efektiva ĉasisto de drakoj.

– Eriana movis la okulojn. – Nur trovu ion pli diskretan. Ion, kion kuiristo uzus.

La oldulo havis konfuzajn sentojn pri tio.

Jes, pli diskreta, mi plene konsentas! Sed kuiristo... Ĉu tia ŝi min vidas? Nur ia maljuna servisto? Al mi eblas fari nenion....

– Venu, Aveto. Ni iru al la butikoj elekti iun bonan veston, kiu ne ĝenu tiun megeron.

– Bone, laŭvole...

Butikoj de vestoj estis ejoj, kiujn nur nobeloj, magiistoj kaj riĉaj komercistoj vizitadis. La oldulo provis elekti sian novan veston ne tute lasante sin esti influata de Renkiono. Verdire, li estis malĝoja, ĉar li memoris ke la vestoj, kiujn Eriana ordonis bruligi, estis kudritaj de Dalje'ra. Li ankoraŭ povis prezenti al si la bildon de sia maljuna edzino sindonanta al teksado per longaj kudriloj apud la varmiga fajro. Ŝi kelkafoje levis la okulojn al Vedd kaj ridetis. Tiu rigardo kaj tiu rideto, eĉ en ŝia maljunaĝo, estis preskaŭ la samaj el la tempo, kiam ili konis unu la alian. Ŝi estis tre bela kaj malkvieta junulino. Ŝi havis dikajn nigrajn brovojn, kiujn ĉiuj ŝiaj infanoj heredis.

Fine, li sukcesis elekti grizan vestaĵon kun blua kolumo kaj kelkaj modestaj brodaĵoj el la sama koloro de la botonoj kaj randaĵoj de la manikoj.

– Kio okazas, Aveto? Ĉu vi ne estas kontenta ankaŭ pri tiu?

– Ne, tiu estas bonega. Mi nur memoris pri io malĝoja.

– Pri kio?

– Pri iu, kiu jam forpasis.

Revenante al la verando, Eriana ĵetis aprobran rigardon.

– Tre bone, ni do iru.

Ili adiaŭis la norukojn ĉe la banejo kaj ĉe la butiko, sed ili tuj estis akceptataj de nova grupo gvidata de unu noruko brune vestita. Li estris malgrandan grupon da ŝipŝarĝistoj. Tiu longe klinis sin por komplimenti kaj prezentis al li naivegan rideton. Ili havis vicon da ok dentetoj antaŭ la buŝo, tuj apud du paroj de elstaraj kaj akraj kaninoj.

– Miaj mastroj! Klapuo *iri konduki* mastrojn ĝis la gastejo! – li diris tion kiel se estus necese klopodi per tuta koncentrado por atingi sukceson.

Ili sekvis laŭ la fortaj deklivoj de Gin'uĵio. Enestis norukoj en ĉiuj ejoj, kien ili direktis la rigardon.

– *Drakoj ĉe mia kolo! Kiom da tiaj bestuletoj vivas ĉi tie?*

Eble estis du norukoj po ĉiu persono en la urbo.

– Estas multe da norukoj ĉi tie... – li komentis.

Renkiono respondis – La popolo de Gin'uĵio multe dependas de ili.

– Tio pli ŝajnas urbo de norukoj, ol de homoj. – konfirmis Motokuo. – Ĉiuj ĉi-tieaj etuletoj ŝajnas esti sub efiko de drogoj.

– Prefere tiel estus – Eriana lasis eskapi bedaŭran voĉtonon.

– Ho! Kial? – Motokuo replikis.

– Ne gravas – ŝi respondis kaj jen tie la afero finiĝis.

Ili iris ĝis konstruaĵo kiu tre elstaris inter la ceteraj, malgranda, ronda kaj tutŝtona. Ĝi estis konstruita per malhelkoloraj ŝtonoj, kaj multe kovriĝis de

muskoj kaj kelke da trudherboj, kiuj donis al ĝi aspekton de io forlasita. La oldulo havis la impreson, ke ĝi similas maŭzoleon.

– Konduku la du al la gastejo – Eriana ordonis al Klapuo. Ili kunportis la apartenaĵojn de la vojaĝantoj kondukante ŝarĝoĉareton kun kvar stangoj.

Renkiono tuj volis protesti, sed restis silenta pro la kolera rigardo de la sorĉistino.

La oldulo ekhavis intereson esplori la maŭzoleon, sed li rezignis kaj sekvis Klapuon, la norukon kun brunaj vestoj kaj blanka kaptuko ĉirkaŭ sia platkapo.

Tiaj vestkoloroj, rubandkoloroj, specoj de ĉapelo! Tio signifas ion, sed kion?

– Ili estas plenaj de misteroj, tiuj du. – Diris Motokuo, kiu jam kutimis esti flankelasita. Tio deturnis la atenton de Vedd de la fremdaj vestoj de la norukoj.

– Miaopinie ili devas solvi ĉi tiun tutan aferon antaŭ ol la kondamindaj kuneoj venigos sian armeon ĉi tien kaj findetruos la regnon. – grumble murmuris la oldulo.

– Ĉu vi ilin plurfoje alfrontis?

La oldulo severigis sian mienon kaj piedĵetis ŝtonetojn eksteren el sur la vojo. Li abomenis pensi pri la milito. Li revidis en la memoro kuneon trapikitan ankoraŭ kriantan kaj provantan lin mortigi.

– Jes, miaj manoj estas kovritaj de sango de la kuneoj.

– La paco jam daŭras dum pli ol kvardek jaroj, ĉu ne?

– Jes, sed mi trovas, ke ĝi ne daŭros eĉ plian monaton... – li pesimisme plendis.

Tuj kiam la malbenitoj scios, ke la ĉefurbo estas detruita, ili serĉesploros nian malfortecon.

Antaŭ ol li povis daŭrigi, Klapuo turniĝis kaj faris troan geston.

– Ni alvenis, miaj'mastroj!

La oldulo volis ridi pri li. Tiu estis patosa estulo, kiu lin memorigis pri li mem. Nenio pli ol servisto, kuiristo, kiu tamen pro ioma hazardo estas akompananta tiujn gravulojn.

Motokuo elprenis monerecon el la poŝo ĉe la zono kaj ĝin donacis al la malgranda noruko. Tiu lin rigardis konfuzita kaj tremante ekkaŭris.

– Ne, ne, ne, sinjoro mastro! ne *povi* mi akcepti.

– Nu, bone, sed vi ne bezonas fari tian scenon...

Pardonu... Ne *voli* fari scenon.... Klapuo stulta. Stulta klapuo!

– La oldulo jam estis vidinta kelkajn norukajn servistojn en Ĵafo, unu-du foje. Ili tre malgrandnombre troviĝis en aliaj urboj de la regno, sed ne multe similis al tiuj el Gin'uĵio. Li rimarkis, ke dum Klapuo sin senkulpigis, tiuj portantaj la bagaĝon nerveze observis, unu el ili iom tremante. "Bedaŭrindaj kreitaĵoj", esprimis la okuloj de la oldulo.

Vedd atentis la manieron laŭ kiu Motokuo kun ruĝaj oreloj supreniris la ŝtupojn de la gastejo.

Bedaŭrindulo, li ne havis la intencon kaŭzi ian ĝenon.

La oldulo lin sekvis. Interne ili estis akceptitaj de pliaj norukoj. Unu el ili, flavkoloro vestita, portis samkoloran ĉapelon. Li nomiĝis Dlup kaj perfekte parolis ked-lingve, sen akĉento aŭ misparoloj.

– Estu bonvenintaj al la gastejo de Lordo Ĵejŝen!

– Dankon – respondis Vedd.

– Venu, miaj mastroj, ĉi tien, bonvolu.

– Pardonon, Dlup, sed ĉu estas io manĝebla? Mi estas malsatega! – demandis Motokuo.

– Ho, jes, kompreneble. La manĝejo estas tiudirekte.

– Ĉu vi venos? – la ekstelando demandis.

– Pli malfrue, mi nur volas ripozigi ĉi tiun oldan ostaron. – diris Vedd kun lacaj okuloj.

Poste ili sekvis apartajn vojojn. Ĉi tiu loko sin ornamas per arto, Vedd rimarkis. Kaj tio propre ne estis afero pri artaĵoj, kiel tapetoj kaj belaj vazoj. Estis la detaloj.

La planko el malhela polurita ligno, kiu brilis simile al spegulo. La murpiedoj el skulptita lignaĵo, kaj same la pordaj traboj el klara ligno kun kompleksaj geometriaj mozaikoj.

Kaj fine, tiu belega lito. Ĝia kaploko skulptita por figuri montojn kaj ĉielajn nubojn. La ŝveleca matraco el mola linŝtofo. La oldulo kuŝiĝis tie kaj litmergiĝis. La plafono havis perfektan puran vefton el pajlo. Venis al li profunda kaj mirinda dormo.

Ankaŭ tio estis arto.

5 — la saĝo de Dlup

Li vekigis frumatene. La ĉambro estis tute malluma, li turnis sin por serĉi la fajrilon kaj la lampeton, sed ili ne troviĝis tie. Tiam li konsciis, ke li ne plu estas hejme, kaj neniam estos. Ĝi estis bruligita de la atako de la drakoj. Farelo nun ne lekos liajn krurojn, neniam plu. Sed lia eksploda veziko ne ebligis la malĝojon entrudiĝi.

Je Fiste! Kiel mi urinu nun? Neniel eblas vidi en ĉi tiu mallumego!

Li provis memori pri la dispozicioj de la objektoj en la dormoĉambro, sed vere lia tuta atento turniĝis al la lito. Li bezonis dormi sur lito post ofta dormado subĉiela. Li esplorpalpis la murojn, sentante la aranĝon de tiu ligno kaj ties fortan odoron. Ho jes, ĝi estis la bordo de unu el tiuj rondaj fenestroj.

— Aĉa fenestro! Kraĉaĵo! Kiel mi malfermu ĉi tiun aĵon!

— Kiu diable starigis fenestron, kiu ne malfermiĝas — li mallaŭte riproĉis.

Li daŭre palpis en la ĉambro ĝis la momento kiam lia eta piedfingro trafis malmolan angulon. Estis mallume, sed li vidis fulmolumon ĉe la intensa doloro kiu atingis lin de la fingreto ĝis la supra parto de la spino.

— Merdo! — Li ekkriis pli laŭte ol dezirinde.

Li malleviĝis, sentante ke la kruroj grincas de plendado. Li tuŝpasigis la manon sur la doloranta fingro. Laŭŝajne ĝi ne estis rompita, sed ĝi tuj ŝveliĝos kaj fariĝos viokolora. La veziko tiam devigis lin daŭrigi la palpardon.

La angula elstaraĵo estis tablopiedo. Sur la tablo li trovis ion malvarman kaj rondan. Supre ĝi havis truon. Ĝi estis akvokruĉo.

Je Sankta Gideso! Mi ne povas simple verŝi la akvon sur la plankon kaj fuŝi ĉi tiun mirindan lignaĵon.

Li tiam trinkis ĝis preskaŭa pleniĝo. Li kunportis la kruĉon al la lito kaj sidiĝis. Tenante ĝin inter la kruroj li streĉis la forton kaj forte penis per turmenta tempodaŭro kaj fine li sukcesis senŝarĝiĝi. Aŭdiĝis la sono de la retenita likva ĵetaĵo trafanta la fundon de la kruĉo kaj poste fariĝanta pli akuta laŭmezure kiel la kruĉo pleniĝis.

Ne elverŝiĝu, ja ne elverŝiĝu...

Kaj kiam la sono tre akutiĝis, ĉe la altiĝo de la urino tra la kruĉokolo, la afero finiĝis. Li eligis grandan kaj longan suspiron.

Ho, jes, jen kio estas plezuro...

Tio kompariĝis al nenio pri kio li memoris el sia juneco, kiel virinoj, drinkaĵoj kaj bongusta manĝaĵo...

Nun ne estis elira rimedo, li devas atendi la alvenontan tagon. Ĉu ankoraŭ estis tre frue? Resti en la mallumo kaj maldormanta igis lin pensi.

Draka kraĉo ĉe mia kolo! Mi ĉion fordonus por fumi mian pipon nun.!

Lia volo ne manifestiĝis tiel forta, kiam li vojaĝis kun la triopo. Ĉiam estis okazo por distriĝo, sed nun estis nenio. Nur li kun si mem. Li ekpensis pri la vojaĝo, pri Eriana. Ĉu eble li ankoraŭ sentas iaspecan deziron siaaĝe?

Kion mi estas pensanta? Ĉu mi ankoraŭ kapablas havigi ĝuon al ŝi?

Li deturnis sin de tiuj senutilaj pensoj, ĉar ŝi neniam permesus, ke tia maljunulo kia li tuŝus ŝin.

Li pensis pri la juna Renkiono.

Ha, mankas saĝeco al tiu junulo! Sed li estas amuza.

La oldulo pli kaj pli ŝatis lin, eĉ sen la konscio pri tio. Eble, same kiel li ŝatis siajn infanojn kiam ili ankoraŭ estis malgrandaj kaj kiam ili tiel ofte ludis kaj ridetis al li.

Futeĉjo amegis elpensi historiojn, tiel kiel Renkio. Tiu petolemulo!

Vedd ridetis, sed tuj poste lia rideto fermiĝis per amara esprimo.

Ĝis kiam ili elkreskas kaj fariĝas maljustaj sendankuloj! Egoistaj kaj krudaj! Jen kio ili estis!

Kaj li ekpensis pri sia propra egoismo. Jes, li en la pasinteco estis egoista. Kaj li ankoraŭ estas tia. Liaj infanoj tutcerte heredis tion de li.

Duonlumo ekpenetris lian ĉambron tra tre malgrandaj fendoj en la fenestro. La oldulo iris tien kaj pli bone vidante li provis deĉifri la mekanismon por malfermo de la fenestro. Tio postulis iom da tempo, kaj fine li trovis la peceton kiun oni devus ŝovpeli. Farite.

Je Fiste! Kia belega loko!

Li lernis kontempli la aŭroron en Tedriso, sed tio sur la supro de la montoj estis eble unu el la plej belaj bildoj, kiujn li iam vidis en sia vivo. La malvarmega aero ne malhelpis. Li daŭrigis rigardante la pejzaĝon kun naiva rideto dum kelka tempo, kaj tiam la aktiveco de la norukoj portantaj ĉiaspecajn aĵojn tra la stratdeklivoj vokis lian atenton.

Li vestis sin.

Nun jam estas sufiĉe da lumo por ke mi povu trairi la koridorojn.

Kiam li malfemis la pordon, li eksaltis malantaŭen. Tie staris noruko tro proksime, rigardanta supren per tiuj flavetaj gelatenecaj okuloj. Li vestis sin

per ununura flava kalsono, malgraŭ la reganta malvarmo. Li ne ne rimarkis, ke li ektimigis la oldulon, kaj nur diris:

– *Bontag'mastro.*

La oldulo ekvolis riproĉi la uleton, sed li rezignis pro lia aspekto inda je bedaŭro.

– Bonan tagon.

– *Sori Klapuo, pet'servi vin*

– Kio, junulo?

La malgranda noruko iom nervoza fleksiĝis – *Bezon'ion mi'mastro?*

– Tiu botelo havas pisajon. – la oldulo almontris.

La noruko surgeuiĝis kaj ree faris komplimentojn – *Pardon'mastro! Ĉiu'la senkulpigu! Ni...*

– Ne, junulo. Vi miskomprenis. Estas mi tiu kiu urinis en ĝin. Purigu, bonvole, mi ne trovis pispoton.

La noruko eniris ankoraŭ tenante la kapon klinita. Antaŭ ol preni la botelon, li alŝovis kaj montris la porcelanan urinujon kun ŝtopilo, kiu estis sub la lito. Poste li prenis la botelon kaj ektrinkis la urinon.

– Hej, tuj ĉesu fari tion! – riproĉis la oldulo.

La noruko haltis, mallevente la botelon kun grimaco en la vizaĝo kaj lin ekrigardis per evitemaj okuloj.

– Nur elverŝu la likvaĵon en la urinujon kaj bone elpurigu la kruĉon, ĉu komprenite?

– Klare, mastro! Klare, klare, klare... – la uleto iris fari tion, kion li diris.

La oldulo tiam eliris malkviete grimacanta.

Je Sankta Gideso! Kio estis en la kapo de tiu malfeliĉulo? Kiasence eblis al li trinki la urinon, kia aĉaĵo!

Li neniam antaŭe aŭdis pri tio, ke norukoj estas trinkantoj de urino, aŭ io simila. Tio certe ŝuldiĝas al alia afero. Ĉu eble ia troa nervozeco? Ĉu timo esti riproĉata?

La gastejo ankoraŭ estis kvieta. Li povis aŭdi la sonojn de la malmolaj plandumoj martelantaj la lignon ĉe siaj paŝoj. Neniu estis en la akceptejo, sed li vidis ke la pordego estis duonfermita. Li eliris tra ĝi. Post la ŝtupoj estis ĝardeno trapasita de eta rivereto kun lignoponto en miniaturo. Pluraj el tiaj riveretoj trafluis la urbon.

Kia pura aero estis la tiea, kia pura aero!

En la korto el ŝtonoj, trans la ponto, li vidis Dlupon sidantan sur benketo kun metalaj iloj en la manoj. Komence li pensis ke li akriĝas tranĉilojn, sed li tuj rimarkis, ke li estis prilaboranta lignon.

– Bonan tagon, mastro! – tiu lin rigardis kun ŝajnaj vivaj okuloj.

– Bonan tagon... – li forĝesis ties nomon. – Kion vi faras?

– Laboranta por plenumi kelkajn mendojn.

La oldulo ekzamenis la enhavon de skatolo plena je lignopecoj en diversaj formoj kaj grandeco.

– Pri kio temas?

La noruko miris, ke li ne sciis pri kio temas.

– Ĉu la mastro neniam amuziĝis per kradludo?

Li jam estis aŭdinta tiun nomon, sed li neniam vidis iun ludi ĝin. Tio estis nobela okupo. Personoj kiel li ludis ĵet-kubon, kartojn aŭ damojn.

– Vi ŝajnas sufiĉe animita ĉe tio.

La noruko ridetis. Liaj akrapintaj paroj da flavaj kaninoj tre elstaris inter la dentetoj vicstarantaj antaŭ lia buŝo.

– Mi estas bonŝanca. Malmultaj inter ni sukcesas plenumi taskon difinitan de la patrinoj.

La oldulo iom kojektis pri la ebla signifo de tio, sed antaŭ ol li eltiris la dubon, la etulo daŭrigis.

– Se iu laborus dum jaroj en funkcio kontraŭa al sia propra naturo, tio povus lin ja mortigi.

La oldulo rezonis pri kiel al li estis plaĉe akriĝi la tranĉilojn kaj ankaŭ bredi la Han'jakuojn.

– Tio fakte estas vera – li enpensiĝe konsentis.

– Ankoraŭ estas frue, mastro, la matenmaĝon oni nur povas liveri post la sonorado de l' sonorilo de la markizo.

– Dankon.

– Ĉu vi komforte pasigis la nokton? – Dlup demandis koncentrita sur la eltondado de ringoj ĉirkaŭ la cilindra peco, kiun li skulptis. Tion li faris per malrapidaj kaj precizaj movoj, aŭdigante preskaŭ nenian bruon.

– Belega lito.

– Mi kontentas aŭdi tion, mastro.

– Ĉu vi naskiĝis ja ĉi tie?

– Ho ne, mastro. Neniam iu el ni naskiĝas ĉi tie inter la homoj.

Kial ne?

Dlup prezentis palan rideton.

– La mastro estas alilanda, do vi ne scias kial, ĉu ne? Ne ekzistas patrinoj inter ni, nur norukoj senigitaj je vireco.

– Kiel?

Kiam la ĉasistoj atakas niajn vilaĝojn, ili mortigas niajn patrinojn kaj eltiras nian sekson. Tial, post kiam tia perfortaĵo senutiligis nin, aliaj patrinoj ne fordonas sin al klopodoj por nia elaĉetado.

– Tio estas tre kruela.

– Sed tia estis nia destino.

La oldulo ekkomprenis la timon, kiun li vidis en tiuj malgranduloj. Oni traktis ilin kiel aĵojn.

– Kruela destino – kaj la oldulo meditis pri la miloj da personoj kiuj estis bruligataj en Tendriso. Kaj ankaŭ pri la aliaj, kiuj mortis en la milito. Ŝajnas, ke ĉiuj ricevas sian punon laŭ unu aŭ alia maniero.

La noruko levis la ŝultrojn – Ne valoras la penon suferi kateniĝi al la pasinteco. Ĉiun tagon kiam la Patrino Suno reaperas, ni devas danki ke ni ankoraŭ estas utilaj al ia celo.

La noruko preteratentis, ke la oldulo grimace mienis. Li sentis perturbon ĉe la stomako, ne pro malsato, sed ĉar li ne plu scias al kia celo li povus utili.

Li do ekpensis, ke li eble estas nun, multe pli ol antaŭe, simila al noruko. Servi kiel kuiristo de Eriana povus fine esti ĉio kio al li restis.

Iom poste, sonis la sonoriloj de la horloĝo sur la turo de la markizo, signanta la unuan horon de l' tago. Oni povus vidi la alte elstaran turon sur la supro; la konstruaĵo najbara al la domo aspektis kiel templo, sed ne kiel tiuj dediĉitaj al Fiste, al Sankta Gideso aŭ al Gidevano. La oldulo mallevis la ŝultrojn kaj reiris al la gastejo, provante ekzerci sian spiriton per akceptemaj pensoj, kiel ordonis Sankta Gideso.

Kiam li estis juna, li ankoraŭ spertis tiun obstinecon al ne akceptado de l' aferoj. Same okazis kiam venis la rekrutistoj kaj pentris la kvarpintan stelon sur lia frunto.

Li kuris al sia patrino, forte trafita de indigno kaj timegigo.

– Mi fuĝos, patrino. Mi ne volas morti kiel miaj fratoj!

Li estis la plej juna, ĉirkaŭ dek-sepjaraĝa kaj lia patrino jam estis iom maljuna, havanta grizajn harojn, kun fortaj manoj kaj brakoj, plenaj je videblaj vejnoj. Ŝi estis laboranta en la kuirejo, kaj uzis la pezan pistilon por mueli grajnojn de sekaj *nuŝoj* por prepari farunon. Ŝi ĉesigis la batadon kaj akeceptis en la brakojn la junulon, kiu singulte ploris.

– Trankviliĝu, filo. Trankviliĝu.

– Mi ne volas morti, patrino.

Ne, mia infano, neniu volas, sed ni devas akcepti la faktojn de la vivo. Sed ne zorgu, mi jam scias, ke la servantoj de la reĝo estis venantaj. En la hieraŭa vespero mi iris al Mursalo kaj parolis kun Patrino Jodita.

Li ekrigardis la trankvilajn okulojn de sia patrino. Ŝi stariĝis kaj prenis malgrandan botelon de sur la breto.

Trinku tion, filo.

– Kio ĝi estas?

– Ĝi estas fortikilo. Ĝi donos al vi forton kaj kuraĝon por fronti la militon.

– Ĉu vi ja kredas, ke ensorĉitaĵo solvos ion?

– Patrino Jodita sciis pri la aferoj. Ŝi memorigis al mi, ke vi naskiĝis sub tre speciala luno. La luno de la Filino de Gidevan.

– Kaj do? – li ankoraŭ estis ploretanta.

– Tio signifas, ke vi estas speciala, mia infano, ke vi povas kalkuli je Fiste por esti gvidata en la malfacilaj momentoj.

Laŭ la skribaĵoj de Torbal, la filino de Gidevan estis la diino plej amata de Fiste. Patronino de l' printempo, kreintino de ĉiuj semoj, kaj amikino de la Patrino Suno. Vedde ne profunde konis la skribaĵojn, sed li estis piulo fidanta Sanktan Guideson, kaj same kiel al tiu sanktulo li ĉiam petis pri protekto al Fiste.

Li forte enlasis tiun nocion pri la fortikilo kaj pri la protekto de Fiste por venki sian timo al la rekrutigo. La fortikilo de Jodita, simila al brando miksita kun melaso, igis lin senti sin iom pli konfida, kaj ankaŭ iom ebrieta. Estis okazoj, en kiuj li vokis Fisten en la batalkampo. Sed post la fino de la milito, lia vivo akiris ordinaran rutinon: labori, varti siajn infanojn, perlabori por subteni familion, ktp. La ideo ke la filino de la teksisto povas lumini lian vojon komplete perdiĝis.

Kion li faru rilate al sia postrestanta vivo? Kun tiu sento, ke li estas neŝirmita, sen hejmo, sen ia ajn certeco? Li repensis pri la figuro de la diino

Fiste. Kreintino de la tero, reĝino de ĉio kio rilatas al la grundo. Patrino de ĉio. Eble ŝi denove helpos al li en tiu malfacila momento.

6 — La malnova mortigantino de drakoj

Kiam la olda Vedd alvenis al la manĝejo, li vidis unu el la grandaj tabloj ĉe kiu estis multaj personoj, kiujn li ne konis, sidantaj kune kun siaj vojaĝkunuoj. Duona dekduo da norukoj rapide movis sin tien kaj reen, afliktaj, servantaj diversajn frandaĵojn.

Ĉe la kapo de la tablo sidis mezaĝa viro en vesto nobela, aŭ de alta oficiro de la registaro, tute blua kaj ruĝa. Li havis dikajn vangojn kaj grandajn submentonajn grasaĵojn eliĝantajn el la kolumo de lia bluzo, sed li pli ŝajnis ia tipo de bonvolemulo. Liaj haroj estis plate kombitaj kaj ligitaj per har-nodo, io tre stranga al la oldulo.

– Aveto Vedd! Bonan matenon! – salutis Renkiono. – Sidiĝu ĉe ni.

La nobelo demandis kunŝovante la brovojn – kaj tiu estas..?

Eriana premis la lipojn, ĝenata, kaj antaŭ ol Renkiono malfermis sian grandan buŝon ŝi diris:

– Tiu ĉi estas nia kuiristo.

– Li devas estis tre kompetenta, tial ke li estas venigita de tiel malproksime.

Eriana hezitis, ne sciante kion diri, kaj Renkiono aldonis – La plej kuraĝa kuiristo kiun vi jam alrigardis, Lordo Ĵejŝen.

– Do bonvole sidiĝu ĉe ni. Mi volas aŭdi tian historion.

– La oldulo sidiĝis, sensprita.

– Servu lin, stultuloj! – Ĵejŝen akre gestis. La norukoj saltetis de ektimo, sed tuj poste ĉirkaŭis la oldulon lin regalante.

La lordo ridegis, anticipante sian malbongustan spritaĵon – Jen estas la tago en kiu la kuiristo estos servata, anstataŭ servi, ĉu ne?

La oldulo respondis per deviga rideto, sed Renkiono ridegis, trovante plaĉon en tio.

Renkiono ne bezonis esti stimulita por komenci rakonti – Ni iris tra la stratoj de Tedriso, plenaj je ĥaoso, centoj da drakoj flugantaj, la tuta urbo en flamoj, homoj freneze kurantaj al la elirejoj. Tiumomente mi lin vidis irantan al la kontraŭa direkto, portantan ŝildon kaj arbaleston. Li haltis antaŭ *kelnarko*, tiuj kun nigraj kaj aspraj skvamoj, unu el la grandaj. Kaj ĝi atakis! Ĉu vi sukcese bildigi al vi tiun scenon, Lordo Ĵejŝeno?

La lordo rigardis la oldulon, lin taksante.

– Kaj kiam ni findetrus la bestaĉon, li ne forkuris. Li nin akompanis por alfronti aliajn bestojn. Ĉi Aveto havas multe da energio kaj estas tre kuraĝa, ĉu ne, Motokuo?

La grandulo maĉis kun stufitaj vangoj, sed li konsentis vive balancante la kapon.

Tiam la oldulo rimarkis en la centro de la tablo, antaŭ Renkiono, mallarĝan kaj longan skatolon kun malbonsigna aspekto. Ĝi estis tute farita per skulptitaj ostoj, ĝiaj drakaj figuroj sinsekve superstarantaj unuj al aliaj kreis tre kompleksan vidan modelon. Neniu laŭŝajne atentis la objekton, tial la oldulo ŝajnis, ke li ne estas interesiĝinta.

– La lastaj sciitaj novaĵoj informas ke la reĝo sukcesis relokiĝi en Ĵafo.

– Ĉu la afero estis tiel grava?

– Jes, Tedriso estis detruita, konsumita de la flamoj.

– Oni malfacile imagas... – la lordo gratis sian maldensan barbon sub la vangoj. Kaj tiam li diris per vigla voĉo. – Sed mi konfidas la reĝon Hasgur! Se iu estas kapabla superi ĉian krizon, tiu estas nia kara reĝo!

Vedd ĉesis manĝi por observi la nekonvenan konduton de la lordo.

Mi konfidus nenion tian. Mi antaŭvidas ne pli ol unu monaton por ke la drakoj vespermanĝu la realan familion en bankedo.

Ĵejŝen daŭrigis senzorge – Resti tiel malproksime estas tre malfacile en kelkaj okazoj, sed tio estas beno, en okazo tia, kia la nuna.

Kia egoisme elkraĉa kaj nesentema estas tiu dikventra lordo!

La oldulo nenion ekdiris kaj plezure remaĉis la suk-plenan ruben-pomon.

– Atentu, amikoj, mi vere tre entuziasmas! Niaj senditoj alvenis hieraŭvespere, alportante bonegajn novaĵojn!

Kiajn novaĵojn? – Renkiono demandis interesite.

– Nu, nia ekspedicio por kapti sklavojn estis sukcesa! Ili supreniras la vojon alkondukante pli ol kvindek norukojn? Bonege, ĉu ne?

– Bonege, ne, *mirinde!* – Vedd ne eltenis sin kaj replike ironiis, sed Ĵejŝen estis tiel feliĉa, ke li eĉ ne atentis. Siaflanke, Eriana paf-mortige rigardis Veddon per siaj fulmantaj okuloj.

– Ĉu ĉiuj estas kontentigitaj? – la lordo demandis.

Motokuo ankoraŭ plenigis la manojn per panetoj kaj ilin metis sur la bruston. Tio detiris la atenton de Eriana al Vedd. Ŝi ankaŭ lin riproĉe rigardis, sed li ne donis atenton al tio.

La norukoj rapide purigis la tablon, antaŭ ol la lordo ekkolerus kontraŭ iu el ili.

– Nun do, princo Renkiono, montru al mi la detruantaron de drakoj.

La maljunulo malfermegis la okulojn en la direkto de Renkiono.

Princo? Ĉu eble, princo?

La oldulo estis preskaŭ certa, ke neniu el la filoj de la reĝo nomiĝas Renkiono, kaj eĉ havas nigrajn harojn.

Renkiono frotis la manojn kaj malfermis du halt-pecojn ĉe la flankoj de la skatolo eligante klikajn sonojn, la solajn aŭdatajn tiumomente. Estis escepte silento kaj la okuloj de Ĵejŝen sajnigis, ke ili elsaltos for de la vizaĝo. Renkiono turnis la artikitan kovrilon, malrapide malkaŝante la tie kuŝantan glavon kun malhela klingo.

– Ho, ĝi estas belega! – Ĵejŝen levis la manojn al la buŝoj.

– La Vortumbra! A glavo, kiun Killeano uzis por mortigi la teruran Tarmagu'Orkanon. – Renkiono prezentis ĝin, kun fiksa okuloj, kvazaŭ li estus hipnotizita.

– Ĉu mi povas ekpreni ĝin? – la lordo frotis la fingrojn.

Renkiono malvolvis rubandon kiu ĉirkaŭis lian talion. Tre zorgeme li protektis la manojn por eltiri la glavon el la skatolo. Li etendis la brakojn kaj ĝin proksimigis al Ĵejŝen.

Nur tuŝu ĝin ne rekte – li instruis.

La lordo metis la manojn sub la falditan tukon kaj ĝin prenis, zorge ekzamenante ĝin.

Kio estas skribita sur ĝi? – demandis Eriana.

Tio estas poemo. La rimoj perdiĝis ĉe la traduko.

"Genuiĝu antaŭ la senfino

Petu pardonon al la patrino de l' viktimo

Ĉiam kiam vi la ponton trairos

Sur la abismo kiun ĝi fendos"

– Mirinda! Mirinda! – la lordo ĝojkriis de ravo. – Krom tio, ankaŭ konstati, ke la tutan tempon ĝi troviĝis ĉi tie, tiel proksime de mia domo. Mi opiniis, ke temis nur pri ia legendo, mi ĵuras ke jes!

– La tre antikvaj aferoj fine ŝajngas esti legendoj – Eriana konsentis.

Dankesprime, Ĵejŝen redonis la glavon al la princo.

Peti pardonon al la patrino de la viktimo... tio ŝajngas al mi ĝusta kaj saĝa. Sed kio diable signifas trairi ponton sur abismo? Tre stranga poeziaĵo por glava surskribo!

La interparolo inter Eriana kaj la lordo vekis la atenton de la oldulo, eltirante lin el liaj pensoj.

– Mi nepre devigas min akompani vin en la vizito al la markizo.

– Via ĝentileco faras al mi honoron, Lordo Ĵejŝen – Eriana ĝustigis la harojn.

– Bonege, mi zorgos pri la antaŭaranĝoj – li frotis siajn dikajn manojn.

- Lordo Ĵejŝen, rilate al la norukoj, ĉu la bonaj novaĵoj ŝanĝis vian opinion?
- ŝi levis la brovojn.

Jes, mi supozas, ke nun mi povos disponi du aŭ tri el ili.

Li ridetis kaj ili daŭrigis la interparolon, sed la oldulo restis malantaŭe, ne sciante kion fari. Renkiono jam estis elirinta ne rimarkite de la oldulo, kaj kiam la oldulo vidis sin sola kun Motokuo, li demandis.

- Ĉu Renkiono estas ja princo, aŭ tio estis nura dirmaniero?

- Mi ne estas certa, Aveto Vedd. Mi scias ke li kreskis ĉi tie en Kedpir.

- Ĉar li estas filo de Siro Gram, kiel do li povas esti princo?

- Demandu tion al li. Nun mi kuŝiĝos kaj iom ripozos. Mi tro manĝis! – Li malrapide levis sian dikan korpon.

- Sed la tago ĵus komenciĝis...

- Mi, sur via loko, ankaŭ ripozus. Morgaŭ ni ekiros frue.

La oldulo restis sola, sidanta kaj pripensanta ĉe la tablo. Li memoris sian patrinon, kiam ŝi lin konsiladis akcepti la realaĵojn de la vivo. Ĉio kio estis okazanta lin rememorigis pri la okazaĵoj dum lia junaĝo. Siavice la serĝento Sompir kutime konsilis al li la malon. Li memoris pri kiam ili estis meze de marŝado.

Neniam konformiĝu al la faktoj de la vivo, soldato! – Tio ne estis ia konsilo, sed ia admono.

- Kio estas malprava en tio?

Sompir ĉiam montris sin kolerema kaj ordonema. – Pensu alte! Kial vi denove ekloĝus en tiu mondfino, se vi tre facile povus aĉeti domon en la ĉefurbo? Jes, aĉeti domon en la ĉefurbo, ĝuste tion vi devas fari, soldato!

– Ĉu vere? – li neniam antaŭe pensis pri tiu ebleco.

– Se vi volas havi pli sekuran kaj pli bonan vivon, investu en propraĵo, ĉar kontraŭe, vi fine ĉiom elspezos por senvaloraĵoj.

Verdire, transdoni la monon de sia salajro al la patrino ne ŝajnis al li ia malsaĝaĵo. Li estis plenkonfida, ke ĝuste tion li devus fari. Sed li tiam ne sciis, ke lia patrino estus mortinta antaŭ la finiĝo de la milito.

Flanken lasante siajn rememorojn, la oldulo eliris el la manĝejo, reiris al sia dormoĉambro kaj komencis traesplori siajn posedaĵojn. Ĉio kio restis el lia iama vivo estis tie en la sako, du akrigaj iloj kaj kelkaj samcelaj ŝtonoj. Li pendigis ilin sur la ŝultroj kaj eliris serĉe de Dlup. Tio fine kondukis lin al la kuirejo kie li havis la plezuron akriĝi kaj reakriĝi kelkaj tranĉilojn.

– La mastro ekiros morgaŭ.

Mi nur volis reveni al mia hejmo, sed mi ĝin perdis – li melankolie replikis.

– Bedaŭrinde, mastro.

– Jes, mi estas laca. – li estis klinita kaj tenis la brakojn krucigitaj.

– Ripozu do, mastro.

– Ne temas pri la korpo. Mi estas laca de la vivo...

La norukoj en la kuirejo aŭdis tiujn vortojn kun atentaj okuloj. Ili eble estis penantaj kompreni, aŭ eble pro tio, ke ili same sin sentis tiaj.

– Ha, mi komprenas, sed estas eta genio interne de ni, kiu igas nin pluiri antaŭen, eĉ kiam ĉio ĉe ni estas en granda malordo.

– Ja vere, malbeninda genieto! Ĝi min pelas eĉ kiam mi jam ne havas kion fari.

– Eble la mastro havas tro altajn esperojn, malmulte esperi kunportas malpli da elreviĝo.

Tiam la olkuloj de la oldulo brilis.

– Ĉu vi scias kie mi povas havigi al mi pipron kaj tabakon?

– En la bazaro, mastro. Sur la placo, malsuprenirante laŭ la maldekstra strato.

– Dankon, Dlup, vi estas tre inteligenta noruko!

La malgrandetulo kuntiriĝis, hontigite, kaj la oldulo eliris animata de la ebleco provizi sin per tabako por toleri la vojaĝon. Iom fumi efektive estis io malgranda por lia deziro kaj sufiĉus dumtempe. Sed lia animstato neniiĝis en la korto de la gastejo. Li ĉeestis ion, kio kaŭzis al li fortan perturbon. Lordo Ĵejŝen furioze bategis la mallertan norukon.

– Senutila damnito! Vi ja neniam taŭgos por io! – Ĵejŝen atakis per sinsekvaj batoj la etulon tute kuntiritan sur la planko.

La oldulo sentis bedaŭron pri la malfeliĉa uleto kaj iris helpi lin.

– Bonvolu, Lorde Ĵejŝen – li kliniĝis – jam sufiĉas.

Ĵejŝen rigardis la oldulon kun malfermegitaj okuloj. La oldulo timis, ke li mem estos la tuj bategata, sed tiam, Ĵejŝen per forta spirado ekridegis.

– Tre bone, sinjoro mortiganto de drakoj! Tre bone. – Kaj li hasteme eliris reirante al la gastejo.

La malgranda noruko prenis lin je la rando de la pantalono.

– *Dank'mi'mastro!* Klapuo dankas!

La oldulo helpis lin stariĝi. Li estis plena je hematomoj kaj sangis.

– Mi tre bedaŭras ke la aferoj tiel estas al vi, etuleto.

7 — La karavano

La oldulo malsupreniris la monton sentante sin pli kontenta kaj malpeza ol kiam li supreniris. Ekkoni Gin'ujion estis io vere mirinda, precipe la malstreĉiga bano kaj kelkaj paroloj, kiujn li interŝanĝis kun la saĝa Dlup en la gastejo.

Alia afero, kiu pli trankviligis lin, estis lia interparolo kun Eriana en la vespero antaŭa al la foriro. Estis malfrue, kaj li ne sukcesis dormi. Li promenis ĝuante la noktan komencon, fumante sian novan pipon kaj esplorante la stratojn de la urbo ĉe la duobla lumo de la du plenlunoj. Unu estis rozkolora kaj plena de makuloj, kaj la alia, blua kaj plata. Tiam li aŭdis ploron, proksime de tiu malnova maŭzoleo. Eriana sidis sur la ŝtupoj, kun mallevita kapo, apogante la brakojn sur la genuoj kaj la frunton sur la krucigitaj antaŭbrakoj. Vedd alproksimiĝis malrapide kaj diris.

– Hej, ĉu vi fartas bone?

Ŝi levis la rigardon kaj ekscitiĝe grumblis – Ĉu ŝajnas al vi ke mi bonfartas?

– Mi pardonpetas, mi ne volis ĝeni... – Vedd duonturnis sin kaj ekforiris.

Eriana, farante al si klopodon por kontroli sian sufokitan voĉon, diris – Atendu! Mi ne volis esti kruda. Bonvole, sidiĝu ĉi tie. Faru akompanion al mi.

Vedd sidiĝis je du spanoj apud ŝi, sentis la ŝtonajn ŝtupojn ankoraŭ varmetajn pro la sunradiado. Li restis silenta kaj tiam proponis al ŝi la pipon.

– Ĉu vi iom volas?

Je lia surprizo, ŝi akceptis. Ŝi fumis, tuis, snufis, denove fumis, ĉio en silento.

– Ĝi estas bela vespero – komentis Vedd – ĉu vi jam rimarkis, ke kiam la lunoj estas tiele malproksimaj – li fingromontris al unu en la alto kaj al la alia, pli mallaltala –, tio naskas duoblajn ombrojn?

– Por diri la veron, sinjoro Mol'empro, mi neniam antaŭe pensis pri tio.

– Vi scias, ke vi povas nomi min Vedd.

– Mi emas esti tre formala, mi scias pri tio.

– Mi vidas en tio admirindan econ. Senkulpigu mian trokuraĝon, sed mi opinias vin admireginda.

– Ŝi ridis pri tio... – Fakte... mi estas admireginda por malsukcesi, jes, vi pravas.

– Ĉu vi ne estas tro postulema al vi mem?

– Ne... Ne kiam oni havas tiom da mortoj en la konscienco. La falo de Tedriso... Ĉio ĉi estas mia kulpo!

– Kiamaniere, vi estis tie, provante savi la urbon. Vi savis mian vivon!

– Vi pravas, sed tio estis malfruaj agoj. La problemo estas la persono, kiu kaŭzis ĉion ĉi. Mi pli ol unufoje havis la ŝancon lin bari, detruigi la malbonon ĉe ĝia radiko.

– Nu... mi scias tian aferon pri malsukceso. Dum la milito de la kuneoj, mi plurfoje malsukcesis kaj vidis kunulojn morti pro tio. Poste, ĉe la zorgado de miaj infanoj, mi denove malsukcesis. – la voĉo de Vedd iom tremis, li kontrolis sin por eviti ekploron – mi devus esti malpermesinta mian filon iri ĉasi drakojn, sed verdire mi lin stimulis. Poste li neniam plu revenis.

Li sentis ŝian manon tuŝi lian ŝultron kaj kelkaj fajreroj elŝprucis el tie. – Vi ne devas rememori tiajn okazaĵojn. – ŝi diris.

– Kurioze... ĝi estas bona konsilo! Ankaŭ vi devus sperti ĝin.

Ŝi ridis pri tio. – Laŭŝajne mi lasis min estis stulta. Verdire, se iu devus esti kulpigita, tiu ne estas mi. Mi tiomfoje atentigis la konsilion pri li. Tamen, ĉu ili donis atenton al mi? Ne! Kaj nun jen tio! Nur restas riski ian ŝanĉon, preskaŭ ian frenezaĵon... Ĉar mi ne povis malebligi tion antaŭe, nun tio ŝajnas tute neebla.

– Ĉu vi parolas pri tiu Le'Daman?

– Kiu aludis al vi pri tiu nomo? – ŝi tiris la manon de sur lia ŝultro malfermegante la okulojn.

Vedd malsuprentiris la ŝultrojn – Motokuo.

– Ha, tiu klaĉema hiaravano!

– Kial tiomgranda sekreto pri tiu persono?

– Nu, mi ne povas paroli plu pri tiu afero. Tio estas sub sekreto en mia ordeno. Mi tre bedaŭras.

– Ĉio en ordo.

Ĉu tiu Le'Daman povus estis lernanto de la maljuna Jomuo?

Vedd tuj memoris la verdan fajron, kaj li tuŝis la cikatron sur la brako. Tiu fuŝaĵo doloris al li pro simpla rememoro. La demono el ostoj. Tiu terura nigra falĉilo. Tiu tago kiam la juna guldo savis lian vivon.

– Dum la milito kontraŭ la kuneoj, mi ekkonis junan guldon nomatan Daman.

Eriana rigardis lin kunpremante la lipojn. – Mi estas certa ke ni parolas pri la sama persono! – ŝi asertis kaj ekstaris.

Ankaŭ Vedd stariĝis, komprenante ke estis neniam eblo pritrakti tiun aferon.

– Ĉu mi povas akompani vin al la gastejo?

– Jes, kompreneble.

La du silente marŝis flanko ĉe flanko. Kiam ili alvenis kaj ĉiu ekiris al sia ĉambro, Eriana tuŝis Veddon ĉe la ŝultroj kaj lin fikse rigardis, je distanco tre malkonforta al li.

– Dankon, pro akompano al mi, Vedd. Nia interparolo altigis mian spiriton.
– kaj tiam ŝi tre apudiĝis al li, kisis lian vangon kaj tre proksime de li diris – bonan nokton.

Vedd tie restis, iom haltstara, stultmiena. Tiu kisetado ŝajne disŝovis tra lia tuta korpo ian elektran fluon, kiun li jam de longe ne sentis. Ĉu tio estis ŝia magio? Aŭ propre ia sento lia? Li restis senmova kaj konfuza, vidante ŝin iri al la dormoĉambro, kaj tiam li sukcesis respondi.

– Bonan nokton, Eriana.

La oldulo tuŝis la vangon sur la punkto kie ŝi lin kisis. Li ankoraŭ sentis sur ĝi iaspecan jukadon. Li malpeze kaj kontente paŝadis volante porti nenian ekstran pezon krom sia traŝultra sako kun siaj posedaĵoj. La tuta pezo estis en du grandaj tornistroj sur la dorsoj de du sklavo, kiujn Eriana aĉetis de Lordo Ĵejŝen.

Snuto estis parenceto de Dlup. Li estis pli alta noruko, kutiminta al manlaboroj. Li estis tre serena kaj obeema. La alia estis Klapuo, la mallerta tolaĵisto kiu trinkis la urinon de la oldulo. Tiu sama, kiun Ĵejŝen bategis.

Kiam ili adiaŭis sin, Dlup diris al la oldulo – Lordo Ĵejŝen estas tre kontenta liberigi sin je Klapuo. La malfeliĉuleto estas aparte bedaŭrinda eĉ por iu noruko.

– Klapuo estas fakte iel stranga. – konsentis Vedd.

– Sed bonvole, mastro, havu kompaton kaj bone zorgu pri li!

– Mi faros tion, Dlupo. Mi dankas al vi pro la konsiloj. Vi havas neatenditan saĝon ĉe iu kun via staturo.

– Estas mi, kiu dankas al vi, ĉar vi donis atenton al maljuna noruko kia mi.

– Ĉu vi estas maljuna? Mi ne rimarkis.

– Ho jes, mia mastro, ni, norukoj, ne maljuniĝas samaniere kiel la homoj. Sufiĉas rigardi la koloron de miaj ungoj, ili estas oranĝaj, ĉu vi vidas?

– *Ja stranga afero! Tiuj norukoj estas iaj bizaraj hometoj!*

Vedd ridetis al Dlup kaj li observis – Liaj dentoj tamen ne estas similaj al dentoj de maljunulo,

– Fakte ne estas! Mi ilin fiksigis en la pasinta jaro. Tio multe kostis al mi!

Dlup diskrete ridis kaj tiam li mansignis, adiaŭante Veddon.

Vedd daŭre meditis pri Dlup dum li malsurpeniris la monton. Stranga ulo, sed eksterordinara.

Bedaŭrinde mi neniam plu havos la ŝancon konversacii kun li.

Ili estis distancaj je tri tagoj de Gin'uĵio kaj la malsuprenirado de la monto estis multe pli facila ol la suprenirado. Ĉe tiu punkto, Eriana jam havis nenian paciencon al Klapuo, sed la oldulo venis defende al li, helpante lin

leviĝi kaj preni la objektojn de li faligitajn kaj same rilate la aliajn misfaraĵojn. Klapu tuj korinkliniĝis al la oldulo kaj klopodis plej bone helpi lin ĉe la preparo de la manĝoj.

Io rompis la monotonecon de la vojaĝo. Estis granda moviĝado sur la vojo, antaŭe. Pluraj ĉaroj tirataj de muskutoj. Tio estis bova specio forte muskola kaj granda, kun ruĝetaj haroj abundaj sur la kapo, nuko kaj parte sur la lumbo. La kornoj estis mallongaj kaj malhelaj, samkoloraj al tiu de ĝiaj fortikaj hufoj. La estro de la karavano ĝin haltigis por interparolo kun la grupo de Eriana. Li estis alta kaj forta ulo portanta misaranĝitajn pecojn de armaĵo. Li havis similecon kun la salajruloj, kiujn la reĝo Joorg dungis por helpbatali en la milito kontraŭ la kuneoj, kiam la situacio fariĝis tre malbona.

De pli proksime la oldulo rimarkis, ke kelkaj el la ĉaroj estis plenaj je norukoj katenigitaj. Ili supozeble rilatis al la ĉasistoj, kiujn Lordo Ĵejŝen menciis dum matenmaĝo. Eriana kaj Renkiono interparolis kun la homoj dum la oldulo vidis Klapuon alproksimiĝi al unu el la ĉaroj kun katenitoj kaj paroli ion en ilia lingvo. La oldulo observadis la katenitajn norukojn.

Sankta Gideso, havu kompaton al tiuj mizeraj estuletoj. Nia krueleco estas ja senlima... Kia bela raso ni estas!

Tiumomente komenciĝis agitiĝado, krioj. La oldulo ne komprenis tion, kio estis okazanta, ĝis li vidis pluvon da sagoj falantaj sur la karavanon. Li aŭdis Renkionon aflikte krei.

– Eriana!

Kiam la oldulo rigardis malanataŭen, li vidis la sorĉistinon falintan surtere kun sago enigita en ŝian kolon, kaj sangon akumuligantan sur la grundo. Renkiono genuiĝis ĉe ŝia flanko ne sciante kion fari, dum homoj eliradis el la ĉaroj sin preparantaj por la batalo.

Sur la rokoj, tuj supre de la dekstra flanko de la vojo, ekaperis dekoj da strangaj batalantoj, kiujn la oldulo ne sukcesis identigi. Renkiono stariĝis, elingigis sian glavon kaj ordonis.

– Zorgu ŝin, Aveto!

– Larmoj fluis sur la vizaĝo de la sorĉistino, ŝi penis paroli kun sango elŝaŭmanta el ŝia buŝo. La oldulo pli proksimiĝis al ŝi provante ŝin aŭdi.

– Help... Renk... ...iri... Ĵafon.

La oldulo tenere tuŝis ŝin. Li memoris la tagon, kiam lia edzino mortis. Ŝi estis febra kaj malforta, kaj murmuris sencencajn vortojn. Veddo observis la sangon facile fluantan. La vundo de Eriana estis mortiga. Li estis lerninta rekoni tiajn aferojn dum la milito.

– Glav... la gla... vo... Iru... Le. Leda... man. Le'Daman.

Tio estis la lastaj vortoj, kiujn ŝi sukcesis diri antaŭ ol morti kun vitrecaj okuloj fikse rigardantaj la oldulon. Kaj tiam, li sentis tiun tutan elektron elradiantan el ŝi, hirtigantan al li la harojn de la brakoj kaj de la nuko. Li ekvidis dancantajn fajrerojn eliri el ŝia korpo kaj penetri la teron. Kelkaj trafis lin. Li restis kvazaŭ hipnotigita observante ŝin morti, kaj ne plu perceptis ian ajn sonon aŭ vidaĵon de la sanga batalo okazanta ĉirkaŭ li. Ŝia haŭto faltiĝis tielsame kiel sekpruno kaj ŝia vizaĝo maljuniĝis, kiel de iu centjara persono.

La oldulo flanken rigardis kaj vidis ke Motokuo estas faligata de unu el tiuj kreitaĵoj. Ia nehoma estulo, kiun la oldulo ne konis. Tiu havis grizan kaj muskolecan korpegon, tiel altan kiel tiu de Motokuo, ruĝajn harojn kaj flavajn okulojn. La estulo surdorse portis tornistron, en kiu estis ligita noruko. Li rimarkis, kiam la noruko montris al li katapulton kaj forte streĉis la ŝnuron. Tuj sekve la oldulo sentis fortan baton sur la frunton kaj lia vidado laŭgrade malklariĝis dum malgrandaj lumaj strekoj kruciĝis de unu

flanko al alia. Li sentis la malglatan teksturon de la survojaj ŝtonetoj kaj tero kontraŭ sia vango kaj tiam li fine svenis.

Ĉio estis malluma kaj malvarma. Li sentis teruran kapdoloron. Li provis levi la manon al la frunto, sed li ne sukecesis. Tiam li sentis, ke io forte premis liajn manradikojn. Io peza. Lia mondo skuiĝis. Haladza odoro de urino kaj fekaĵo igis lin pensi, ke li eble estus en Tedriso.

Li aŭdis voĉojn, sed li komprenis eĉ ne unu vorton el tio dirita.

Ĉu tia estas la morto? Tiel fiadora?

Li sukecis malfermi unu el la okuloj, la alian li ne provis malfermi, ĉar ĝi estis kovrita de ia glueca substanco. Li rigardis la profundan ĉielon. Estis malmultaj steloj. Li turnis la okulon kaj rimarkis ke la ĉielo estis pli hela laŭ alia direkto. Tio povus esti la krepusko, aŭ ĉu tio estus aŭroro? Li vidis sangantan kruron unufanke kaj ĉenon sur ĝi. Tiam li eksciis, ke li estis kuŝanta en ĉaro.

Mia veziko krevos! Kia aĉe!

Hej! Mi bezonas urini. – li diris senenergie.

Neniu respondis.

– Hej! Mi bezonas urini. – li pliforte uzis la pulmojn por sukcesi kribi.

Responde, baston-bato falis sur lian kapon. Ne tiom forta, ke li svenu, sed sufiĉe forta por eltiri al li larmojn. Li ekvidis la senbrilajn konturojn de iu noruko. Tiu surkape portis rondan kaskon preme kunligitan ĉirkaŭhaŭte per ledaj rubandoj. Li superŝutis la oldulon per sakraĵoj.

La oldulo veis bedaŭre sentante ke lia veziko tuj baldaŭ krevos. Unue eliĝis guto.

– Ne, ne... li mallaŭte murmuris.

Post tio, pluraj gutoj. Tiam li sentis, ke varmiĝas lia vestaĵo. La urino elfluis sur liaj kruroj kaj surdorse, malsekigante lian veston. La oldulo ploris pro sia malfeliĉo. Tiu varmiĝo surhaŭta estis ne tute malbona sensacio, sed ĝi tuj malaperis, anstataŭita de glueca frosto-sensacio, el kiu li ne sukcesis liberiĝi.

Venis al li memoro pri Fiste. Li jam de longe ne pensis pri diaĵo. Kial vi ne pafis sagon kontraŭ min, kruela diino? Kaj li priploris la morton de Eriana. La larmoj helpis dissolviĝi la gluaĵo sur la alia okulo, kaj nun per ambaŭ okuloj li iom pli bone vidis kie li troviĝas.

Ĝi ja estis ĉaro. Li duonlevis la kapon kaj vidis aliajn kunestantajn katenitojn, sed ne eblis al li rekonigi Motokuon aŭ Renkionon inter ili.

La malvarmo, la humideco kaj la fetoro estis tre fortaj, sed la malsato tuj venis por akompani lin. Liaj pensoj vagis. Li memoris pri la tempo, kiam lia edzino estis juna, kiam liaj filoj estis knabaj, kaj li tiel forte sopiris, ke tio doloris al li.

Li ploris.

De longa tempo li ne ploris pro malnovaj memoroj. Pli ol neniam antaŭe li volis morti. Se li havus sorton, la morto tuj venus. Sufiĉus ne plu manĝi. Poste, kiam revenis la nokto kaj li lacege kaptiĝis de ekdormo, li sentis la tuŝon de varmaj manoj sur si.

– Manĝu, *manĝ'mi'mastro*.

Li sentis la enŝoviĝon de panpeco en sian buŝon. Malgraŭ ke li deziras la morton, la malsato malpermesis lin sindoni al fasto. Li akceptis la panon donitan de Klapuo.

– Trinku, *trink'mi'mastro*.

Li akceptis la akvon kiu refreŝigis lian gorĝon.

– Klapuo? Kio okazas?

La *atak'de'l* patrinoj *mi,mastro*.

– Patrinoj?

– Patrinoj *d'mult'tribo'kuna*.

– Kio? Parolu malrapide, Klapuo!

– La triboj... kunaj. – li malrapide flustris.

– Ĉu ili dungis salajrulojn? Kiu estis tiuj grandeguloj?

– *Grand'ego? Mi'mastro?*

– La batalantoj!

La malgranda Klapuo ne komprenis kaj ektimis pro ia grunteca sono venanta rekte al ili.

Li mallaŭte kaj haste diris – *Pardon'mi'mastro. Post'revenas.*

La oldulo restis pripensante. Li havis nenian komprenon pri tio, kion Klapuo provis diri. Kuniĝintaj triboj? Laceco revenis kaj li ekdormis.

8 – La norukaj patrinoj

Post dutaga vojirado, ili alvenis al la tribo de la norukoj. Oni necesis propraokule vidi por fine kompreni kio okazis. El la kaĝo li vidis norukan femalon, grandegan, tenantan entuton da malgrandaj grizpalaj norukoj ligitaj al ŝia korpo kaj suĉantaj ok parojn da mamoj. La femaloj estis duoble pli altaj ol la maskloj, eble trioble.

Unu el la norukaj militistinoj elpelis Veddon el la ĉaro kvazaŭ li estus infano. Li timigite rigardis tiun grandegan femalon, kies fortikaj grizaj brakoj havis dikecon pli grandan ol ŝia kapo. Ŝi havis specon de nazego kunligita al la buŝo kun paroj da kaninoj pli elstaraj ol tiuj de la virseksuloj. Larĝaj led-rubandoj estis ligitaj al ŝia ampleksa torako kaj la nudaj piedoj montris fenditajn ungojn, longajn kaj timigajn. La verdaj okuloj estis plenaj de kolero.

La ĉenoj estis forprenitaj sen ia ajn delikateco. Li kaj la ceteraj viroj ne havis sufiĉan forton por kontraŭreagi, nek por fuĝi. Ili estis kondukataj al la lignaj kaĝegoj kie multaj je la unua fojo havis ion por manĝi.

Vedd apenaŭ rekonis la figuron de Renkiono inter la arestitoj. Li estis trenanta sin, tute ŝvelinta de la klopodo alliri al la kanaletoj kiu enhavis kotan akvon. La oldulo preskaŭ ne havis fortojn por lin helpi.

– Aveto... – lia voĉo eliĝis raŭka antaŭ ol li trinkis iom da akvo.

Post tio, Renkiono dorse apogiĝis sur la kaĝa bordo kaj ekrigardis la oldulon. La vizaĝo de la militisto estis tute aliŝanĝita kaj ŝveliĝinta. Kiam li denove parolis, la oldulo rimarkis ke mankis al li kelkaj dentoj.

– Malbenindaj norukoj! – li kraĉis sur la grundon.

– Mi pensas, ke venis al ni la horo por repago – la oldulo filozofis.

– Repago? – Renkiono elmontris esprimon de iu havanta neniun ideon pri tio kion li diris.

– Ne zorgu. Nun mi almenaŭ scias kie mi mortos.

– Neniel, Aveto. Ni iamaniere eskapos de tiuj brutaj norukoj. – Renkiono decideme levis la kapon.

Ne ĉiuj norukoj estas brutaj, mia amiko... La homoj plurfoje estas tre arogantaj estuloj.

– Renkiono, kvietiĝu, ĉu bone? Eriana mortis... Kaj mi nenie vidis Motokuon.

Ombro okupis la vizaĝon de Renkiono.

– Ne havu esperon ie vidi Motokuon, Aveto. Li mortis brave luktante! Nur ni du restas nun...

– *Tamen... laŭŝajne ne dum longa tempo...*

– Ĉu vi estas certa, ke Eriana mortis, Aveto Vedd? Ŝi estis tre potenca, eble...

– Mi estas certa... Ĉu jam vidis sorĉiston morti? Tio estas io stranga kaj ne lasas dubon, mi asertas al vi.

Renkiono mallevis la kapon kaj fermis la mienon per kolera esprimo. Vedd ekvidis, ke liaj oreloj fariĝis intense ruĝaj. Li observis lin mallaŭte plorsingulti dum siajn pojnajn li premis unu kontraŭ la alia.

Vedd grimacis kiam li levis la manojn al la frunto kaj ĝin ektuŝis sur la loko kien ŝtono lin trafis. Li ekvolis havi spegulon por vidi la aspekton de la vundo. Ĝi ankoraŭ estis ŝvelinta kaj doloranta. Li rigardis ĉirkaŭen, plu sentante neniun stimulon paroli pri io ajn al Renkiono.

La vilaĝo de la norukoj troviĝis en mallarĝa valo elkavigita de antikva rivero jam estingiĝinta antaŭ eraoj. Ĝi ambaŭflanke havis altajn eskarpojn kaj ĝiaj elirejoj estis garditaj de grandegaj militistinoj.

Al ni ne estas la plej malgranda ŝanĉo eskapi de ĉi tie. Ĉi tiu estos ja mia mortlito.

Dum la nokto li vidis la norukojn kunveni ĉirkaŭ granda fajro. Du femaloj aparte fortaj laŭte parolis farante multajn gestojn kaj movante la krurojn kvazaŭ ili estus tuj dancontaj. La oldulo komprenis nenion diritan de ili.

Unu el ili ektiris glavon de ĉetalia zono. La klingo brilis kontraŭ la flamoj. La oldulo rekonis ĝian apartan formaton, ĝi estis la Vortumbra. Li volis eldiri tion al Renkiono, sed tiu estis svene dormanta kaj ronkanta.

La oldulo ne komprenis kion ŝi diris, sed li vidis ŝin direkti la glavon al la kaĝoj kaj diri kelkajn sufiĉe kolerajn vortojn.

Kiam tiu manifestacio finiĝis, la oldulo ricevis la viziton de Klapuo. Li kunportis kelke da sekaj fruktoj kaj botelon da vino ŝtele prenitajn.

– *Trink'manĝu mi'mastro.*

– Dankon, Klapuo. – la oldulo plezure maĉis la sekfruktojn kaj ilin malsekigis per engluto de vino.

– Patrino Gtu estas *mult'furioza*... Klapuo penis paroli malrapide.

– Ŝi volas vidi nin mortintajn, laŭ tio kion mi povis kompreni.

– *Ŝi vol'servi bankedon per'mastroj.*

La eblo fariĝi manĝaĵo por noruko renversis la stomakon de Vedd.

– Sed Patrino Dao ne volas. Patrino Dao *vol'uz'la'mastroj* en milito.

Ankaŭ tiu estis neniel bona ebleco. Li tuj forpuŝis de si la naŭzon kaj daŭrigis la manĝadon.

– Hej, donu iomenton al mi, oldulo – petis Hunan, unu el la kunuloj el sama ĉelo. Vedd pasigis la botelon kaj kelkajn fruktojn al la malsatega viro.

Klapuo plu parolis.

– Utma'duba *ordon'la* tribojn kunveni por milito. Patrino Gtu diris *k'estas* horo doni finon *al'omoj*, sed Dao *vol'igil'omojn* sklavoĵ.

– Kiu estas Utma...

– Utma'duba estas la Granda Patrino de la Rokoj.

La oldulo skuis la ŝultrojn. Tio kaj plejparto el la informoj de Klapuo ne estis klaraj.

Kia kraĉaĵo! La regno pli kaj pli suferas la pereigan minacon de la drakoj, kiuj ĉion detruas. Kaj nun mi aldone frontas tian situacion. Esti manĝata aŭ trud-uzata en milito! Kian utilecon povas propre havi mi en milito?

9 – Estante utila al la patrinoj

Bonŝance al Vedd, al Renkiono kaj al la aliaj arestitoj, la argumento de Patrino Dao superregis malprofite por tiu de Patrino Gtu. Tiam ili devige laboris dum la tuta tago. La piedoj de Vedd estis skrap-vunditaj kaj lia dorso ardis dolore.

Sankta Gideso! Pli bone fariĝus al mi nun se mi estus en la stomako de iu noruko.

La oldulo stumblis faligante la korbon kun ŝtonoj. Ulino aparte kruela skurĝis liajn krurojn kaj brakojn. El la ruĝmakulaj vundoj elfluetis iom da sango.

– *Sta'iĝu! Sta'iĝu!* – la femalo sciis paroli elementan Ked-lingvon.

Hunan, la kruda sklavisto kun kiu la oldulo dividis parton de la ekstra manĝaĵo ordinare donita de Klapuo, helpis lin stariĝi. Feliĉe por Vedd mankis nur unu horo antaŭ la fino de la taglaboro.

– *La lasta horo estas ĉiam la plej malbona! Malbenaj!*

La vizito de Klapuo tiun vesperon plorigis la oldulon. Tiom da suferado dum kelke da tagoj sufiĉis por ke ia bonfaro al li estus dia donaco. Tiu kunportis unu el tiuj amaraj folioj por ke li ilin maĉu.

– kraĉu la maĉaĵon sur la vundon – Klapuo lin instruis, sed la oldulo ne emis fari tion.

Klapuo maĉis mem la foliojn kaj ilin pasigis sur la vundoj, kaŭzante ioman ardigon. Vedd apenaŭ havis fortojn por mallaŭte plori dum li ricevis la zorgojn.

– Vi fartos pli bone. – Klapuo promesis.

La oldulo ekdormis en tiu sama stato, kun la kapo pendanta antaŭen. Je lia bonsorto, en la sekva tago ili ne estis vokitaj al la laboro.

Li havis bonan sonĝon, en kiu liaj infanoj ludis sur la korto de lia hejmo, en la loko kie li estonte starigus la tenejon de la Han'ĵakuloj.

Vedd vekigis kaj rimarkis, ke la suno estis pli alta. Li sentis la dolorojn de la korpo, la premon ĉe la veziko kaj denove mergigis en tiun realan terursonĝon. Ĉiuj liaj enkaĝigitaj kunuloj estis gluitaj al la kradoj observante la eksteran ekscitiĝon.

Aliaj triboj estis alvenantaj. Pli da homoj estis kondukataj kiel kaptitoj, en granda kvanto. Okazis renkontiĝo de norukaj patrinoj en la maldensejo kie oni ĉiunokte ekflamigis brul-lignaron.

la enkaĝigitaj kunuloj komencis murmuri vortojn ĉe rekonado. La novaj arestitoj estis loĝantoj el Gin'uĵio. Kelkaj enkarcerigitaj, kiuj antaŭe nutris en la grupo la lumon de la espero, falis en malesperon. Ili diradis ke la militistaro de Gin'uĵio tuj venos por savi ilin, sed tie estis centoj da homoj venintaj el la urbo. Viroj, virinoj, infanoj kaj kune kun ili miloj da norukoj ĵus-liberigitaj. Gin'uĵio estis falinta.

La oldulo rekonis la kriantan voĉon de la Lordo Ĵejŝen, nekonformiĝintan.

– Mi ordonas al vi liberigi min dum ankoraŭ estas tempo por ekhavi la pardonan kompaton de la reĝo, vi, pestuloj!

– Pluraj ĵus-liberigitaj norukoj iris paroli en sia propra lingvo kun la kuniĝintaj gvidistinoj.

Ĵejŝenon, malgraŭ lia dikpezo, facile levis en la aero Patrino Gtu. Ŝi deŝiris liajn vestojn, lasante lin nuda antaŭ ĉiuj. Spite lian vanan furioziĝon, kun akriĝitaj ungoj Gtu fortiris la buletojn de Lordo Ĵejŝen. Ŝi metis la sangantajn veziketojn en la buŝon kaj ilin englutis. La akuta kaj agonianta krio de la nobelo eĥis tra la intermontoj. Ondo da kunfestado sin sekvis, precipe inter la ĵus-liberigitaj norukoj.

– Gtha! Gtha! – Patrino Gtu kriis.

Maskla noruka tribano alpaŝis portanta fajro-ekscitilon kun braĝa pinto. Ĵejŝen baraktis sur la tero, sed li estis kaptita de kelkaj norukoj kaj unu el ili kaŭterizis la vundon per la inkandeska pinto. La viro ankoraŭfoje blekis antaŭ ol sveni.

Vedd restis terurita.

*Li estis krudulo, sed li ne meritis tian maljustaĵon! Fiste min protektu!
Protektu nin ĉiujn kontraŭ tiel terura destino!*

Oni kastris norukajn virojn en Gin'ujio kaj li konkludis ke tio eble estus venĝo. Tio ŝajnis al li malbona aŭguro. Liaj vundoj pulsas kaj li havis la antaŭsenton, ke malplejbonaj aferoj ankoraŭ postsekvos.

Kiel ili donos manĝon al tiom da arestitoj?

Li tute bedaŭris la centojn da konsternitaj virinoj kaj infanoj kiuj ŝajne jam ne havis fortojn por plori.

Tiun vesperon li ricevis duoblan viziton. Klapuo kaj Dlup venis.

Klapuo donis al li kelke da sekfruktoj.

– Hodiaŭ *est'iom'et mi'mastro*.

Dankon, Klapuo.

– Situacio ne facila, ĉu ne, mia mastro? – diris Dlup, nun surhavanta ledajn kaj felajn vestaĵojn, tipan veston de l' sovaĝaj norukoj.

La oldulo ne rekonis lin sen la vestoj de sklavo, sed memoris lian voĉon.

– Dlup?

La sperta noruko ridetis.

– Ha, vi ankoraŭ memoras mian nomon.

– Kiel vi fartas nun, estante libera? – la oldulo demandis.

Libera? Mi ne scias, ĉu mi kapablas taksi kio estas tio, mia mastro. Antaŭe mi estis devigata servi Lordon Ĵejŝen, nun mi estas devigata servi Patrion Tula. Ŝi ne estas malpli kruela ol Ĵejŝen, bedaŭrinde.

– Finfine, kio diable okazas? Mi provis demandi tion al Klapuo, sed mi opinias, ke li ne bone komprenas kio okazas.

Dlup ŝanĝis la parolon – La bona Klapuo bone zorgas pri vi, ĉu ne?

– Jes, mi supozas, ke sen lia helpo, mi jam estus mortinta.

– Bone, kiam li diris al mi pri vi kaj pri tio kion vi estas faranta, mi eltrovis ke vi povas esti pli utila al la triboj ol en ŝarĝlaborado. Kion vi diras pri tio, labori kun mi en la farado de armiloj akriĝante la klingojn?

La oldulo sentis sin tre bonŝanca kaj esperplena. Li povus eskapi de tiu infera afero porti ŝtonojn kaj esti batata de tiu figrandegulino.

– Jes, ajnhore!

– Bonege, mi provos konvinki Patrinon Tula, aŭ same Patrinon Gtu.

Mi restos danka.

– Mi devas iri... laŭŝajne la triboj baldaŭ marŝos. Estas multe da farotaj laboroj.

Vedd ne esperis, ke ili tiel frue eliros el tie. Sed, post du tagoj ili jam estis marŝantaj for de la intermontejoj. Multaj viroj kaj infanoj ne eltenis la marŝadon kaj pereis.

Tiuodoro de rostita viando ekaperis en la unua vespero de la kampado, stimulantecel la oldulo la deziron manĝi, sed tiam li vidis kelkajn prizonulojn vomis. Li tuj komprenis la kialon. Li vidis unu norukan patrinon elpreni homan antaŭbrakon per la mano kaj fingroj kaj mordi kvazaŭ ĝi estus viandaĵo el Han'jakuo. La norukoj estis rostantaj kelkajn homojn kaj okazigantaj bankedon. Li ne vomis, sed restis naŭzita ĝis li lacekonsumite falis en dormadon.

Post kelke da tagoj, ili faris tendumadon en arbaro. Ĉu ĝi estus la arbaro de Haŝan? Ĉu ili estus en la ĉirkaŭaĵoj de Tedriso? Vedd ne sukcesis scii.

Tie la homoj estis devigataj labori kune kun la norukoj faligante kaj segante grandan kvanton da ligno. Ili dum kelkaj tagoj ellaboris sagojn, pikilojn kaj lancojn. La oldulo kunkolektis lignon kaj preparis la kinglojn kiuj estis fiksitaj cel la pikilojn kaj lancojn.

– Tiuj fiuloj preparas sin por milito – diris Renkiono mallaŭte kaj amare.

– Jes... kaj ni ilin helpas. – la oldulo deviŝis la ŝviton de sia frunto kaj surdorsigis branĉofaskon por tuja farado de pliaj lancoj.

– Niaj guldoj frakasos tiujn bedaŭrindulojn, Aveto. Vi povas noti tion! La militisto kolereme replikis.

La superregantino gruntis pri io kaj alproksimiĝis al ili. Vedde malvigle kuntrenis la piedojn, ĉar la ununura afero lin motivanta sekvi antaŭen estis eviti skurgadon fare de tiu norukino lin kolere rigardanta.

Renkiono estas juna kaj ankoraŭ havas esperojn. Tiu tempo jam pasis al mi.

La tagoj estis laborplenaj kaj tio estis ia beno, utila al la impresoj ke la tempo pasas pli rapide. La noktoj estis malvarmaj, trudante al la malliberuloj kunamasiĝe dormi por ke ili duonvarmiĝu. Dlup venis en unu el tiuj noktoj aparte frostaj.

– Kiel vi fartas hodiaŭ, mia mastro? – lia elspiraĵo fariĝis videbla kontraŭ la lumo de la malproksimaj fajroj.

– Ordinare laca.

– Hieraŭ ni prikantis la antikvajn profetaĵojn – Dlup diris.

– Vere? Kaj kion ili diras?

– La profeto Jutt antaŭvidis la reaperon de la drakoj. Kaj tio simbolas la finon de la erao de la homoj.

Jam estas tempo.

– En la malproksima antikveco, nia popolo estis libera! Ĝi estis la plej potenca inter ĉiuj. Tiam ni estis timigataj de la homoj. Nia lando estis respektata. Sed ĉio ĉi pereis kiam la homoj sin vendis al la demonoj interŝanĝe de la povoj de l' sorĉarto. Tiu glora erao alvenis al sia fino.

– Mi konfesas, ke mi ne bone konas historion... Laŭ mi, la regno povus ja ekzisti ekde ĉiam... Sed plibone pensante. Ĉio komenciĝas iun tagon, ĉu ne?

– Jes, mastro. Kaj ankaŭ estas tago por finiĝo de ĉio.

La etulo proponis al li malgrandan ladbotelon kun malfajna brando produktita de la norukoj. Dlup foriris lasante Veddon, kiu momente restis enpensiga. Li trinkis per kelkaj glutoj la trinkaĵon kaj iom ektusis.

– Kaj tiu arda urino? Donu iometon al mi, Vedd – petis Hunan.

Vedd pasigis la botelon al la viro kaj tuj post venkis lin lacegeco kaj li ekormis.

Post kelkaj tagoj, kiam estis finpreparitaj la batalilaro de la norukoj, Dlup konvinkis Patrino Gtu trejni la oldulon, Renkionon kaj kelkajn aliajn homojn speciale elektitajn, por ke ili fariĝu lancistoj.

Vedd rezistis al la ideo, li ne volis rekte apogi la patrinojn en la milito kontraŭ sia popolo.

– Komprenu, mia mastro. Utili al la patrinoj estas plibone al vi ĉiuj. Se vi rifuzos, vi certe frontos pli kruelan destinton.

Post tiu diro, la oldulo akceptis. Li ne volis bildigi al si la specon de kruela destino, kiu povus trafi lin.

En tiu nokto, iu nova noruk-patrino kunvenis kun la ceteraj en la loko kie ili ekbruligis lignofajron. Tiu estis pli malalta, ĝibohava, sed tuj fariĝis centro de la atentoj. Ŝi komencis kanti, kaj post kelka tempo igis la fajron ŝanĝi la koloron, plurfoje. Unue al intensa bluo. Poste al orflavo. Kaj laste, al verdo. Vedd subite sentis doloron ĉe la brako. Tiu doloro neniel ĉesis. En la sekvinta tago, Klapuo diris al li ŝian nomon. Ŝi estis patrino Kullat. Laŭ li, plenpova sorĉistino.

Vedd frue vekigis kun volo urini. Kaj tiam li ekvidis tiun Patriron Kullat irantan tra la kampadejo. Ŝiaflanke staris maldika viro, tenante bastonon. Vedd ne sukcesis vidi lian vizaĝon, nur la nazpinton eliĝantan el la ombro de la kapuĉo.

Homa sorĉisto? Kion fiaĵe faras tiu sorĉisto ĉi tie inter la norukoj?

La du eniris en barakon kaj tiu pripensaĵo okupis lian menson ĝis kiam oni kunvokis lin al la trejnado.

La trejnado kiel lancisto estis mallonga, tamen tre streĉa. Ili bezonis lerni kelkajn vortojn de la noruka lingvo, kiel antaŭiĝi, malantaŭiĝi, atendi, transdoni, lanco, pikilo, ktp. Krom tio, kiel moviĝi por akompani la patrinojn kaj transdoni al ili lancojn kaj pikilojn. Tuj komence, unu el la arestitoj, kiun trejnis Patrino Tula, malsukcesis ĉe manovro. La militistino koleriĝis kaj lin bategis ĝis la morto.

Ĉe la fino de la dua tago de trejnado, la suno estis forte hela, kaj la oldulo, lacega. Li devis kuri post Patrino Gtu kaj transdoni lancon. Li stumblis sur la malebena tereno kaj gratvundis unu el la genuoj. Li restariĝis superante la doloron kaj sukcesis liveri la armilon kun iometo malfruo. Patrino Gtu blekegis kaj pugnobatis lin sur la bruston. La oldulo falis surteren, senspire. Li kredis, ke venis lia horo. Patrino Gtu pli-malpli komprenige parolis ked-lingvon.

– Neniam malfruu, gorb'ŝobo. ŝi tiam prenis lian brakon kaj enpikis ĝin per siaj ungegoj kaj eligante flueton da sango. Per sia griza manego ŝi tenis lian manon kaj pafis dentmordon. La oldulo sentis pikpuŝon kaj intensan ardon, kaj tiam li vidis la sangon elflui el angulo de lia mano. Restis nur eta stumpo de lia malgranda fingro. Kaj tiam li aŭdis la patriron laŭte maĉi kaj pisti la ostojn de lia fingro.

– Gtha! Gtha!

Tiu ne estis la unua horora situacio travivita de vedd. La doloro pro la fingra deŝiro estis malforta kompare al la verda fajro. Vedd volis pliafoje havi ĉemane la klingon de la ostodemono. Per ĝi li povus fortranĉi la kapon de Patrino Gtu.

Malfeliĉa! Mi vin ekkaptos! Mi findetruos vin!

La venĝaj pensoj de Vedd estis interrompitaj de la rostsono el ekbrulo de sia karno. Noruko portanta braĝo-feraĵon tiumomente kaŭterizis lian vundon. Vedd tute kuntiriĝis, sentante doloron kaj murmurante.

– Mia fingro... mia fingro...

Patrino Gtu kliniĝis liaflanke, kaptis lin per la haroj kaj rekte rigardis lin, okulo kontraŭ okulo. La sango de la oldulo fluetis inter la grizaj lipoj de Gtu, farbitaj de ruĝo. Ŝi malrapide parolis elĵetante teruran buŝodoron.

– Ne misfari denove, gorb'ŝobo! Aŭ *mi manĝi* vian tutan karnon.

10 – Apostata sorĉisto

Al Vedd forte doloris ĉe la loko kie lia fingro estis detranĉita. Li ne sukcesis bone dormi la unuan nokton, kiam trafis lin ankaŭ forta febro. Iamaniere li deziris, ke lia fino tuj alvenu, sed Klapuo kaj Dlup venis helpe al li. Ili devigis lin trinki tre amaran teon. Renkiono estis malkvieta kaj parolema en tiu nokto.

– Ni venĝos nin, Aveto! Alvenos nia horo.

La oldulo ne bone vidis lian mienon en mallumo, sed li imagis malbelaĉan vizaĝon. Vedd jam troviĝis laca pro tiom, kiom parolis la militisto pri venĝo. Ili estis enkarcerigitaj en la lignaj kaĝoj kaj eklumitaj de la fajro en la centro de la kampadejo. La norukoj estis tre maltrankvilaj tiuvespere.

– Ĉu vi vere estas princo, Renkiono? – la oldumo demandis.

La militisto restis silenta dum kelka tempo, kiel se li vojaĝus interne de siaj memoroj.

– Jes, mi estas, sed tio ne havas grandan signifon.

– Princo de Kedpir?

– Nu, tute ne, Aveto! Mi kredas, ke mi estas la lasta princo de Dera.

La oldulo aŭdis historiojn pri la ribelo de Dera kiu okazis antaŭ longa tempo. Li eksciis ke la reĝo kaj ĉiuj nobeloj estis mortigitaj. Oni volis pli justan registaron kaj malpli da impostoj. Kosilantaro enposteniĝis post la sangerverŝado, sed jarojn poste oni diris ke la superstaranta registaro estis pli malbona ol la monarkio. En la tavernoj de Tedriso oni ofte rakontis harhirtigajn historiojn pri la tirano de Dera.

– Kiam mi estis forkondukita de mia naskiĝlando mi ankoraŭ estis infano. Eriana min kondukis al Kedpir, sed lasis min sub la zorgoj de Siro Gram, en Valta.

– Ĉu oni mortigis vian tutan familion?

– Eriana tiam vizitis la kortegon de mia patro. Ŝi kompatis min, ne akceptis la ideon, ke oni mortigu infanon pro politikaj kialoj. Se ne dank' al ŝia magio kaj kuraĝo mi estus mortinta kune kun la aliaj.

– Tio certe estis terura.

– Vere, ne ĝuste tiel, mi estis tre malgranda kaj kiam ĉio okazis mi komprenis nenion. Mi fakte restis tre kolera al ŝi, ĉar mi opiniis, ke ŝi min forŝtelis de mia patrino.

– Mi povas imagi... Kaj poste?

– Poste, Siro Gram trejnis min por fariĝi kavaliro. Nur post lia morto, mi revidis Erianan. Ŝi sciis pri la tuta malfeliĉaĵo kiu estis okazonta, sed la magiistoj el la konsilantaro ne sufiĉe atentis ŝiajn antaŭvidojn.

– Kaj tiu Le'Daman?

– Nu, vi aŭdis tiun nomon... Li estas apostatiĝinta sorĉisto. La konsilio de magiistoj jam longe provis kapti lin antaŭ jaroj. Unufoje mi kaj Eriana preskaŭ lin kaptis, sed la malfeliĉa eskapis.

– Kiasence apostiĝinta sorĉisto?

– Malplaĉas al la magiistoj, ke tia preparolo disvastiĝu. Ĉiuj praktikantoj de magio devas sekvi la instruojn de la konsilio. Ili ŝatas kredigi al ĉiuj, ke oni povas konfidi ilin. Jam estis multaj suspektoj kaj eĉ persekutado de magiistoj en la pasinteco.

– Efektive... oni aŭdas ĉiajn strangajn onidirojn pri la magiistoj. Oni diras, ke ili nuligas la potencon de paktoj kun demonoj.

– Eble tio estas fundamente vera... Precipe en la antikvaj tempoj.

– Foje mi vidis demonon, en la milito kontraŭ la kuneoj. Iu kreitaĵo elvokita de iliaj magiistoj...

Ĉu vere, Aveto Vedd? Kia li estis?

Vedd premis sian brakon sentante ekpuŝan doloron el la verda fajro. – Mi ne volas paroli pri tio... Vi estis diranta pri tiu Le'Daman...

– Jes... Multon pri la reguloj de la magiistoj mi ne komprenas, sed kiam iu rifuzas ilin obei, tiu fariĝas apostato. La nura puno por la malobeco inter ili estas la morto. La plejparto kiu ribelas, post nelonga tempo estas mortigita aŭ vivas kaŝite kaj fuĝante de siaj respondecoj. Tio tamen ne okazas al Le'Daman. Li estas multpova.

– Multmalbenita li estas!

– Eriana trovis, ke li eble estis posedita de demono, sed neniu kredis tion ĝis la falo de Tedriso. Tiu draka atako estis io nenormala. Eriana diris al mi ke ĝi estis faraĵo de Le'Daman.

– Ĉu tiu glavo de Gin'uĵio estus uzata por lin kontraŭbatali?

– Mi supozas ke jes, sed Eriana estis iom kaŝema rilate tion. Ŝi rakontis malmulton al mi. Ŝi diris, ke ŝi provos min instrui uzi ĝin survoje al Valta, sed se mi ne lernus, mi devus renkonti alian kavaliron kiu sukcesu.

La oldulo sentis doloreton kiu trakuris lian brakon kaj li mallaŭte ĝemis. Li estis interesiĝinta pri tiu tuta historio.

– Ĉu vi havis okazon vidi tiun Le'Daman?

– Mi ja vidis, li estis strangege, tre maldika kaj forta. Liaj tre blankaj kaj mallongaj haroj kontrastis kun lia bruna haŭto, kiel tiu de la hiaraŭoj, sed liaj okuloj esti tio, kio kaŭzis pli grandan impreson. Ili estis flavaj kaj ekbrilis en mallumo.

– Tio certe timegigis... – Vedd revidigis al si la guldon Daman, kiun li konis dum la milito.

Ankaŭ tiu havis brunan haŭton, sed li ne havis brilantajn flavajn okulojn, ja ne.

– Ha, li estis timegiga, sendube! Mi vidis lin je ununura fojo, kiam ni lin alfrontis. Li mortigis tri el niaj kunuloj antaŭ ol Eriana eniris en la batalon. Tiumomente mi estis vundita kaj apenaŭ sukecesis teni malfermitaj la okulojn. La batalo inter magiistoj faras fortan impreson al la vidado. Tiam Eriana estis malvenkanta. Motokuo estis bat-faligita, sed li sukcesis rekolekti siajn fortojn kaj per energia ŝtonĵeto trafis la frunton de la bedaŭrindulo. Tio deviis ties atenton kaj Eriana atingis lin en la vizaĝo, duone bruligante lin. Fine li elvokis nubon da nigra fumo kaj subite fortiriĝis.

La maljunulo memoris pri Motokuo kun bedaŭro. Li tre estimis tiun grandegulon. Lia mano ektremetis kaj doloro denove ĝenis lin.

– Nenio el tio plu gravas – amare bru-spiris la oldulo. – Ni estas kondamnitaj!

– Mi jam saviĝis el multaj malfacilaj situacioj, Aveto Vedd! Ni havu fidon! Ni sukcesos superi tian situacion. Kaj mi ĵuras al vi, ke mi igos tiujn malfeliĉajn patrinojn tre kare pagi por ĉio kion ili faras al ni ĉiuj.

11 – Seka Sterko

Sur la vojo al la ĉefurbo, la armeo de norukoj eldetruis kelkajn malgrandajn vilaĝojn kaj kaptis pli da homoj. Antaŭ nelonge Vedd, Eriana kaj la ceteraj preterpasis Paburion. Nun ili antaŭiris malproksimiĝante de la tute bruligita vilaĝo, kie ĉiuj postvivantaj al la atako estis katenitaj kaj enĵetitaj en la kaĝojn. La espero de la prizonuloj rilatis al la ĉefa interbatalo inter la norukoj kaj la Kedpira armeo, kaj ankaŭ koncernis la detruon farotan de la guldoj. Estis oftaj murmuroj en la malvarmaj noktoj.

– Venu la guldoj.

– Morto per la guldoj.

Sed ilia alveno al Tedriso iom pli detruis ilian esperon. Ili renkontis bruligitajn kaj forlasitajn ruinaĵojn.

La oldulo, kune kun la lancistoj de Patrino Gtu, postiris ŝin kaj aron da ĉirkaŭ tridek militistinoj, kiuj intencis esplori la ruinaĵojn. La urbo similis grandegan maŭzoleon, kun granda parto de ĝia strukturo ankoraŭ firmstaranta. Per ironio de la destino, Vedd pretervole trairis la straton kie estis lia domo. Ĝiaj muroj ankoraŭ plu staris. Liaj okuloj pleniĝis de larmoj, tie li edziĝis, edukis siajn infanojn, perdis Farelon, sed antaŭ ol venis al li pli profunda emocio, Patrino Gtu maŭlaŭte petis pri ĵetlanco.

– Nadpi.

La olduro eltiris unu el la ĵetlancoj el la surdorsa ledzono kaj ĝin transdonis. De malproksime vidata, Vedd aspektis ian dupiedan histrikon, pro la granda kvanto da pikiloj kaj lancoj kiujn li portis.

La Patrino ion vidis en la ombroj kiujn nur iom poste la oldulo perceptis. Tio estis birdo sur birdtenilo ĉe aperturo kie antaŭe lokiĝis fenestro de lia

domo. Ŝi ĵetis la lancon trapikante la Han'jakuon en la bruston. Malgranda virnoruko kuris en la domon por preni la ĉasaĵon. Li kunportis ĝin surmane, tute rapide. Patrino Gtu deprenis ĝin de liaj manoj, brue mordis ĝian kapon kaj ĝin maĉis. Poste, trinkis la sangon rekte elfluantan el ĝia kolo, tute malpurigante sin per ruĝo.

La oldulo observis tion, kun malfacila spirado.

Eble estas kelkaj aliaj venintaj al la korto... Probable... Ili ŝatis tiun lokon.

Gtu signis kaj ili suprenire sekvis laŭ deklivo. La oldulo revidigis al si tra siaj memoroj la homajn fantomojn suprenirantajn kaj malsprenirantajn tiujn stratojn. Li ankaŭ preterpasis la antaŭon de la domo de la fratoj Brosk. Tie la malgranda Brosk kutime sidis sur la tri unuaj ŝtupoj kiuj supren kondukis al la dompordo, iom pli alta rilate la straton. Ĉiam kiam Vedd tie preterpasadis, li ordinaro haltis por interparolado. La malgranda Brosk ĉiam proponis iomon da brando kun suko de linoĵuso el la granda arbo en la mezo de la korto. Li gardis plurajn botelojn kun tiu trinkaĵo enterigitajn sub la domo, tial ke ĝi restis ĉiam tre malvarma kaj refreŝiga. Vedd ĉion fordonus por trinki iomon da ĝi kaj kelkmomente refoje ekridi kune kun Brosk. Sed lia fantaziado tuj malfariĝis kiam li ekflaris fortan kaj malagrablan odoron elvenintan el pli alta loko.

Sed kia odoraĉo estas tio? Je la grasfala postaĵo de Patrino Gtu! Ĝi estas pli malbona ol la elspiraĵo de noruko.

– Tulka, gorb'ŝobo. – petis Patrino Gtu.

La oldulo transdonis unu el la lancoj. Ĝi estis pli longa modelo de tiuj ĵetlancoj, sed surpinte ĝi havis paron da klingoj, kiujn li mem estis akriginta. Alian tagon, la oldulo demandis Dlupon, kion signifas gorb'ŝobo kaj tiu hezitis respondi. Klapuo anstataŭe respondis senceremonie.

– Seka sterko, *mi'mastro*.

La murego de la fortikaĵo surhavis kelkajn makulojn, striitajn en kelkaj partoj, sed pli supre ĝi ankoraŭ tenis la originalan grizan tonon. Ĉe la pordego restis splitoj el karbigita ligno. La tiea odoro estis pli frapa.

– Gorb! Gorb naruska! – diris unu el la militistinoj.

Vedd aŭdis zumadon de muŝoj akumuligintaj ĉirkaŭ amasoj da fekaĵoj sur la korto de la fortikaĵo. Tio akumuligis laŭ amasigitaj almetaĵoj similaj al muskut-ekskrementoj, sed pli grandaj. La oldulo streĉzorge evitis la fekamasojn kaj li kelk momente distriĝis. Tiu horora blekado lin subite saltigis malantaŭen. La drako elsaltis el la malhela kavo estigita de la duondetruiita pordego interne de la fortikaĵo. Unu el la piedegoj frakasis militantinon starantan sur la antaŭo, kaj la kolo de la besto atake streĉiĝis por flanke ekmordi iun alian.

Patrino Gtu ĵetis la lancon, kiu enpikiĝis en la lumbon de la kreitaĵo.

– Tulka! – ŝi kriis.

La oldulo pasigis la duan lancon kaj jam pretigis la lastan samcele.

– Tulka! – ŝi repetis. Kaj tuj poste – Nadpi!

La oldulo sen ia penso transdonadis tion, kion ŝi petis. La drako avancis detruante aliajn batalantinojn kaj lancistojn sur sia vojo, sed samtempe fariĝante plene trapikita de lancoj kaj ĵetpikiloj en sia karno. Patrino Gtu tiam elingigis la Vortumbran kaj ekatakis la kreitaĵon kun militkrio, kiu pli similis muĝegon de iu ŝuno. Tri militistinoj proksime batalantaj kontraŭ la bestaĉo estis envolvitaj per fajra draka elŝprucaĵo. Kune kun la flamoj, ilin atingis surverŝoj de nigra glueca likvaĵo, kiu brulige alligiĝis al la haŭto.

Jen, drako! Jen! Manĝu tiun malfeliĉan Gtu-on!

Li volis vidi la malbenitan Gtu-on mortinta, eĉ kredante, ke li estas la proksima.

Gtu saltis sur flamantan korpon kaj funde fendis la ŝultron de la drako. Ĝia kolo kurbiĝis por mord-engluti ŝin, sed ŝi estis pli rapida kaj sube ruliĝis. Ĉe la alia flanko ŝi trovis la taŭgan lokon por trafi la supran parton de la kolo. Tie la drako havis la plej malmolajn skvamojn kaj serion da malgrandaj kornoj kuniĝintaj. La glavo trapasis ĉion tion kaj eniĝis ĝis ĝi trafis la vertebrojn kun medolo kaj ceteraĵoj. La kapo defalis surteren kaj tuj poste la korpo renversiĝis.

Patrino Gtu levis la malhelan glavon, kiu kovriĝis de la vibra sango de la drako. Ankaŭ la aliaj postvivintaj militantinoj kantis kune kun Gtu mallongan venkokanton.

Mi pensas, ke mi ankoraŭ multfoje revidos tiun ridindan danceton.

Tuj poste Patrino Gtu lin vokis, por ke ili eniru la kaŝejon en la ruinaĵoj de la fortikaĵo. Tie vidiĝis sur la grundo granda kvanto da ostoj kaj ŝtonoj. Tiuloke laodoro estis preskaŭ neeltenebla. La oldulo rimarkis, ke la vimnurokaj ostoj estis pli ĝenataj pri tio ol li. Pri ĉio ili lamentis.

Ĉe angulo meze de amaso da ostoj ili renkontis ĉirkaŭ dekduon da drakaj ovoj. Ilia ŝelo estis malhela kaj makula. La oldulo kalkulis ke tio valorus grandan riĉaĵon se oni ĝin vendus al la metiistaj sorĉistoj, kiuj laboras en la centro de Kedpir. Ne nur tio, sed ankaŭ la tuta skeleto de la drako ekstere mortigita. Ĉio tio tie forlasita estis granda desperdo.

Sufiĉus por pagi ses monatojn da... Sed, kia trompaĵo estas tio, kion mi pensas? Mi vendos nenion, kraĉaĵo! Mi estas daŭre arestita de tiaj mizerulinoj!

Li devis porti unu el tiuj ovoj dum kelkaj norukaj viroj kaj homaj sorĉistoj kunportis aliajn. Ili estis grandaj kaj pezaj kiel sako da terpomoj. Jam irante surstrate, Patrino Gtu petis ion al la oldulo, kion li ne komprenis, sed transdoninte la ovon, li rimarkis ke ja tion ŝi volis. Ŝi faris truon en la ŝelo

kun siaj fortaj nodecaj fingroj. Ŝi trinkis ĝian enhavon, multe bavante dum tio.

Vedd naŭzmiene fiksrigardis ŝin.

– Vi trinki, merite! – ŝi havis parolaĉan akĉenton, kiam ŝi provis ked-lingve paroli.

La oldulo englutis aeron, ekdezirante rifuzi, sed tiam hirtiĝis al li la haroj kiam li ekpensis pri kion ŝi povus fari al li, se li kontraŭus ŝin. Tiu likvaĵo havis fortan guston, sed ne tiel malbonan, kiom li imagis. Eble tio ŝuldiĝis al la malsato, aŭ al la streĉado.

– Trosi, utma'gtu. – li provis danki en ilia lingvo.

Patrino Gtu ridegis kaj poste levis la glavon. La oldulo fermis la okulojn, tio probable povus esti lia perejo. Ŝi tamen kriis kaj antaŭiris sekvate de la ceteraj. Li malfermis la okulojn kaj rapide aliris al ŝi.

Malbeno! Ŝajnas ke mia morto-tago ankoraŭ ne alvenis!

Sekvante de proksime la estrinon, la oldulo scivole rigardis la glavon per ĉenero ligitan al ŝia dorso. Li frotis la okulojn por certigi al si ke ne estis surokula aĵeto aŭ io tia. La klingo de la Vortumbra ŝajnis pli malhela ol ordinare. Ĝi estis nigra kiel peĉo kaj neniu lumpunkto laŭŝajne reflektiĝas sur ĝia supraĵo. Tio estis io tre stranga, ĉar ĝia metalo ordinare estis polurita kaj ĉiam spegulis la lumon.

Ĉu eble ĝi fariĝis tia pro la sango de la drako?

Vedd ekprenis unu el la ĵetlancoj kiujn li rehavigis al si el la kadavro de la drako kaj ekrigardis ĝian pinton. Escepte de unu dento sur la klingo, ĝi havis la ĉiaman normalan aspekton.

Ĉu eble la trinkado el la draka ovo ŝanĝis mian vidkapablon?

Absorbata de tiaj pensoj li malsupreniris la deklivojn ĝis ili eliris el la ruinoj de Tedriso. Li tiam fine trafis la ŝaradon, kiam li memoris la falĉilon el nigra metalo.

Tiu objekto ankaŭ fariĝis tia post kiam mi trafis tiun monstron!

12 – Vortumbra

Post nelonge, la noruka armeo atingis la ĉirkaŭaĵojn de Ĵafo. El alta loko pliafoje la oldulaj okuloj rigardis la plejgrandan urbon de la regno. Ĵafo iam estis la ĉefurbo, antaŭ ol la superstaro de Tedriso. Ĝi jam estis la koro de la regna komercado, kaj ĝiaj tri rodoj estis plenaj de barkoj, kiuj el tie veladis al ĉiuj anguloj de la mondo. La tuta armeo de Kedpir troviĝis antaŭ la urbo kaj tiel same la Reĝo Hasgur kune kun la restanta nobelaro de la ruinigita urbo.

Vedd jam estis vidinta la reĝon kelkafoje, li estis forta homo kaj havis grandegan helbrunan barbon. Eĉ de malproksime li tiun rekonis, vestitan en sia arĝenta armaĵo, duonkovrita de malhel-ruĝa mantelo.

Tuj okazus la konfronto.

Multaj prizonuloj havis esperon, ke la norukoj estos venkitaj kaj la arestitoj, liberigataj. Sinsekvis intensa laborado por la konstruo de malgrandaj kaj kuriozaj manpuŝeblaj ĉaroj, kies celo tiklis la suspektemon de la katenitoj dum ties farado. Sed nun klariĝis, ke tiuj objektoj portus la katenitojn al fatala destino.

Viroj kaj virinoj, maljunuloj kaj infanoj estis ligataj al ĉiu el la centoj da ĉaretoj kaj kondukataj al la fronto de la batalkampo. Ilia celo ĉe la batalo estus fariĝi homaj ŝildoj. La masklaj kastritaj norukoj el Gin'uĵio puŝis duope la homhavajn ĉaretojn. Inter ili troviĝis Klapuo kaj Dlub.

Vedd kaj kelkaj aliaj lancistoj eskapis de tiu funkcio, okupantaj pozicion apud la patrinoj malantaŭ la vicoj da arkistoj kaj da masklaj katapultistoj.

La frontlinio de la norukoj avancis sur la nuda kampo kiu situis en altebenaĵo proksima al Ĵafo. Ĝi estis tro granda urbo kaj nur malgranda

centra porcio estis murigita. La armeo antaŭiĝis al la urbo por eviti ke ĝiaj domoj kaj familitoj estu viktimoj de sendefenda atako.

Vedd rigardis tiun metalportan amason da moviĝantaj soldatoj sentante stomakan naŭzan perburbon. Li rebildigis al si la batalojn en kiuj li partoprenis en sia junaĝo. Imagoj kaj sonoj el tiuj malnovaj bataloj venis ankoraŭ vivaj al lia kapo, igante lin transpiri.

Li memoris pri kiam estis miloj da kuneoj kunstarantaj sur ebenejo proksima al Valta. Vedd enestis en la fronta linio. Tiu certe estis la plejgranda kaj plejmalbona el ĉiuj bataloj. Li povis senti la tremantan teron kiam la kunea kavalerio ekatakis ilin. Vedd sputis, maltrankvila.

Kia aĉaĝo! Mi preferus denove alfronti la kuneojn anstataŭ marŝi kontraŭ mia propra popolo!

La trupoj alproksimiĝis. Vedd rekonis la standardon de la blua muskuto ĉe la flanko de la Generalo Langusk. Li estis oficiro en la tempo de la milito kontraŭ la kuneoj. Li havis famon de durkorulo.

Tiu fripono jam devus esti emeritiĝinta! Nun li devos elekti inter lasi la armeon esti atakita kaj disbatita sen ia ajn revenĝo, aŭ pafataki virinojn kaj infanojn ĉenligitajn en la frontlinio. Mi forte rifuzus esti sur lia loko!

La tamburoj frapataj de la specialistaj virnorukoj pasigis ordonojn pri pafado. La patrin-arkistoj streĉis la longajn arkojn kaj pafis. Nubo da sagoj leviĝis traflugante super la kampo.

Langusk donis la ordonon kaj la kornoj de la Kedpira armeo responde sonis, signante al la arkistoj ke ili ekpafu. Iliaj sagoj altiĝis iom antaŭ ol la unua serio da norukaj sagoj falis.

La oldulo terursente rigardis la pluvon da sagoj falantaj sur la vicojn de homaj ŝildoj. Infanoj kaj virinoj estis trafitaj. Doloraj kaj agonijaj krioj sonis.

Kia terure tiu batalo! Kia terure!

Sago trafis norukan patrinon je dek paŝoj antaŭ la loko kie li staris. Ŝi blekegis, ĝin eltiris kaj antaŭiris inter la vicoj por fronti la malamikon. La batalo estis varmiĝonta, laŭlitere. Dekstre je ĉirkaŭ dudek paŝoj du grandaj flamoj pliampleksiĝis bruligante masklojn, femalojn kaj homajn katenitojn.

Du guldoj antaŭeniris ne zorgante pri la pluvo da sagoj kaj ŝtonoj ĵetitaj de la norukoj. La militantaj sorĉistoj portis sur si grizajn vestojn kaj nenian armaĵon. Tamen ŝildo el verda energio ilin ŝirmis de la ĵetaĵoj kaj iliaj flagrantaj bastonoj eligis longajn flamojn kiuj konkuris kun la elspiraĵo de la drakoj.

Vedd vidis ekaperi meze de sia armeo la ĝiba figuro de patrino Kullat. Li ne ofte vidis ŝin.

Sed kio estas tiu ombro ĉe la flanko de tiu bedaŭrulino? Ĉu ĝin estigas tiu sorĉisto?

Ŝi kantis kanteton. Ŝia sorĉo estis direktata kontraŭ la ŝildoj de la guldoj kaj ilin detruis.

Sen la ŝildoj, kelkaj ŝtonoj pafitaj de la katapultistoj, kiuj sidis sur la dorsoj de multaj el la patrinoj ilin trafis. Unu el la guldoj falis fulm-batita, dum la alia provis protekti sian kapon per la brakoj kaj turnis sin por forkuri. Unu lancista patrino pafis ĵetlancon kiu rekte trapikis lian dorson kaj li faltrafis per la vizaĝo la teron.

Se mi regus magion, mi ne volus esti guldo. Metiisto... Ja tio mi vulus esti!

Sed, tiu malgranda venko de la norukoj estis nenio kompare kun tio okazonta. La infanterio de la kedpira armeo avancis, ordiĝante laŭ kojnoforma formacio en la loko kie la guldoj pereis.

Vedd ree rigardis patrinon Kullat. Nun li pli bone povis distingi tiun ombron. Ĝi estis homo, kiu venis kun falĉilo en la manoj.

– *Ĉu estas eble?*

– Nadpi – Patrino Gtu blekegis.

Vedd deturnis la atenton de tiu viro kaj tuj transdonis la ĵetilon. Samtempe li prenis alian por ĉemana disponeblo. Ŝi precize ĵetis ĝin mortigante unu el la antaŭiĝantaj soldatoj.

– Nadpi! – ŝi denove petis. Kaj plupetis kvarfoje. Nun la oldulo ne plu havis lancetojn. Eĉ ne rigardante malantaŭen, ŝi ordonis.

– Tulka – ŝi memore sciis la kvanton da armiloj, kiun la oldulo portis.

Ŝi ĵetis la lancon, de proksime trafante unu malamikon. Ŝi petis pri alia kaj mortigis alian, sed tiam, kiam la oldulo portis la lastan lancon pretigitan por transdono, ŝi elŝovis la Vortumbran kaj ekatakis la amason da malamikoj.

Vedd ektimis ĉe eksplodo estigata ĉeflanke de la trupo.

Pliaj Guldoj? Li rigardis en la direkto de la eksplodoj kaj vidis alian magiiston. Kiam li rerigardis, Patrino Gtu jam ne estis vidata de li. La ĥaoso de la batalo lin envolvis kaj li penis devii de la glavoj kaj homoj portantaj ŝildojn kaj lin batpuŝantaj. Ŝajne neniuj havis intereson lin ataki, grave estis la homoj kontraŭ la norukoj. Tio daŭris kelkatempe, kaj tiam la voĉo de Patrino Gtu igis lin subite eksalti.

– Gorb'ŝobo! Gorb'ŝobo!

Vedd provis antaŭiri al ŝi. Verŝo de varma sango el batalanto ĵetiĝis sur lian vizaĝon kaj atingis lian dekstran okulon.

Sed kia aĉaĵo.

Li purigis tion kaj iris iom antaŭen. Li vidis Patrino Gtu efektive grimpantan sur monto da korpoj. La Vortumbra, plene malhela en ŝiaj manoj, kvazaŭ suĉis la sangon de la malamikoj en sian internon. Patrino Gtu havis dekojn da vundtranĉoj en sia korpo kaj ŝia sango fluis simile al rapidflua rivereto. Ŝi esprimis sin per pura furiozeco. Ŝi rulis de sur la amaso da korpoj kaj fine apudiĝis al la oldulo. Tiam ŝi dorse turnis sin al li kaj diris.

– Kmo nob ĉab! Nob ĉab!

Ĉab, la oldulo jam konis tiun vorton. Ĝi signifis Glavon, aŭ klingon. Du klingoj estis enigitaj en ŝia dorso. Per peniga strebo la oldulo eltiris la unuan. Soldato alkuris al li kriante kaj tenante levitan glavon.

– Perfidulo! – la soldato kriis kaj lin frape atakis.

La oldulo levis la glavon eltiritan el la lumbo de la noruko kaj per ĝi malforte sin defendis rebate. La potenca ekfrapo funde reefikis sur la ostoj de lia mano kaj atingis la ostojn de la brako, kiu restis anesteziĝinta. Vedd lasis fali la glavon kaj la soldato movturnis la glavon celante novan baton. Tiufoje, la rebatan defendon faris la Vortumbra. La sekva frapo de Patrino Gtu ruligis la kapon de la soldato. Gtu denove turnis sin al la oldulo, ankoraŭ kun la alia glavo enigita en sia dorso kaj kun la vive ruĝa, preskaŭ flaveca, elfluo de sango.

La glavo estis enmetita inter la ostoj de la militistino. La oldulo devis apogi unu piedon sur ŝiaj ripoj kaj grutante streĉis forton por eligi la glavon ĝis fine la rezisto cedis. Li ĵetflugis malantaŭen kaj side falis, sentante fortan baton sur la gluteoj.

Vedd estis kovrita de sango kaj malpuraĵoj. Lia veziko neelteneble krevis kaj tie li malsekiĝis. Li havis la impreson ke la vundoj de Patrino Gtu fermiĝis laŭmezure kiel ŝi refoje partoprenis en la batalo. Li ĉeestis la militistinon mortigi unu, du, kvin, naŭ... La korpoj amasiĝis ĉirkaŭ ŝi.

La mita glavo sendistinge tranĉis karnojn, tendenojn, muskolojn kaj metalojn. Nur la furioza batalado de Patrino Gtu sufiĉe povus renversi tiun tutan lukton favore al la norukoj. La oldulo ne sukcesis klare vidi tion, kio estis okazanta. Li ne havis fortojn por stariĝi. Li estis hipnotigata de tiu nigra klingo kiu falĉis vivojn laŭ terura ritmo.

El aliflanka direkto, Vedd rekonis la krion de Renkiono.

– Perea, mizerulino!

Vedd turnis sin kaj vidis la militiston teni glavon per kiu li ĵuz trapikis la gorĝon al Patrino Gtu.

La brilanta sango ŝprucis sur Renkionon, farbigante lin per ruĝo. Li frenezule ridegis kaj turniĝis por trafi la virnorukon kiu estis portata sur la dorso de Tula.

– Vi ĉiuj mortu! Mortu! – li kriadis.

– Gorm'ĉa! – Patrino Gtu blekegis montrante la Vortumbran al Renkiono.

Li ekatakis. La oldulo provis deturni lin per konsilo, sed lia voĉo apenaŭ eliĝis – Ne Renkiono, ne ŝi!

Patrino Gtu estis mirinda kaj brutala militistino. La internaĵoj de la oldulo sentis perturbon laŭmezure kiel la du proksimiĝis por la batalo.

Li estos disfrakasita! Nenia ŝanĉo al li!

Sed vere estas, ke Renkiono estis admireginda glavluktisto. Ili krucigis la klingojn je unu, du, tri fojoj.

– Gorm'ĉa! Diŭ voka baarg! – Patrino Gtu havis furiozan rigardon.

Renkiono luktis koncentrita kaj intence antaŭmetis sin por altiri la baton de la norukino. Ŝi estis blinda je furiozo kaj antaŭeniĝis. Kaj la glavbato de Renkiono estis preciza kontraŭ ŝia tikla vundpunkto, la pojno de la mano kiu tenadis la Vortumbran.

– Ha! Damnita! – li festis.

Ŝia mano kune kun la glavo rondiris en la aero kaj falis ĉe la piedoj de la oldulo.

Ne povas esti! Tio ne povas esti ia koincido!

Vedd rigardis la detranĉitan manon de Gtu tenantan la nigran klingon ĉe la piedoj. Lia menso vojaĝis revene al la milito kontraŭ la kuneoj. Jorg'ek estis ĵus savinta lin, puŝfalginte lin sur la koton. Tuj poste tiu estis cindrigita de la verda fajro.

Vedd treniĝis surtere, nearmita, kaj la demono rigardis al li en la okulojn. Li restis paralizita, senage vidante la demonon antaŭeniri en sian direkton kun la falĉilo sur la manoj, preta tranĉduonigi lin. La demono levis la falĉilon kun la okuloj fiksitaj sur sia viktimo.

Daman, la juna guldo kun bruna haŭto kaj longa nigra hararo, pafis magian diskon kontraŭ la demonon el ostoj. La ekpafo de la guldo trafis la pojnon de la demono kaj detranĉis lia manon. La mano, tenanta la falĉilon, falis sur la flanko de Vedd.

La juna Vedd rigardis la nigran klingon, kiu ŝajnis esti farita de ege nigra peĉo kaj kiu absorbis la tutan lumon ĉirkaŭan al si. La demono kraĉis verdan fajron sur Damanon, kiu apenaŭ eskapis rulante sin sur la kota tero.

Vedd prenis la falĉilon kaj per ĝi trafis la korpan flankon de la ostdemono. La brutulo kriegis de doloro kaj restis sendirekta. Meze de afliktego li kraĉis la verdan fajron ĉiudirekten. Unu flamo trafis la brakon de Vedd. Tiam li estis regata de doloro, la plej malbona el ĉiuj.

Forskuante la timigajn memorojn, Vedd premis sian brakon kaj ĝemis. Afliktegite li vidis aron da norukoj preterpase kurantaj, avancantaj kontraŭ la malamiko. Li kuntiriĝis por ke neniu tretu sur lin.

Kiam li levturnis la kapon, li vidis, ke Renkiono tenis glavon enigitan en la dikan ventron de Patrino Gtu, sed ŝi profitis de tio kaj lin kaptis per la alia mano kaj mordatakis lian vizaĝon. Ŝi deŝiris pecon de lia vango kaj parton de lia nazo.

Renkiono kriis. Vedd sentis sia stomakon renversiĝi. Li preskaŭ sentis en si la doloron de vizaĝo parte detranĉita per mordo.

La oldulo aŭdis la bruon de ostoj, kiuj estis frakasataj de monstraj mandibloj, dum ŝi daŭrigis la mordojn al la militisto.

Varmo kiun la oldulo ne sentis ekde sia juneco trakuris lian korpon. Renkiono estus mortonta se li plu faros nenion. Li do nepripense ekprenis la Vortumbran el la grundo kaj stariĝis.

– Lasu ĝin, Gtu!

Gtu flanken lasis fali la korpon de Renkiono. Li falis surteren senkonscia, tute tordiĝinta.

Eble li mortis!

Ŝi rigardis la oldulon kaj ridegante diris.

– Gorm'ŝobo! *Veni al mi. Mi maĉi viajn ostojn!*

Ŝi eltiris la glavon de Renkiono el sia propra ventro kaj montris ĝin al la oldulo. Frosto ektrafis lin kaj liaj kruroj intense tremis.

Ŝi estas monstro. Monstro!

Vedd restis glaciigita kaj tremanta dum ŝi aliris al li per malrapidaj, tamen decidaj paŝoj. Samtempe li prenis la tenilon de la Vortumbra per ambaŭ manoj provante ĉesigi ĝian tremadon.

– Gorm'ŝobo *tremi* de timo! Ha ha ha!

La bato de Gtu estis potenca, sed ĝi ricevis rebaton, kio trudis al la oldulo retropaŝi. Alia bato. La oldulo ne sciis kiel li ĝin forbatis. Nur povus esti bonŝanco. Li memoris serĝenton Sompir, kiam li diris post malfacila batalo, "Soldato Veed, vi estas diable bonŝanca!" Liaj kruroj kaj liaj brakoj ardis de agonio. Li ne sciis kiel li ankoraŭ havis fortojn por resti staranta.

– Gorm'ŝobo!

– Pardonu, patrino! – la oldulo murmuris kaj tiam la Vortumbra dancis en lia mano, kvazaŭ ĝi havus propran vivon. Li funde ŝiris la ventron de Gtu, per longa tranĉo. La gigantino falis surgenue kaj poste renversiĝis antaŭen, preskaŭ tuŝante la oldulon ĉe la falo.

Li sentis, ke liaj kruroj denove fortikiĝis. Li sentis sin en bona kondiĉo, firmstara.

Tiam unu patrino venis kriante al li kun lanco prete poziciata por atako. Li vidis la pli-kaj-plian proksimiĝon de la lanco. Ĝi trapikus al li la kranion, sed lastmomente Vedd kliniĝis al malantaŭo. La klingo, kiun li mem akriĝis, pasis preter lia nazo je malpli ol unu spano.

Pardonon, li pensis.

La Vortumbra tranĉis la kolon de la patrino preskaŭ fortranĉante al ŝi la kapon. Ŝia kapo flanken falis kaj pendiĝis sur la muskoloj. La patrino jam estis mortinta antaŭ ol atingi la grundon.

Tiam la oldulo interne sentis grandan forton. Ankaŭ paco venis al li. La unuan fojon li povis pririgardi tiun batalon tute trankvila.

Kia plej sovaĝa batalo! Kia feroce kriegado! Estas bele! Bele?

Neatendite lia vidado malklariĝis kaj li ne sukcesis diferencigi norukojn aparte de homoj. Ili estis nur luktantaj estuloj. Estuloj kiujn li ne malamamis, nek amis. Estuloj kiuj havis korojn pumpantajn sangon, plenajn je vivoforto. Vivoforto, kiun lia maljuna korpo bezonis.

La Vortumbra regis la makabran dancon. La oldulo aliiĝis en demonon, en kruelan turmenton, kiu ekmortigis ĉiujn tiujn estulojn, ĉu ili estas norukoj, ĉu homoj, sen ia eĉ plej malgranda malfacilo.

Pardonon, bedaŭrinda patrino! La vivo de via filo finiĝas ĉi tie.

En la sekva momento, la glavo estis penetrinta en la ŝultrojn, rompinta la klaviklojn, la ripojn, la talion, ĝis la estulo falis, ĉiu duonkorpo apartflanken.

Nun la oldulo povis tranĉi eĉ la aeron per la klingo de la Vortumbra.

La ombroj... Mi povas trapasi tra la ombroj!

Kiam li eniris en la malluman fendon, li povis vidi ĉiujn tiujn estulojn kiel nurajn pulsantajn sangmakulojn. Li ne vidis vestojn, vizaĝojn aŭ armilojn. Nur la pulsantan vivon interne de ili.

Mi estas nevidebla! Mi estas nevenkebla!

Li tiam denove tranĉis la aeron kaj li ekaperis post la estuloj samtempe ilin tranĉante en du partojn, ilin fortranĉante, ilin kripligante.

Iu ĝiba figuro venis direkte al li. Ŝi kantis incitigan litanion. Tre incitigan! La piedoj de Vedd fariĝis pezaj, sed li sukcesis antaŭeniri en ŝia direkto.

Ĉu tiu estas Patrino Kullat? Tiu ĝibulino estas abomena! Ho jes, plibone sen ŝi! Jes, tiu estis Patrino Kullat!

Vedd vidis la iaman generalon Langusk krintan malsupre je ĉirkaŭ kvindek metroj.

– Retiriĝo! Retiriĝo!

– *Malfeliĉa! Vi pafis sagojn kontraŭ sendefendajn virinojn kaj infanojn! Ĉu vi nun kredas ke vi forkuros? Ha ha ha! kredu denove!*

– Vedd tranĉis la aeron per la Vortumbra kaj paŝis en la ombron. Li rekte rigardis la pulsantan koron de Langusk kaj trapele kuris en lia direkto. La generalo ekvidis la alproksimiĝantan ombron kaj provis sin defendi.

Pereu, malfeliĉulo! Pereu!

Duope falis flanken la korpo de la generalo. Anstataŭ la tiurilata plena sang-elverŝado, la sango elfluis rekte en la damnan klingon. La pensoj de Vedd estis pezaj kaj venintaj el nekonata subkonscio. Pensoj, kiujn li mem ne tute rekonis kiel siajn.

Damaĝo al vi! Mortiĝu! Ankaŭ vi, mortiĝu!

Vedd momente haltis, mallevante la Vortumbran por trarigardi la batalkampon. Homo aliris al li.

– Aveto Vedd! Ni estas venkantaj! – ridetante diris Hunan, tenante glavon surmane.

Li mortis ridetante. La Vortumbra tranĉis lin en du partojn, antaŭ ol li povis ekrimarki la atakon.

Pereu, fi-torturanto de norukoj! Ĉio ĉi estas via kulpo!

Ĉiufoje kiam Vedd levis la glavon kaj falĉis vivojn, lia korpo nepre envolviĝis en ombrojn. Liaj okuloj eklumis. Lia aspekto estis tiu de demono.

Ĉe ambaŭ flankoj estiĝis paniko. Oni vidis la ombron, la demonon, kiu kuratakas inter ili kaj ĉiujn mortigas. Tiuj, kiuj sukcesis fuĝi, ĝin faris meze de teruraj krioj.

– La demono de la ombroj! La demono! Forkuru!

13 – La juna Veddo

Lia malsatiĝo fine estis satigata. Jam estis neniu proksime por esti mortigita. Li mallevis la glavon tuŝante la teron per ĝia pinto. Li volis ĝin eningigi sed li ne portis ingon. Li tiam demetis unu de iu sternaĝinta soldato kun zono kaj alligaĵoj. Li ĝin fiksis en sian talion kaj gardis la Vortumbran. La ombro lin envolvanta disnieniĝis.

Li profunde spiris. Laodoro de sango kaj fekaĵo invadis lian nazon ne kaŭzante naŭzon. Li sentis la guston de sango en sia buŝo, liaj dentoj estis nefirmaj, lia lango ilin puŝis antaŭen kaj malantaŭen. Li prenis la incizivon per la fingroj kaj ĝi eliĝis en lian manon. Li ekrigardis tiun denton faritan el draka osto, tre blankan, sed mapurigitan per sango. Alia malligiĝis en lia buŝo, spontanee. Li kraĉis ĝin sur la grundon. Estis granda mensa konfuzo, li ne plene sciis kiu li estas, kie li estas.

Li agonie rezonis.

Mi eble ricevis frapegon sur la buŝo, ĉiuj miaj dentoj falos...

Li memoris pri la momento, kiam li iris al la alkemiisto en la pasinta jaro. Li jam neniun denton havis en la buŝo. Tiam li pagis por enmeti kompletan dentaron dum ununura vespero. Tio kostis al li saketon da ormoneroj, ĉiuj liaj ŝparitaĵoj. Tiu mono estis bone elspezita, tamen nun la dentoj estas senrimede perditaj. En la dauro malpli longa ol minuto li kraĉelĵetis ĉiujn, unu post alia. La sango pulsetis en lia buŝo, liaj gingivoj doloris kaj tiam li sentis ion strangan. Io malmola en lia buŝo.

Tio estis dentoj, sed tiel ne povus esti! Novaj dentoj estis kreskantaj en lia buŝo. Liaj dentoj!

Ĉu dentojn mi havas? Ĉu tio estas sonĝo?

Kaj li observis la kampon de batalo. Tiu buĉado.

Ne, tio estas ia aĉa premsonĝo!

Li vidis falintan noruk-patrinon premegantan sub si viran estulon, kiu akre kriis petante pri helpo. Li iris al ŝi kaj ŝin levis. La masklo eliris tuj for de tie, timigite kuranta.

Li tiam memoris pri ĉio. Pri Gin'uĵio, pri Eriana, Motokuo, Patrino Gtu kaj Renkiono.

– Renkiono! – lia voĉo sonis nekutime pura kaj sen la jukaĵo ordinare algluita al lia gorĝo kvazaŭ iksodo.

Li iris meze de tiu vastega maŭzoleo en libera aero, ĵus konstruita. Estis miloj da korpoj. Ĝemoj aŭdiĝis tie kaj tie, kaj iafoje iu krio petanta pri helpo. Li aŭdis ploron de infaneto. Ŝi estis ligita al manĉareto duonfalinta, el tiuj uzataj por formi la homan ŝildon. Li starigis la ĉareton kun facileco kaj liberigis la knabinton. Ŝi estis kovrita de sango kaj ploris. Ŝia aspekto estis malbonega, inda je bedaŭro.

– Iu jam venas helpi. – li diris al la knabino kaj ekiris serĉante sian amikon.

Kiam li levis la rigardon, li vidis la kadavron de Patrino Gtu, sur aliaj korpoj. Apud ŝi, kuŝis la korpo de Renkiono. Li alproksimiĝis kaj turnis lin sur unu flankon.

Renkiono eligis mallaŭtan ĝemon. Li estis viva, sed lia vizaĝo estis malbelega. Ĝi havis plurajn mordmakulojn, kaj pecoj de lia karno ĉe la vangoj kaj parto de lia nazo estis detranĉitaj. La sango fluis malrapide. Per aŭtomata agado, li trovis sin portanta la amikon per la brakoj. Ĉe unu flanko li vidis grupon de norukoj fuĝantan kaj ĉe alia la damaĝintajn posrestantojn de la retiriĝinta Kedpira armeo, kiuj provas sin regroupigi proksime de la pli periferiaj konstruaĵoj de Ĵafo. La batalo venis al sia fino. Li havis la impreson, ke li vidis ankaŭ la reĝon.

Tiuj mizeruloj ne mortas tiel facile.

Li larĝpaŝe trairis la kampon de batalo. Sur lia irvojo estis centoj da sagoj pikstarantaj sur la tero aŭ sur la korpoj. La unuaj stratoj kiujn li preterpasis ankoraŭ estis senpavimaj. La periferio de Ĵafo estis loko kun mizera aspekto.

Sinjoro kun longaj lipharoj, emociita ĉe la vido de tiu vundita homo surbrake portata, proponis sian muskuton.

– Mia amiko estas mortanta.

La lipharulo helpis lin meti Renkionon sur la dorson de la besto.

– Ni konduku lin al la Templo de Gideso, ĝi estas tre proksima. – la viro tiris la muskuton per la jungiloj kaj tiu milde obeis. Tiu fortaodoro de la besto estis kvazaŭ parfumo kompare kun laodoro de la batalokampo.

Ili malsupreniris laŭ la strata deklivo pavimita per neregulaj ŝtonoj, el kie oni povis vidi parton de la urbo kaj parton de la maro kun verd-bluj koloraj tonoj.

La templo estis simpla konstruaĵo. Ĝi havis altan fasadon blanke farbitan, kiu elstaris inter la ceteraj konstruaĵoj, malhelaj kaj malpuraj. La duparta ligna pordego estis farbita per iom erodita verdo. La templo estis plena de homoj en preĝo petegantaj pri favorkoraĵoj al Sankta Gideso por la defendo de la urbo kontraŭ la invadantoj, sed alkuris grupo de personoj kaj akolitroj tuj kiam ili ekrimarkis la bezonon.

La viro kun grandaj lipharoj tuj portis la novaĵojn – Ĵafo rezistis! Sed estas multe da vunditoj. Iru, kamaradoj, multaj aliaj bezonas helpon!

Renkiono estis portata al la fundoj de korto kie liaj vundoj estis lavitaj per la sankta Akvo de Gideso. Li malfermegis la okulojn kaj kriis, sentante dolorojn. Vedde ne eltenis ĉeesti tion. Li revenis al la interno de la templo. Li

iris tien kaj reen, konfuza, poste li eliris. Li pluiris sendirekta tra la stratoj de la urbo.

Tiu loko de la urbo estis grandparte malplena, multaj el la loĝantoj iris serĉi rifuĝon en la murigita parto. Li surprize alvenis antaŭ la domo de sia nepo. Lia pli juna filo, Gel'lim, edukis la nepojn en Ĵafo, sed poste li transloĝiĝis al Valta. Rin'le estis la sola nepo kiu restis en sia naskiĝurbo.

Li faris kvin ritmajn frapojn je la pordo. Iom poste, Rin'le malfermis la pordon. Li estis vigla junulo, kun mallonga bukla hararo kaj klaraj okuloj kiel tiuj de la avo. Li malfermis la pordon ridetante. Li esperis, ke tiu sono venas el lia avo. Tiuj ritmaj frapoj estis la kutima procedo propra al la Aveto Vedd, sed lia mieno serioziĝis tuj kiam li direktis siajn okulojn al la fremdulo portanta glavon, tute kovrita de sango kaj koto.

– Kion vi volas?

– Rin'le, ĉu vi ne deziros bonvenon al via avo?

– Avo? Ĉu vi ion drinkis? Mia avo mortis en la masakro de Tedriso.

– Ne, mi postvivis...

– Ĉu vi estas freneza aŭ io tia? Vi eĉ ne havas sufiĉan aĝon por esti mia patro!

– Kaj li fermibatis la pordon antaŭ lia vizaĝo.

– Rin'le... Rin'le... – li perplekse murmuris.

Li tie restis surstrate, ne komprenante tion, kio okazis. Ĉu li freneziĝas? La maljunula frenezo? Li rigardis siajn proprajn manojn. Malgraŭ la malpuraĵo, li ekrimarkis ke ili ne estis sekaj kaj sulkplenaj.

Sankta Gideso! Kio estas al mi? Kion mi faras ĉi tie? Renkiono! Kiel mi kuraĝis lasi lin sola? Kiel mi lasis lin sola kun fremduloj?

Li returne kuris, ne laciĝante. Antaŭ ol iri al la korto en la fundo de la Templo, la statuo de Gideso farita el bone polurita ruĝa metalo vekis lian atenton. La sanktulo rigardis al la alto kun malfermitaj brakoj malsupre etenditaj iom for de korpo kaj kun manplatoj turnitaj antaŭen. Li alproksimiĝis al ĝi. Kvankam iel distordite li povis vidi sian imagon reflektitan sur la pli poluritaj kurbaĵoj de la metalo.

Li komence ne rekonis sin. Liaj blankaj haroj kaj barbo ne plu estis tie. Ili forfalis anstataŭitaj de brunaj haroj kaj barbo. Lia vizaĝo estis la sama, sed el la tempo, kiam li estis junulo havanta ĉirkaŭ dudek jarojn. Kaj Vedd ekkomprenis. Tio, kio okazis al li, ne estis io simila al la mirakloj de Sankta Gideso. Gideso estis kuracinta kriplaĵojn, revigliginta damaĝitajn rikoltojn post ŝtonglacia pluvego, kaj eĉ savinta la Reĝinon Juzella el la brakoj de l' morto por ke ŝi nasku la heredanton de Undasur la Tria.

La miraklo, kiu rehavigis la junecon al Vedd, havis la prezon de sango kaj morto. Ombra magio. Tiu glavo estis elsuĉinta la vivon de ĉiuj viktimoj. Ĝi elsuĉis tiun vivoforton en sian propran korpon. En sia malespero alkonduki Renkionon, Vedd eĉ ne rimarkis ke liaj novaj dentoj elkreskis.

Je Fisto el la Alto! Mi estas denove juna! Sed je kia prezo?

Konfuzaj bildoj de la batalo venis al li en la menso. Li vidis Patriron Kullat esti tranĉata de nigra glavo. Aliaj noruk-patrinoj kaj iliaj helpantoj suferis tian fatalon. Estis Kedpiraj armeanoj, kiuj same kriis kaj petegis. La badaŭrinda Hunan, ridetanta...

Kion mi faris? Ĉu eblas, ke mi faris ĉion tion? Tio nur povas esti premsonĝo...

14 – Malbeno

La maljuna Vedd fariĝis junulo. Tio estis reala transformiĝo, laŭ karno kaj ostoj, sed, kiam li penetris en malsuperan dimension, ankaŭ lia menso estis ŝanĝita.

Dum horoj li provis konvinki Renkionon, ke li estas la maljuna Vedd. Li ne sukcesis. La militisto estis zorgata en la centra templo dediĉita al Sankta Gideso. Ankaŭ centoj da vunditoj troviĝis tie. Renkiono ankoraŭ ne plene rekonsciiĝis, li ardis en febro kaj liaj vundoj estis infektitaj.

– Tio estas mi, Vedd'teris Mol'empro! Kiom da fojoj mi devos ripeti tion, Renkiono?

Eĉ malsana, Renkiono ne povis sin deteni tiom ridi!

– Ĉesu min ridigi, malsaĝulo! Tio dolorigas!

Vedd incitiĝis pro la ridado de Renkiono.

– Stultulo! – Vedd impete eliris trinki ion, sed li havis neniun monon. Sur la stratoj, li vidis kelkajn junajn virinojn preterpasantajn. Unu el ili rigardis lin kun interesiĝo. Tio plenigis lin per deziro. Li sentis sin vira, kiel nur antaŭ longe okazis.

Je la barbo de la Reĝo Hasgur! Mi bezonas ekkuŝi kun iu virino nun kiam tio denove eblas al mi!

Tiuj novaj sentoj duon-aliigis lian malnovan sintenon. Probable, li tiamaniere sentis sin en la apogeo de sia juneco, sed tiaj memoroj kaj sensacioj jam estis forpasintaj.

Li atendis en malluma angulo por surprize alpaŝi al du viroj kiuj iris sur la strato. Li elingigis la Vortumbran kiu vibris en liaj manoj kun soifo de sango.

– Pasigu la monon se vi volas pluvivi!

Li atakis montrante sian mortigan intencon kaj la viroj rapide malplenigis la poŝojn.

Tiom malmulte da mono! Mi devus tranĉi la kapojn al tiuj malbonŝanculoj, ĉu ne?

"Vi ja devas! Faru tion nun!" Io respondis interne de lia menso, sed Vedd forpelis la sugeston. Li kalkulis la monerojn kaj pripensis.

Mi esperas ke tiu ĉi mono almenaŭ pagos por feste tranokti.

Li grumblis al la uloj kaj tuj foriris. La viroj priŝtelitaj kriis por helpo. Neniu gardisto aliris kaj Vedd neĝenate fortiriĝis. Probable li estis bonŝanca, ĉar la gardistaro de la urbo estis malpliigita pro la jŭs okazinta batalo.

Li alvenis al bordelo en la havena regiono. La loko estis varma, malgranda kaj tutplena.

– Kiu estas via plej forta drinkaĵo.

– Baluda drinkaĵo – respondis la drinkej-mastro. Li estis maldika kaj maljuna, kio memorigis al Vedd pri si mem.

– Donu al mi la botelon!

Li trinkis preskaŭ ĉiom el la botelo. Tio estis ia dolĉetigita brando, farita el la radiko de balud-planto. Ĝi malfajne ardis ĉe engorĝigo, sed havis tre bonan guston.

– Ĉu vi serĉas al vi plezuron ĉe akompanantino? – gras-rondeta virino kun grandaj mamoj sin proponis.

Vedd ridetis al ŝi, kaj montris sin kontenta, kiam ŝi fikse rigardis liajn dentojn. Ili nun estis normalaj, ne plu tiu aberacio koncerna al dentoj de drako.

– Por la tuta nokto! – li respondis.

– Ni iru do, karulo. – ŝi tuŝis lian malsupran korpoparton kaj aldonis – Mi povas atesti, ke vi estas tre entuziasmigita.

La virino kondukis lin al unu el la ĉambretoj kie li satigis sian deziron.

Li vekigis en la sekvanta tago kun forta kapdoloro kaj sentante konscienco-riproĉon. Li postlasis Renkionon sen iu ajn konato lin fleganta. Venis al li ankaŭ la memoroj pri la batalo. Li eble mortigis dum la batalo centon da homoj kaj norukoj.

La virino jam ne ĉeestis kaj li restis denove senmona. Vedd reiris al la templo serĉante Renkionon, sed ne renkontis lin.

Ĉu li eble mortis? Nur povas esti tio!

– Kie li estas! – li levis pastron per la kolumoj de ties bruna mantelo.

– Vi lasis lin morti! Mi faros el vi kaĉon! – Vedd fariĝis ruĝa kaj tremis, salivumante sur la pastron.

– Sereniĝu, junulo, li ne mortis. – klarigis alia pastro, kiu alkuris kun la celo helpi sian kolegon.

– Kie li estas? – li bruske delasis la unuan.

Li fartis pli malbone dum la nokto kaj ni trovis necese lin konduki al la alkemiisto. Tio estas nia regula procedo por la plej gravaj situacioj.

– Vi ne devus agi tiamaniere, ĉu vi komprenas? – la pli altranga lin riproĉis.

Vedd fine konsciiĝis pri tio, hontinte, kaj li murmuris – Pardonu min, mi...

– Venu kun mi! – la religiulo lin interrompis – Ni bezonas fortan brakon. Tio estas la minimuma afero, kiun vi povas fari post la ĉi tiea konfuzo de vi kaŭzita.

– Sed mi estas oldu... – laŭ sia sintenado la oldulo ekvolis rifuzi, sed li tuj memoris, ke li nun estas juna kaj denove forta. – hum, kompreneble, pardonon!

Li pasigis kelkaj horojn kunhelpante interalie la portadon de malsanuloj. Inter la vunditoj troviĝis kelkaj el la iamaj katenitoj venintaj el Gin'ujio, sed neniu el ili rekonis lin kiel tiun oldulon, kiu akriĝis tranĉilojn.

Pli malfrue, Renkiono revenis. Lia aspekto estis pli bona, sed duono de lia vizaĝo estis kovrita de bandaĝoj. Vedd helpis lin paŝi ĝis la lito, kiu estis simpla surplanke improvizita matraco el pajlo.

– Nu, kiel fartas la lasta princo de Dera?

Renkiono flanke rigardis lin kaj flustris.

– Kiu diris tion al vi, mia kara?

La juna Vedd turnis la okulojn. Li elingigis la Vortumbran montrante ĝin.

– Kiom da fojoj me devas ripeti? Ĉi tio igis min pli juna!

Renkiono gape rigardis kaj la viron kaj la glavon. Post kiam li revenis de la renkontiĝo kun la alkemiisto, li plene reakiris sian konscion. Nun, ĉu el la racio, aŭ el la frenezo, li jam havis sufiĉajn motivojn por enlasi tiun eblon.

– Ĉu vi parolas serioze?

– Ne, tio estas pikserco, laŭvole ekridu, stultulo!

Renkiono ridis, ne pro la mokserco, sed ĉar li rekonis kelkajn trajtojn de la oldulo ĉe tiu homo.

– Aveto! Tio estas nekredebla! Ĉu vi scias, kion tio signifas?

Vedd flanken rigardis kaj ree eningigis la vortumbran. Li ne volis riske respondi.

Renkiono aldonis – Tio signifas, ke tuj kiam mi resaniĝos, mi kaj vi havos la mision ĉasi apostatiĝintan sorĉiston.

Vedd englutis aeron. Ĉio komenciĝis tre rapide, sed li havis certecon ke, kion li laste deziras, tio estas eliri por persekuti iun apostatan sorĉiston. Tuj poste li abrupte stariĝis.

– Renkiono, min senkulpigu, mi bezonas iri... iri pagi ŝuldon! Jen tio!

– Ŝuldo? Pri kio vi parolas, Aveto Vedd?

– Poste mi klarigos, morgaŭ mi revenos frue.

– Hej, atendu!

Vedd ignoris. Li rapide foriris el la templo. Li vagis tra la stratoj kaj iris al la haveno, observi la movadon. La nokto proksmiĝis.

Mi bezonas akiri monon! Iomete trinki por malstreĉiĝi... Ha, jes, kaj disponigi al mi virinon! Eble duopon!

La deziroj de Vedd pliintesiĝis ĝis ili fariĝis nekontroleblaj.

Li planis ofensivon, sed tiam li ekpensis pri kio okazus se io mistrafus. En la antaŭa tago li devis forkuri por eviti problemojn.

Kion mi faru?

"Vi ne agos stulte, kiel hieraŭ!" la nenormala penso estiĝis en lia kapo.

Vere! Plibone estas disponigi ununuran virinon...

"Kaj ne ebligu al la malbonŝanculo voki la gardistojn!" lia penso eĥis.

Jes, tio ŝajnas esti bona plano!

Sekve li fortiriĝis al malluma angulo ĉe la doko kaj atendis la preterpason de iu viktimo. La tenilo de la glavo varmiĝis en lia mano. La Vortumbra transdonis al li grandan konfidon kaj, en tiu momento, la kapablon agi sen ia hezito.

Vedd rekonis, ke tiu viro estas iu kuneo. Tiu plata nazo, larĝaj lipoj, longformaj okuloj. Malbenita dizertinta kuneo! Centoj da ili estis vivantaj en Kedpir post la milito. Ordinare, ili estis tolerataj kiel duaklasaj regnanoj.

"Temas nur pri iu malbenita kuneo" Mortigu lin! Mortigu lin nun!" tiu penso plenokupis la menson de Vedd.

Vedd sentis koleron devenantan el iamaj tempoj, el la milito kontraŭ la kuneoj, kaj li ne hezitis. La klingo faris precizan laboron falĉante tiun vivanton, sen aŭdiĝo de ne pli ol mallaŭta lasta ĝemeto. La trafa ekpiko en la koro igis la sangon intense elflui. Vedd traserĉis la havaĵojn de la viktimo kaj trovis kelkaj monerojn.

"Bonega laboro, Vedd!"

Efektive, unu malpli aĉa kuneo por malpurigi nian regnon!

Li lasis la korpon tie kaj iris al la alia flanko de la rodo, senokupe trovi ĝuadon en la sama bordelo vizitata de li en la antaŭa tago.

Li sentis eŭforion ekposedi lin. Io tiel forta, ke lia konscienco montris neniun trajton de memriproĉo. Li apenaŭ konsciis, ke io ombra kaj terura nun kreskadis interne de lia animo.

– Ĉu tio en via bluzo estas sango? – demandis fremda prostituitino kun bruna haŭto kaj longaj okuloj, kiu lin akceptis.

– Sango? Ho, ne, certe estas vino, aŭ saŭco. – Vedd ne estis bona mensoganto, kaj la virino ne tute konvinkiĝis. Sed sanga makulo ne malhelpus al ŝi plenumi siajn servojn. Ŝi bezonis monon kaj ne priatentis tion.

Ŝajnas ke ŝi havas sangon de kuneo! Nu, kaj do? Tiu ĉi putino estas pli belforma ol tiu alia en la hieraŭa renkontiĝo. Kiel plezure estas denove senti sin juna!

Vedd disponis mirindan kvanton da energio en tiu nokto. Li estis eŭforia kaj sukcesis havigi plezuron al la virino, io pri kio ŝi ne ofte havis kutimon. Post pli ol unufoja satigado de sia volupto, li eĉ ne sukcesis dormi. Li eliris el la bordelo frumatene.

Dio mia! mi bezonas urini!

Li urinis ĵetante la likvaĵon malproksimen, kion jam de longe li ne faris.

– Ha ha ha – li laŭte ridegis en plena frumateno kiel se li estus freneza.

Tio vokis la atenton de kelkaj homoj kiuj estis sur la malsupra strato. Iom poste li estis ĉirkaŭata de kelkaj vagantoj.

Unu el la uloj diris – fordonu ĉion, se vi volas vivi.

Vedd freneze ekridegis kaj alsaltis sur la tri dekapigante per la Vortumbra la unuan el ili antaŭ ol ili povis konscii kio okazas. La posta luktado ne daŭris plu. Anstataŭ esti prirabita, li prirabis la tri ŝtelistojn.

Tio ne estas multe da mono!

"Ha, sed tio pagos al vi tri aŭ kvar festnoktojn, Vedd!"

Vi pravas!

Kelkaj personoj vekigis pro la bruo, atente aŭskultante. Sed neniu volis eliri el siaj litoj aŭ el siaj domoj por vidi kio okazis tuj kiam la bruo ĉesis.

Ĉi-foje Vedd kovrigis de sango, sed li iris liberiĝi de ĝi sin banante en la maro ĉe la unuaj lumoj de la mateniĝo. Kelkaj frue vekigintaj fiŝkaptistoj suspekteme ĵetis rigardon al li, sed nenion diris.

Plibone al mi estas iri por zorgi la sanstaton de Renkiono!

Vedd supreniris la mallarĝajn stratojn ekde la doko kaj alvenis al la supra parto, kie Renkiono estis enloĝigita. Liaj pensoj akceliĝis kaj estis maltrankvilaj.

"Atentu, Vedd, estos bonege al vi bani vin en la sango de tiu malbeninda sorĉisto!"

Ĝuste! Li detruis mian hejmon! Li sendis tiun damnitan drakon kiu formanĝis Farelon!

"Kaj se vi venkos lin vi fariĝos fama. Ankaŭ riĉa! Vi povos havi belajn virinojn al via dispono, neniel similajn al tiuj kadukiĝintaj virinaĉoj de la bordelo."

Jes, jes! Mi fariĝos riĉa kaj fama!

Li fine alvenis al la templo kaj estis akceptita. Tuj poste li genuiĝis flanke al la amiko.

Vekiĝu, Renkiono, vekigu! – Vedd skuis la ŝultrojn de la militisto.

Renkiono vekigu, sentante la odoron de mar-haladzo eliĝantan el la ankoraŭ malsekaj vestoj kaj haroj de la junulo. Li tenis nekutiman rideton sur la vizaĝo kaj ekbrilon sur la okuloj, kio igis Renkionon ektimi.

– Ni ĉasos kaj *mortigos* tiun malbenitan apostatan sorĉiston!

Renkiono reciprokis la rideton.

Certe, certe... Kaj bonan tagon ankaŭ al vi!

15 – La malvirto

Renkiono plibone fartis kaj ne plu bezonis la intensan prizorgadon. Post kiam li rehavigis al si kelkajn valoraĵojn, kiujn li ĉiam gardis en la plej grandaj urboj, ili luis komfortan ĉambron en pasloĝejo de la riĉa zono de Ĵafo. Havi je sia dispono pli da mono pruntita de Renkiono bonefikis al Vedd, kaj tial li ne bezonis fordoni sin al rabado por libere plenumi kion li deziris.

La vortumbra ne kuntrenis malkvietojn dum kelkaj tagoj kaj la konscienco de la oldulo reakiris klarecon, naskante ĉe li rimorsajn sentojn.

Damne! Kion Dalje'ra pensus pri mi? Ĉiuj tiu virinoj kun kiuj mi kuŝis! Tio ne estas justa!

Li iris tra la stratoj en kolera humoro kontraŭ si mem.

Kaj nun, mia Sankta Gideso? Kion Renkiono, Rin'le, Gel'lim pensos pri mi? Kaj se ili malkovros, ke mi mortigis iun por malgranda nombro da moneroj? Ke mi faris tion nur por elspezi celante drinkadon kaj virinojn?

Malgraŭ tio, ĉiun nokton la deziro pri drinkaĵoj kaj virinoj kreskis kaj li ne sukcesis rezisti. La alia voĉo interne de li plifortiĝis...

"Pli bone estas denove profiti vian junecon! Vi ne restos tie senmova, kalkulante la stelojn, ĉu? Kial vi ne vokas vian amikon! Ankaŭ li bezonas amuziĝon!"

Lau la peto de Vedd, Renkiono lin akompanis. Ili vizitis altklasan bordelon en la riĉa parto de la urbo.

– Ĉu vi ne amuzos Vin, Renkiono? – Vedd demandis montrante la belajn virinojn ĉe la alia flanko de la salono.

– Vi povas antaŭiri, mi restos ĉi tie iom trinkante.

Vedd restis kelkatempe en unu el la ĉambroj kun tri virinoj. Le eliris animita celante vidi kiel Renkiono profitis sian momenton.

Ha, jes! tio ja estas vivo!

Li renkontis Renkonon trinkantan kaj observantan la dancistinojn. Lia vizaĝo estis difektita kaj Vedd rimarkis, ke la prostituitinoj rigardas la amikon kun bedauro, aŭ naŭzo. Renkiono ŝajnis esti fundiĝonta en sia sidloko. Li nur drinkis ĝis li falis, montrante mizeran aspekton.

Fiste, havu kompaton al tiu malfeliĉulo!

Vedd kuntrenis la amikon en bedaŭrinda stato revene al la pasloĝejo.

Tiu malbeninda noruk-virino finvenkis min, Aveto! Finvenkis min... – Li senkonsole ploradis...

– Ne tiel restu! Iam ĉio tio forpasos.

Renkiono plorante replikis – Forpasos neniel, Aveto! Mi estas markita por ĉiam, jen la vero!

Vedd ploris kun Renkiono.

Kompatema Fiste! Eble mi plibone devus esti forlasinta lin morti en la kampo de batalo!

Dum la tago ĉiaspecaj malbonaj pensoj lin turmentadis. Eble en tia grado, ke faltoj reaperis ĉirkaŭ liaj okuloj. Ambaŭ vekiĝis frue. Renkiono havis verdetan aspekton pro la tranoktado, sed li rimarkis la lacan kaj maljunecan rigardon de Vedd.

– Vi ankaŭ estas disbatita – diris la senposedigita princo.

– Ni trinku vinon kaj tostu je tio.

Ili iris tagmanĝi. Multe da viando kaj vino. Vedd sentis grandan plezuron manĝi tiun molan kaj grasan viandon. Antaŭ kelkaj tagoj, tuj kiam li revigliĝis, Renkiono rakontis al li, ke li skribis leteron kaj ĝin sendis per ŝipo al Valta. Lia esprimo elmontris grandan maltrankvilecon.

– Ni jam devus esti ricevinta respondon el Valta. – diris Renkiono, gratante krustojn de la vizaĝa vundo.

– Ĉu vi parolas pri la letero? – la juna Vedd rediris kun plenigita buŝo kaj poste trinkis kelkajn glutojn da vino por faciligi la engluton de la manĝaĵo.

– Bone, la letero.

– Eble la ŝipo dronis, aŭ ia tempesto deviis ĝin de la ĝusta direkto.

– Eble, sed Valta estas ne tre malproksima, kaj ŝip-pereo okazas tre malofte en ĉi-marparto.

– Do, kial ni ne iru tien?

Dum li pensis pri la propono, la esprimo de Renkiono ŝanĝiĝis. Li rigardis iun kiu ĵus eniris en la gastejon.

– Kuska!

Li estis kalva viro, uzis multajn orel-ringojn, kaj vestis sin per blua peza mantelo kaj per ia ruĝa kravato.

– Renkiono? – la okuloj de la senharulo malfermegiĝis ekzamenante la detruitan vizaĝon de la militisto.

– Jes, tio estas mi! Sidiĝu!

Li ekvolis sidiĝi, sed antaŭ ol tio li eksurprizite haltis rigardante la tenilon de la glavo de Vedd. Poste li konsternite rigardis al Vedd en la okulojn.

– Ĉi tiu estas la amikoj pri kiu mi parolis. Vi povas nomi lin Vedd, sed kelkafoje mi lin nomas Aveto.

Kuska sulketigis la frunton. – Aveto?

– Tio estas longan historio! – Renkiono verŝis vinon en la belan metalan kalikon kaj ĝin proponis.

Ĉirkaŭ unu horo poste, Vedd apogiĝis sur seĝo kun ŝvelinta ventro, pli supersatigita ol ebria. Renkiono ne ekmenciis, sed la juna Vedd konkludis, ke Kuska estis sorĉisto, eble disĉiplo de Eriana.

Renkiono rakontis ankoraŭ ne duonon de la tuta historio, kiun li ilustris kaj troigis, plurfoje naskante ridojn al Vedd.

Renkiono dume atingis la parton en kiu Eriana perdis la vivon.

– El nenio amase falis sagoj! Tiamezure ke la ĉielo mallumiĝis!

– Ne troigu Renkiono! – diris Vedd kun plenigita buŝo.

– Tio estas vera! Ombro etendiĝis sur mi tie, kie mi staris! Multaj homoj falis, inter ili Eriana. Fatala sago trapikis ŝian gorgon.

– Ŝi mortis en miaj brakoj – melankolie informis Vedd. – Mi ŝatis ŝin.

– Ĉu veras tio, Aveto? Vi du ne ŝajnis esti en bona rilato...

– Vi estas nobla kaj forta, sed vi ne scias pri ĉio, Renkiono! – rediris Vedd, kolereta.

– Ho ve, kia malinda meniero morti! – Kuska malsuprenigis la kalikon, pensema.

– Ŝi mortis strebante al celo! – aldonis Renkiono! – Kaj tio estas tre grava!

Vedd levis la kalikon – Toston al Eriana! Mirinda virino, la sorĉistino kiu savis mian vivon!

La du akompanis la toston, sed Renkiono momente flankrigardis Veddon. Vedd nature preteratentis tion kaj Renkiono tuj reprenis sian rakontadon.

Iom poste, kun la ventro pli peza ol la Vortumbra, Vedd penis teni malfermaj siajn okulojn.

– Iru supren por ekdormi, Aveto Vedd. Mi ankoraŭ havas multon por interparoli kun ĉi malnova Kusko.

La du daŭrigis la koversacion, tre entuziasmaj, dum Vedd dankis pri tio kaj iris plenfali sur la liton.

Horojn poste, Vedd ekstreme vekiĝis kiam la pordo de la ĉambro malfermiĝis. Li dormis ĉirkaŭbrakante la eningigitan glavon kaj estis tuj eligonta ĝin kiam li konsciis, ke tio estis Renkiono eniranta la ĉambron.

– Hej, trankvile! – diris la militisto.

*Felliĉe tio ne estas li, tiu stranga sorĉisto! Li fikse rigardis mian glavon!
Certe li volos ŝteli ĝin de mi!*

Li skuis la kapon por fortiri tiujn ideojn. Lia mieno mildiĝis kiam li ekrigardis la amikon.

Renkiono diris en bona humoro – Mi havis la ideon trejni vin kiel glavluktiston. Kion vi diras pri tio?

Vedd suprenŝovis la brovojn.

La voĉo parolis en lia menso kaŭzante eĥojn de io ombra en lia animo. "Efektive, scii plibone lukti per glavo estus tre utile, Vedd. Tio faciligus al mi la aferojn, ĉu bone?"

– Kompreneble, kiam vi volos! Mi jam estis lerta en la uzado de lanco, sed vere ne de glavoj.

– Morgaŭ matene, do. Proksime de ĉi tie estas taŭga loko.

Vedd gratis sian maldensan kreskintan barbon kaj pripensis pri la virinoj de la bordelo.

– Mi emas iri en tiun saman lokon, kiun ni hieraŭ vizitis, ĉu same al vi?

– Ne, verdire mi preferas resti ĉi tie, ripozante. Do, amuziĝu!

Vedd sin preparis, lavis la vizaĝon uzante pelvon restigitan sur apuda tableto. Li ligis la glavon al la zono kaj ekiris.

– Ĉu mi ja kunportu tion por festnoktado?

Vedd movis la sultrojn signante indiferecon – Neniam oni scias... – Kaj li eliris kun la penso turnita al la virino aŭ virinoj, kiujn li elektos tiun vesperon.

La sekvan tagon ili renkontiĝis en la pasloĝejo por la mantenmanĝo. La amiko de Renkiono alvenis hasteme kaj alarmite.

Kial tia ekmira vizaĝo, Kusko?

– Oni mortigis Vuldon, unu el la magiistoj de la konsilantaro!

Vedd ĉesis manĝi por atenti la informon.

– Kio? Ĉu li ne estis unu el la guldoj de Ĵafo? – Renkiono demandis. – Li estis tre potenca...

– Guldo aŭ ne, oni trovis lian korpon sur la strato en la pasinta nokto. Tamen, pri lia kapo...

– Guldo senkapigita? Kia abomeno! – Renkiono premis siajn manojn sur la tablon.

– Tiela morto postlasos konsekvencojn... Ĉiujn sorĉistojn en la urbo oni kunvenigis por ke ili kunhelpu ĉe la enketo. La gardistaro ricevis ordonon pri preta atento.

Vedd prikomentis – Interese... Nenion tian oni faras kiam iu malriĉa mortas, ĉu ne?

La du nerekte rigardis al Vedd. Li preteratentis.

– Mi nur diras...

– Bone – daŭrigis Kuska, nun parolante malaŭte. – Oni suspektas iun.

– Ĉu vere? – Vedd interesiĝis.

– Jes, Ĵadira timas, ke tiu povas esti la apostato.

– Ĉu vi parolas pri tiu Le'Daman? – Vedd demandis.

– Jes, sed kvietiĝu pri tio. Jam sufiĉas atako de drakoj kaj nun armeo da norukoj rondiras ĉirkaŭ la regno... La popolo fine freneziĝos se simila onidiro disvastiĝos.

Vedd plu atentis dum li plene trinkis el sia laktoglaso.

– Ĉu ne estus plibone rekte alfronti la problemon? – sugestis Vedd, kun strieto da lakto sur la lipoj.

– Tute ne! – Kuska akre replikis.

Vedd kuntiris la ŝultrojn kaj metis pecon da pano en la buŝon.

– Mi mem ne kredas, ke Le'Daman faris tion. – Kuska tamburis per la fingroj sur la tablo – Li ne estus *freneza* meti siajn piedojn en Ĵafon.

– Kial ne? – Ved demandis per plenbuŝo.

– Ĉar li estus kaptita kaj mortigita. Li estas tro malkuraĝa por montri sian vizaĝon. Li povus sendi drakojn, kaj eĉ norukojn en sia loko, sed mi ne kredas, ke li elirus el sia kaŝejo.

– En la supozo ke li mem kontrolis la drakojn por detruĝi Tedrison, kial li ne faris la samon rilate al Ĵafo kaj Valta? – demandis Vedd, pridubante.

– Li provis, sed kun nia nuna scio pri la drakoj, ni estigis al ni protekton kontraŭ ili.

– Ha – Vedd levis la brovojn signante scivolemon. – Kia protekto?

– Nu... – Kusko fariĝis ruĝa kaj premegis siajn pojn. – Vi faras tro da demandoj! Afero propra al la scienco de la magiistoj, iu samranga al vi ne komprenus!

– Vi, friponoj, devus estis uzintaj tian aĉan sciencon por unue protekti Tedrison. – Vedd kolerete stariĝis kaj eliris.

Vedd faris rondiron en la urbo, provante malvarmigi la kapon. Li ne alkonformiĝis al tio, kio okazis al Tedrison. Lia domo estis detruita, kaj farelo, mortigita.

Tiu malbeninda konsilantaro de magiistoj! Eriana atentigis min kaj tiuj aĉuloj ignoris la minacon.

"Jes! Ili ĉiuj meritas la morton, Vedd."

Fermu la buŝon! Mi ne vokis vin ĉi tien!

"Vi koleras nur ĉar mi diras la veron!"

Ne, mi estas plenkolera! Ĉar vi trudis al mi mortigi tiujn homojn!

Vedd memoris tiun soldaton kiu petegis pri sia vivo.

– Mi petegas, ne mortigu min! – Tio estis la lasta parolo, kiun li diris antaŭ ol la Vortubra fortranĉis lian kapon.

"Mi faris nenion, kaj la mano estis la via! Vi faras uzon el ĝi laŭ via bontrovo!"

Fermu tian buŝon! Vi neniel diras la veron. Vi nur mensogas al mi la tutan tempon!

"Ĝis baldaŭ, Vedd. Volu malvarmigi vian kapon, ĉar tiel vi ne sukcesos profite trejni, ĉu vi forgesis?"

Vedd reiris al la gastejo post la rememoro.

– Mi preskaŭ forgesis, ni interkonsentis trejni. – li alvenis dirante al Renkiono.

– Efektive. Venu kun mi.

– Kaj via amiko?

– Li iris solvi problemojn de la ordeno de la magiistoj. Vi ambaŭ ne bone rilatas unu kun la alia...

– Li malplaĉas al mi. Li min rigardas kiel se li estus min kulpiganta pri io. Krome li la tutan tempon turnas la okulojn al mia glavo.

– Li nur estas maltrankvila. Li multe scias pri la Vortumbra. Li kredas, ke ĝi estas io danĝera.

– Ha, pri tio nur mi scias. Tiu batalo...

Renkiono silente paŝis, sed Vedd nenium vorton plu diris pri tio. Ili sekvis laŭ dekliva strato ĝis ruinigita domo sur la supro de krutaĵo. Ĝi estis invadita de vegetaĵaro, sed post ĝiaj randoj troviĝis maldensejo.

– Ĝi estis terura, verdire. Pli malbona ol la milito kontraŭ la kuneoj. – Vedd sindetene diris per lamenta tono.

– Tiu tuta afero pri armeo de norukoj estis frenezaĵo. Mi opiniis, ke la antikvaj rakontoj pri ilia kuniĝo por luktado estis nura legendo.

Renkiono eltiris du lignajn glavojn el sako kiun li kunportis surdorse.

– Prenu.

Dum granda parto de la tago ili skermis. Renkiono venkis ĉiujn disputojn kaj provis instrui defendajn kaj atakajn teknikojn al Vedd.

– Nu, atentu, Aveto Vedd! Tio estas glavo kaj ne lanco. Ĝustigu vian manartikan tenadon de la glavo!

– Vi agas same kiel serĝento Sompir.

– Ĉu estis li, kiu vin trejnis kiel lanciston?

– Jes, li mem... Sed li bone prisciis la aferojn.

– Ĉu vi volas diri, ke mi ne scias?

– Ne, Renkiono, nenio tia. Ni daŭrigu! Mi laŭŝajne bone adaptiĝas!

La volo superi Renkionon estis stimula al Vedd. Sed kiam la nokto proksimiĝis, lia malvirta inklino por trinkaĵoj kaj virinoj pli laŭte parolis.

"Sufiĉas! Sufiĉas ludi per glavetoj! Kalim, Ĵirene kaj ĉiuj tiuj frandaĵoj atendas vin, Vedd".

Li kontraŭmetis neniun argumenton al tiu penso.

– Sufiĉas por hodiaŭ, Renkiono.

Vedd adiaŭis lin kaj iris al la bordelo.

16 – La senkapiganto de Ĵafo

Tri tagojn poste, la kutima trejnado de Vedd pludaŭris firma kaj intensa. Oni povus konstati la unuajn signojn de plibonigado de lia tekniko, kvankam li daŭre estis superata, fojo post fojo, de Renkiono.

Ili haltis por ripozi kaj Vedd, tute ŝvitanta, trinkis akvon pro refreŝigi sin. Li repensis pri Kuska. Ili dum du tagoj ne renkontis lin, sed tiu revenis tiumatene kunportante pli da novaĵoj. Du aliaj mortigoj okazis. La sorĉistoj ekhavis timon. Dum la matenmanĝo, Kuska ĵetis malvarman rigardon al Vedd. Li sentis sin ĝenata, sed decidis fari nenion pri tio.

Vedd deviŝis la ŝviton de sia frunto evitante enlason en la okulojn.

– Mi ne ŝatas la manieron laŭ kiu Kuska rigardas min.

– Mi jam diris al vi, ke vi estas nur maltrankvila...

– Krom tio, nuntempe mi eĉ ne faris uzon el la glavo, aŭ ion similan. Verdire, la glavo iom timigas min

– Fakte? En kiu senco? – Renkiono tuŝis per la fingroj la malbelan ruĝan cikatron kiu etendiĝis sur lia vizaĝo.

– Mi ne scias klarigi, sed kiam mi mantenas ĝin, mi sentas ion glacian. Io parolas kun mi. Mi trovas, ke ĝi estas ja malbenita, ĝi trudis al mi mortigi homon kontraŭ mia volo.

Renkiono restis silenta kun grava esprimo en la mieno.

La spirado de la juna Vedd estis rapidanta. Forta angoro lin regis, sed fine li sukcesis malŝarĝi sin – Mi volis ĵeti ĝin en la fundon de la maro.

– Ne, ne faru tion! Ni bezonas ĝin por kapti Le'damanon.

– Kial do vi ne uzu ĝin?

– Mi uzis ĝin kiam ni estis atakitaj de la norukoj. Eriana min instruis, sed mi estas certa, ke mi ne sukcesis kontroli ĝiajn povojn. Malsame okazis rilate vin, ĉar kiam vi ĝin prenis je la mano, ĝi funkciis.

Mi urĝe bezonas liberigi min de ĝia jugo. Tiu glavaĉo min detruadas.

– Probable via amiko Kuska sukcesos instrui vin uzi ĝin? – insistis Vedd.

– Bone, ni povas provi... Ĉu vi rezignas venĝi sin kontraŭ la malfeliĉulo kiu forprenis de ni ĉion?

La emocioj forte alterniĝis en la koro de Vedd. Kaj tuj poste tre forta kolero kaj deziro pri venĝo refoje ekregis lin.

"Vi ne povas lasi senresponda la detruon de Tedriso, Vedd! Eriana mortis ankaŭ pro tio! En ĉio kulpas tiu damna Le'Daman! Vi bezonas trejni por ke ni detranĉu la kapon de tiu mizerulo!"

Li ekprenis la lignan glavon kaj diris.

– Nu, ree al trejnado!

En tiu vespero, Vedd eliris por sia kutima vagado. Li ĉiam kunportis la Vortumbran. Sekvante laŭ la vojo al la bordelo, li aŭdis paŝojn post si. Tio igis lin ekpreni la tenilon de la glavo. Tiu frostiga sensacio lin ekposedis. Li sentis post si la varmon de estulo, la energion de vivantulo kiu povus esti elsuĉita. Li subite haltis kaj eligis la glavon.

– Hej, trankviliĝu, amiko, tio estas mi, Kuska!

– Vi intencas preni mian glavon, ĉu ne?

– Ne, ne... pli konvene estas mallevi la armilon, ĉu bone?

– Ne, se vi ne mallevos tiun bastonon.

La spirado de Kuska fariĝis pli rapida. Vedd sentis lian manifestatan timon. Iom tremante, li kuŝigis sian bastonon sur la teron.

– Vidu, ni estas amikoj...

– Kion vi volas?

– Nu, Renkiono parolis al mi, ke vi iras... ĉiujn vesperojn... al la...

– Al la putinejo.

– Prave.

– Mi neniam... mi volas diri...

– Vedd eningigis la glavon kaj ekridegis.

– Ĉu vi serioze parolas? Venu kun mi, magiisto. Mi montros al vi ion vere interesan, kion vi povas fari per via bastono.

– Mia bastono?

Vedd suspiris. *Kiel povas esti iu tia, tiel naiva?*

– Nur ekprenu tian lignaĉon kuŝantan sur la tero kaj venu kun mi.

Ili alvenis al la bordelo, kie oni tre bonvenigis al Vedd.

– Venu ĉi tien, Kalina – li donis kison al la bela prostituitino kun longaj nigraj haroj – ĉi tiu estas Kuska. Li estas virga.

La magiisto tute ruĝiĝis. – Mi ne... Mi ne diris tion... Mi nur diris...

Ridetante, la virino lin envolvis per siaj brakoj kaj lin kondukis en la domon.

– Restu trankvila kaj akompanu min, sinjoro Kuska. Ni tre bone zorgos vin.

Kuska estis kuntrenata de la virino, turnante sin malantaŭen kun peteganta rigardo, kvazaŭ iu kiu diras bonvole savu min de ĉi tiu embaraso.

Vedd ridis pri tio. Poste, kiel ordinare, li iom trinkis kaj iris al unu el la ĉambroj por ĝui sian plezuron. En tiu nokto, neniu loĝanto de Ĵafo perdis sian vivon.

Dum la tagmanĝo, en la sekvanta tago, Vedd alvenis al la gastejo kaj renkontis Renkionon kiu estis eksplode ridanta.

– Pri kio vi ridas? – Vedd estis scivola.

Kuska lin rigardis, ne plu kun la antaŭa malkonfido, sed kun kunula rigardo.

– Kuska estis rakontanta al mi pri hieraŭo. – Renkiono ridis. – Kaj ke li ankaŭ enretiĝis kun la gvidantino de la ordeno por klarigi kie li pasigis la nokton.

– Kaj kion vi diris? – Vedd demandis, sidiĝante.

– Ke mi estis laboranta.

Vedd ridegis kune kun Renkiono. – Fakte, laboranta!

– Ĉu estas maloportune al vi reiri tien hodiaŭ? – Kuska trinkis el la vino.

Vedd ridis – kompreneble ne. Akompano estas bonvena. Ĉar eĉ Kuska iros, kial ankaŭ vi ne iru, Renkiono?

La kavaliro tuŝis sian vizaĝon, rigardis malsupren kaj balancis la kapon.

– Kaj do? Ĉu ia novaĵo! – Vedd demandis kuskan.

– Ho jes, mi volas diri, ne. Nenio okazis en la hieraŭa nokto.

– Renkiono diris, ke vi multe legis pri la Vortumbra. Pri kiu ĝin forĝis.

Kuska mordis la lipojn. – Bone, ĉio okazis antaŭ longa tempo. Antaŭ ol la antikva imperio. Tial la priskriboj ne estas precizaj...

– Ha, bone, sed finfine kiu ĝin forĝis? Kaj kial?

– Sendube tion faris la magiistoj de la antikva ordeno, la magiasesoj. Ili administris la provincojn antaŭ ol la estiĝo de la imperio. La problemo kuŝas sur tio, ke en la antikva ordeno ne ĉiuj praktikis la sekurajn formojn de la magio.

– Kompreneble, sed kial?

– La Vortumbra kaj aliaj armiloj estis faritaj por kontraŭbatali la hordojn de la Drako-Dio.

– Drako-Dio?

– Jes, nuntempe malmulton oni konas pri li. Oni scias nur, ke lia mensa magio estis kapabla sklavigi homojn, norukojn kaj duon-inteligitajn estulojn, kiel la drakojn. Ĉiuj armiloj, kiel la Vortumbra, protektas siajn portantojn kontraŭ la mensa posedo. Krom tio, evidente ili estas kapablaj potencigi plurvariajn magiojn tial ke ili estu vere mortigaj, eĉ kontraŭ kreitaĵoj kiel drakoj. Tial do ili estis faritaj, por detruigi potenciajn malamikojn kaj protekti la provincojn kontraŭ la avanco de la hordoj.

– Ĉu tio sukcese plenumiĝis? – demandis Renkiono.

– Kompreneble, sed ne sen la ekesto de kelkaj problemoj. Estas fakto, ke tre granda povo estis aldonita al tiuj armiloj kaj multaj el ili fariĝis danĝeraj al tiuj, kiujn ilin uzas kaj ankaŭ al iliaj aliancanoj. Se la portanto ne kapablos regi la povon de la klingoj, tiu povos laste esti regata.

– Mi do estis pensanta. Mi konkludis, ke mi ne volas plu havi tiun aĵon je mia dispono. Tre malfacilas al mi elteni tiujn mortojn en mia konscienco.

– Klare, vi plene pravas. La unua tasko, kiun ni devus plenumi, estas enmeti ĝin en keston aŭ ion tian. Ni eltiru ĝin nur kiam ekstreme necese.

"Ne, Vedd, ne faru tion! Vi ne povas rezigni vian venĝon!"

Fermu la buŝon!

– Prave, mi konsentas. – diris Vedd.

– Vidu, mi ne konsentas kun tio, ni devas esti pretaj alfronti Le'Damanon en kiu ajna momento – diris Renkiono, sed li rekonsideris ekvidante la tremantajn manojn de Vedd – tamen, ĉio en ordo. Miaopinie, teni ĝin en skatolo kaj proksima ne tiel malkonvenas.

– Mi iros prizorgi ujon. Mi revenos hodiaŭ vespere. – diris Kuska sintenante pli trankvila, tuj poste tamburante la tablon per la fingroj.

Renkiono kaj Vedd eliris por la vespera trejnado. Li kunportis la Vortumbran, ĉar ili konsentis, ke lasi ĝin en la pasgastejo tro elmetus ĝin al risko. La trejniĝo estis harda.

Vedd atakis Renkionon, farante finton. Renkiono provis defendi, sed tiam li estis forte trafita, kaj surteren falis sin gratvundante.

– Senkulpigu min, mi ne intencis! – diris Vedd.

– Ne, nenio tia! Ĝi estis lerta movo! – li diris ankoraŭ etendita sur la tero. – Krom tio, mi iom malatentis.

Nekredeble! La unuan fojon mi faligis lin! Laŭŝajne mia tekniko vere pliboniĝas.

Renkiono stariĝis, iom ĝemetis sentante dolorojn.

– Ni plibone finu la hodiaŭan trejnon.

– En ordo! Mi rondiros ĉirkaŭe. – Vedd foriris vigle animita, malgraŭ ĉio kion ili travivis, tiuj lastaj tagoj estis bone oportunaj al ili.

Ĵafo estas vere mirinda urbo! Ĝi havas tre bonan etoson! Bonegajn bordelojn. Ankaŭ eksterordinarajn kuiristojn!

Vedd ekperceptis, ke li preterpasas la domon de sia nepo, Rin'le. Li iris tien kaj reen antaŭ ĝia pordo.

Kion mi povas diri al li? Kiel kredigi al li, ke mi estas lia avo?

Li ekhavis kuraĝon kaj frapis je la pordo.

– Jes? – la junulo akceptis malkonfide lin rigardante.

– Vi nomiĝas Rin'le, ĉu ne?

– Jes, kion vi deziras?

– Mi venis por paroli pri via avo.

Rin'le premis la okulojn kaj lia mieno fermiĝis.

– Ha, vi estas tiu bedaŭrinda frenezulo kiu venis alian tagon! Foriru de ĉi tie kaj ne plu revenu!

La juna Vedd tuŝis liajn brakojn kaj petegis – Ne Rin'le, atendu, mi povas klarigi!

– Ne tuŝu min, senprudentulo! – Rin'le pelis Veddon malantaŭen. Li stumblis sur ŝtoneto kaj falis sidpozicie. La fizika doloro, la doloro el malakcepto kaj el malkompreno kuniĝis al la negativaj sentoj kiuj jam alterniĝadis en lia menso en la lastaj semajnoj.

Instinkte li ekprenis la tenilon de la Vortumbra kaj tiu glacia jukado supreniris sur lia brako. La racia parto de lia menso foriĝis. La glavo estis ĉiam soifanta. Des pli, ĉar jam de kelkaj tagoj ĝi ne postulis viktimojn. Kiam Vedd rekonsciiĝis, la kapo de lia nepo estis rulanta sur la pavimo de la strato. Li bezonis kelkan tempon por efektive kompreni kio okazis, tiam li lasis fali la glavon kaj surgenuiĝis plorante.

– Pardonu min Rin'le! Pardonu min, mi ne volis, ne volis!

Ankoraŭ estis momento de surstrata moviĝado. Multaj personoj ĉeestis la murdon kaj tuj kriis, petegante pri helpo. Vedd ne atentis la kriojn kaj la diskuradon.

Nenio plu gravas! Mi mortigis mian nepon! Mortigis mian nepon!

Du gardistoj kaptis Veddon je la brakoj kaj lin levis. La edzino de Rin'le venis vidi kio estis okazanta kaj ellasis agonian krimon. La gardistoj kondukis Veddon al la gardistaro, tiel same la Vortumbran.

*Prave! forportu tiun glavon! Loku ĝin for de mi! Malbenita Vortumbra!
Estu malbenita!*

Ne longe daŭris por ke disvastiĝu la novaĵo. La senkapiganto de Ĵafo estis kaptita.

Oni arestis lin en malpura kaj malluma ĉelo, kie blatoj kaj aliaj estaĵoj okaze suriris liajn krurojn kaj brakojn, sed nenio tia gravis, li volis nur morti.

Pli malfrue, Vedd havis lian vidadon duonblindigita de torĉa lumo.

– Aveto? – sonis la voĉo de Renkiono.

La menso de la oldulo nenion respondis. Lia korpo estis juna, sed lia menso pli ol ĉiam restis maljuna.

Renkiono lumigis la ĉelon kaj dekduoj da etkreitaĵoj fortiriĝis al mallumaj anguloj. La militisto malleviĝis apud Vedd.

– Do, estis ja vi?

Vedd rigardis malsupren, li kaptiĝis en reto de mallamo al si mem kaj perdo de volo.

– Ĉu ja vi mortigis ĉiujn tiujn homojn? Ankaŭ la magiistojn?

Vedd restis silenta, kvazaŭ neniuj estis tie, nur malplena ŝelo.

La voĉo de Kuska elaŭdiĝis el malantaŭe, li ne havis kuraĝon eniri la ĉelon.

– Sendube estis li, Renkiono. Aŭ plibone klarigante, lia korpo simple agis kiel instrumento de la glavo, kiu estis la vera ekstermanto.

Vedd atente aŭdis tion. Li ne povis ne konsenti, sed li estis tro senvola por eĉ geste signi.

– Bedaŭrinda ulo – konkludis Kuska.

– Aŭdu Aveto Vedd – Renkiono havis sufokitan voĉon – sciu, ke... – li englutis larmon – sciu, ke vi estis granda amiko. Ke mi ĉiam estos danka.

La okuloj de Vedd leviĝis, plenaj de larmoj. Ili silente ruladis.

– Ni iru, Renkiono, ni bezonas decidi, kion ni faros rilate la glavon. La konsilantaro volas denove sigelfermi ĝin.

Renkion leviĝis kaj profunde spiris por forigi la ploron.

– Diru vi al li, mi ne sukcesas. – la princo petis.

Kuska elpurigis la gorĝon kaj diris – Mi tre bedaŭras, Vedd, sed vi estis juĝata de la juĝistoj. Via ekzekuto estas difinita kaj okazos tri tagojn post hodiaŭ.

Vedd konturis ian rideton.

Fine, jen konsola perspektivo! La morto proksimiĝas!

17 – la interfrapo de la nigraj klingoj

Lia stomaka doloro forpasis post unu tago. La malsaton anstataŭis profunda letargio kaj ia paca kvieteco de lia korpo. Krom tio, lia malgranda fingro ŝajnis pezi preskau unu tunon. Eble li havus la sorton morti antaŭ ol la tago de ekzekuto. Li tie kuŝis sur la planko, meze de siaj propraj fekaĵoj. La blatoj, majskaraboj kaj formikoj libere moviĝadis sur lia korpo.

Provoso aliris portante du sitelojn kun malvarmega akvo, kiun li ĵetis sur lin. Tio kuntiris liajn muskolojn. La karceristo lin piedbatis.

– Eliru el tiu angulo, malbenita! Tuj, eliru!

Vedd trenis sin al unu flanko kaj tremis de malvarmo. La laceco kaj la doloro lin regis. Li jam ne sukcesis verŝi larmojn kaj laceĝinta li falis en dormadon.

En lia sonĝo, li sentis la glacian tuŝon de la Vortumbra ĉirkaŭ si. Estis sufoke. li volis eskapi el tio. Li kuris, sed li stumblis. Liaj maldikaj kaj maljunaj kruroj estis malfortikaj, pli ol iam antaŭe. Lia mano estis plena de makuloj, nur haŭto kaj ostoj.

La verda fajro lin persekutis. Li vidis la demonon el ostoj antaŭ si. Ankaŭ aperis al li la guldo Daman. Ties okuloj, flaviĝintaj, brilis kiel en la priskribo de Renkiono. Tiu kaptis la falĉilon el lia mano kaj ridegis.

– Mi detruos ĉion, kion vi amas!

Vedd kuris, fuĝante de la guldo. La norukaj militistinoj iris al li el la alia flanko. Unu kaptis lin kaj mordis lian manon. La sono de la osta muelado estis malagrablega. La akuta doloro. Tiam la Vortumbra ekaperis en lia alia mano. Per la klingo li tranĉis la norukon en du partojn.

La dolĉa kontenteco je la buĉado revigligis lin. Tuj sekve, alvenis la drakoj kaj la magiistoj. La virinoj de la bordeloj. La vortumbra sensoifigis sin per ĉies sango. Lia edzino venis, ŝi jam estis mortinta, sed tio ne gravis. Ankaŭ ŝi subfalas sub ĝia klingo. Renkiono ekaperis plorante, ne de doloro, sed de danko.

– Liberigu min de tia difektaĵo! Mi ne plu eltenas la manieron, laŭ kiu la virinoj min rigardas!

La oldulo ankaŭ lin tratranĉis. Lia kapo falinta surteren ankoraŭ estis dankesprima.

– Dankon por ĉio, Aveto! Dankon al vi, ke vi min mortigis!

Vedd vekiĝis ekstremanta. Ankoraŭ vivaj estis la imagaĵoj el la premsonĝo, sed la plej malbona el ili, tiu de la kapo de lia nepo sur la pavimo, tuj ekaperis, malpliigante la terurecon de tiu premsonĝo.

Vedd kriis en la ĉelo. Krioj de frenezo. Li enkroĉigis siajn ungojn en la vangojn, gratvundante sian karnon. Baldaŭ la tieaj insektoj trinkus iom de la sango kiu elŝprucis en la mallumo.

Li deziris reveni en la tempon. Li bedaŭris, ke tiu drako, en Tedriso, ne estis fininta lian vivon. Sed Eriana kaj la aliaj alkuris por malebligi tion. Li ankaŭ bedaŭris, ke li ne estis mortinta, kiam li estis malfortika malliberulo en la vilaĝo de la norukoj. Sed lian vivon savis Klapuo. Aŭ, ke li ne estis disfrakasita de Patrino Gtu, sed la Vortumbra ne lasis tion okazi.

Ankoraŭ unu fojon, oni alportis akvon kaj manĝaĵon, sed li rifuzis. Tio ne valoris la penon. Li flanken falis, atendente ke la morto lin forportu.

Ankoraŭ pasis alia tago kaj lia menso kvazaŭ perdiĝis en frenezeco. Li aŭdis malproksimajn kriojn. Ili ŝajnis realaj, sed povus esti la krioj de la arestitoj,

kiujn oni uzis kiel homajn ŝildojn. La teruro vidi, ke la sagoj alfluas kaj falas sur iun karan personon ĉeflankan, pikas al tiu la propran karnon, tamen ne kaŭzante la morton. La krioj daŭris. Ĝis la ĉelpordo ricevis fortan baton kaj duan alian. BAM! BAM!

Ĉe la tria bato la pordo cedis kaj malfermiĝis.

– Aveto! – Renkiono voĉis senespera.

La olda Vedd turnis la okulojn kaj nur vidis la ombron de la militisto kontraŭ la konturo de la porda kavo. Li havis la glavon ĉemane. La oldulo kuntiriĝis, kiam li ekvidis malluman tavolon, kiu ŝajnis suĉi de sur la mano de la princo la tutan lumon ĉirkaŭan. Li sentis la glacian blovon de la Vortumbra en sia brusto. Renkiono eningigis la glavon kaj proksimiĝis al Vedd. Lin prenis per la mano por starigi lin.

– Tio estas la drakoj! Ili trovis manieron transpasi la baron faritan de la magiistoj.

La olda Vedd estis kuntrenata de Renkiono for de la malliberejo. La brulodoro invadis iliajn naztruojn. La fumo ardigis iliajn okulojn. Fariĝis varme, kiam ili trairis koridoron kaj unu ĉambron en flamoj. Ekstere ambaŭ multe tuis, ĉe mikso de tusemo kun vomemo. Vedd vidis du brulantajn korpojn sur la strato. Tio memorigis lin pri la tragedio de Tedriso, kaj li aŭdis la blekadon de unu el tiuj inferaj bestoj.

Nur nun Renkiono klare vidis la figuron de la oldulo. Tiuj tri tagoj en la karcero, aŭ eble lia daŭra foresto for de la Vortumbra rapide maljunigis lin. Li havis la aspekton de mezaĝa persono, eble kvindek-jaraĝa. Liaj haroj estis grizaj kaj lia vizaĝo, stampita de sulketoj.

– Ĉu vi mortigis tiujn magiistojn, aŭ ne?

Vedd daŭre rigardis Renkionon sen reago. Renkiono kaptis lin ĉe la ŝultroj kaj lin premskuis.

– Nu, malbenita! Diru ion! Ĉu vi ilin mortigis aŭ ne?

– Ne... – lia voĉo eliĝis raŭka. – Mi kredas, ke ne.

– Mi supozis! Mi diris al Kuska, sed li...

– Larĝa ombro etendiĝis super la duopo. Renkiono pelis la oldulon kontraŭ la plankon kaj ili apenaŭ eskapis de la drak-atako.

La drako alteriĝis, rompante per sia peza vosto la tegolojn de iu domo. Ĝi malfermis la grandegan buŝon plenan de akraj dentoj. Ĝiaj skvamoj estis nigraj kaj rebrilis sub la suno. Ĝiaj flavaj okuloj ŝajnis avidaj.

Renkiono helpis la oldulon stariĝi. Li portis du ingojn kun glavoj. Unu, ordinara, kaj la dua estis la Vortumbra.

– Prenu ĝin, Aveto! Mi ne sukcesis ĝin uzi.

La oldulo ne volis, kuntiriĝante, sed tuj poste, je lia surprizo, la tenilo de la glavo jam estis sur lia manplato. Li tenis ĝin firma, sentante la glacian tuŝon tra sia korpo.

La drako antaŭis kaj la oldulo murmuris – Pardonu min...

Tiam la klingo trarompis la aeron, malfermante fendon al la malsupera dimensio. Li enpaŝis, lia figuro fariĝis malklara kaj tuj poste, etera antaŭ la okuloj de Renkiono kaj de la Drako..

La drako trafis Renkionon per rapida atako. Renkiono ne havis tempon deturniĝi, sed sukcesis precize enmeti la glavon en la buŝon de la drako. Kiam sinsekvis la mordo, du dentoj ŝiris lian antaŭbrakon, sed la glavo restis trapasita tra la mandiblo malpermesante al la sovaĝa besto plenfermi la buŝon.

La drako eligis akran blekon kaj skuis la kapon. Renkiono estis ĵetita flanken, lia brako estis disŝirita per pluraj dentoj kaj la glavo fiksiĝis kun la pinto enigita en la interna supro de la draka buŝo. La drako antaŭeniris en la direkto de la falinta militisto, sed antaŭ ol ataki ĝi ekstremitis. La oldulo ekaperis el la ombroj epikante ĝian nukon per la Vortumbra. La drako aplombe malleviĝis sur la plankon kaŭzante fortan bruon.

Ankoraŭ pli juna kaj revigliĝinta, kiel se li estus manĝinta, trinkinta kaj ripozinta, Vedd iris al Renkiono kaj etendis sian malpuregan manon por helpi lin leviĝi. La antaŭbrako kaj la buŝo de Renkiono estis kovritaj de sango. La Vortumbra kaptis la ĉeeston de pliaj drakoj en la ĉirkaŭaĵoj kaj ĝia soifo je draka sango estis granda, la plej granda kiun vedd iam perceptis.

"Ili estas drakoj, Vedd! Mi amas mortigi drakojn! Tial mi ekzistas!"

– Vi povas konfidi min, nunmomente – Vedd diris. – Ĉiam kiam la drakoj estos proksimaj, mi opinias ke vi kaj la aliaj estos sekuraj. La glavo nenion volas krom la sango de tiuj bestoj.

Lia menso klare rezonis. Sed li sentis la soifon de la Vortumbra antaŭeniganta lin. La tuta perdo de lia vivosenco estis malklara. Lia vivo tiumomente havis ununuran signifon: mortigi drakojn.

Renkiono stariĝis grimacante de doloro kaj kunpremis la brakojn al la korpo. Ne eblis esti pli malbela ol tio.

Hieraŭ vespere du magiistoj mortis senkapigite. — Renkiono diris. — Sajnis ke vi akiris la famon pro ĉiuj mortoj, malpliigante ĉe ili la defendajn zorgojn.

— Vere mi ne memoras ĉu mi mortigis iun magiiston, sed mi pli kaj pli dubis pri mi mem. En la unuaj tagoj en Ĵafo mi mortigis kuneon en la dokoj kaj ankaŭ tri banditojn.

— Ni iru, Kuska diris ke li aliros al la flava turo. — li indikis konstruaĵon kiu de tie similis malproksiman dent-bastoneton en la alia flanko de la urbo.

Ili sekvis laŭ la direkto de la dum interparolo. La urbo estis mergita en ĥaoso. Malproksime pluraj drakoj supren kaj malsupren flugis super la domoj, temploj kaj konstruaĵoj de Ĵafo. Ĉie oni vidis fajrajn makulojn. Homoj kriis kaj diskuris. Multaj provis eskape forkuri per la ŝipoj.

Ankoraŭ unu fojon, Vedd kaj Renkiono kuris kontraŭ la alfluo de homoj, inklinaj alfronti la danĝeron de la drakoj.

— Kuska proponis, ke ni elliberigu lin por ke ni uzu la Vortumbran kontraŭ Le'Daman.

— Ĉu tiu mizerulo do estas ĉi tie?

— Kuska kredas ke jes. La protekta baro kontraŭ la drakoj estis farita ekde la turo. Sed ĝin oni malaktivigis. Certe la sorĉisto troviĝas tie.

La oldulo pelis Renkionon al strat-angulo.

— Hej, kion vi faras?

— Restu ĉi tie.

Vedd iris ĝis la mezo de la strato kaj la drako saltis sur lin. Al Renkiono ŝajnis, ke li estis kaptita, sed la drako turnis sin, iom konfuza. La maldika parto de ĝia antaŭa piedego rompiĝis igante ĝin fali flanken kaj eligi suferan kriegon. Du sinsekvaj profundaj tranĉoj aperis en la kolo kaj en la kapo de la drako. Oni vidis ununuran ombron ĉe la flanko de la besto furioze frapanta ĝis la drako falis senviva.

Vedd reaperis, ĉi-foje ankoraŭ pli juna, kun aspekto de viro ĉirkaŭ kvardekjara.

Renkiono aplaŭdis — Brave! — mi sciis, ke vi estas mortiganto de drakoj en la unua fojo kiam mi vin vidis, Aveto!

Ili pluiris tra la stratoj, Vedd kaj la Vortumbra batfaligis pliajn du drakojn sur la vojo ĝis ili atingis la flavan turon. Ĝi estis tiel nomita, ĉar ĝi estis konstruita per blokoj el flavaj ŝtonoj alportitaj per ŝipo el la sudo de la regno. Suĉante la energion de la drakoj, Vedd juniĝis kaj fortiĝis ankoraŭfoje.

Apud la turo okazis batalo inter la magiistoj. Fajreroj el magia energio intertuŝiĝis. Ili tuj vidis la figuron de Le'Daman. Li ŝvebis en la aero, ĉirkaŭita de verdeta energio-aŭreolo. En unu el la manoj li portis maldikan kaj longan bastonon kun kristalo ĉe la pinto. En la alia mano li tenis falĉilon, kies klingo estis farita el malhela metalo, tia kia tiu de la Vortumbra. La blankaj haroj de Le'Daman estis nun nigraj, kiel en lia juneco.

Vedd lin rekonis. La guldo Daman estis do la apostata sorĉisto.

La malfortika kaj delikata aspekto, kiun li havis, ne estis tiu sama priskribita de Renkiono. Li estis maldika, sed tre muskol-forta.

Li ne estis tiel forta, kiam juna!

Vedd ne memoris kio okazis tuj post kiam Daman lin helpis detrui la demonon el ostoj.

– Transdonu al mi la falĉilon, soldato! – la guldo Daman diris starante en ioma distanco de Vedd.

– Kial vi volas mian falĉilon! Ja mi ĝin prenis! Ĝi nun apartenas al mi!

– Ĝi estas maligna – diris la guldo – ĝi superregos vin! Nur bone trejnita guldo kiel mi povas sekure ĝin manuzi.

– Ne! Ĝi estas mia!

– Pardonu min soldato, sed eble tio dolorigos. – kaj Daman elpafis sian magion, kiu tremigis Veddon kaj lin faligis hirta kiel ŝtonon sur la teron.

Tiam intense pluvis. Vedd vidis la guldon kliniĝi super li kaj ekpreni la falĉilon. Tuj kiam li ĝin tuŝis, li vidis flavecan brilon ekaperi antaŭ la okuloj de la... – momenta magiisto.

Daman etendis la manon al Vedd kaj helpis lin stariĝi.

– Bonega laboro, soldato! Kiel vi nomiĝas? Ĉiuj volos scii la nomon de la viro kiu min helpis mortigi la demonon.

– Vedd'terys Mol'empro.

En la estanta momento, Vedd stumblis sur kadavro de iu fulm-mortigita magiisto. Tio forigis la memoron pri lia mallonga renkontiĝo kun Le'Daman en la pasinteco. Kuska kaj tri aliaj magiistoj kune batalis kontraŭ la apostata sorĉisto, kaj Vedd vidis ke tie estis pluraj aliaj kadavroj, kelkaj ankoraŭ eligantaj fumon.

– Le'Daman! – Vedd furioze kriis. Lia tuta doloro, ĉio kion li estis trapasinta, aliiĝis en malamon kontraŭ tiu sorĉisto. Li lin rekonis laŭ la vestoj.

Tiu fiulo! Tiam do estis li kun la Patrino Kullat! Ekde la komenco la damnito ĉefrolis en la ribelo de la norukoj!

Kuska kaj la ceteraj turnis sin por konstati kiu estis krianta, sed ne Le'Daman. Li profitis tiun oportunan distriĝon. Li antaŭeniĝis per malaŭta rapida flugo, tenante falĉilon, kaj rompis en du partojn la amikon de Renkiono.

– Kuska! – la princo kriegis.

La tri magiistoj pafis kontraŭ Le'Damanon, sed ili maltrafis kun siaj elradiaĵoj.

– Stultaj! Nenian ŝancon vi havas kontraŭ mi.

Li flugis returne al la supro de la turo.

– Mi donos al vi la lastan ŝancon submetiĝi al mi.

– Neniam, malbenita! – tio estis la respondo de la estro de la ordeno. Lia antaŭe eleganta vesto estis bruletigita kaj ŝirita.

– Kaj rilate al vi, junulo! Kuniĝu al mi kaj ni regos ĉi tiun landon. – li diris al Vedd.

Li nenion respondis. Li nur lin rigardis distilante malamon.

– Tre bone... – diris Le'Daman – Ne forgesu mian korfavoron, ĉar en la fino mi permesis al vi elirvojon.

La sorĉisto elvokis elradiaĵon rekte kontraŭ Vedd, sed li tranĉis la aeron per la Vortumbra kaj alpaŝis en la ombran dimension. La energio trafis la lokon kie li staris kaj eksplodis kelkajn ŝtonojn el la pavimo. Kelkaj varmaj pecoj alĵetiĝis super Renkiono, kiu retropaŝis kuntiriĝante.

Responde, la sorĉistino kaj la aliaj du magiistoj elblovis bluajn radiojn al la alto. Le'Daman haltigis la flugon kaj rapidece falis por eskapi, iom malakcelante la alflugon. La radioj atingis la flankon de la Turo ĝin bruletigante. Fragmentoj absorbintaj magian energion ekzage falis kiel energia pluvo. La elradiaĵoj estis mortigaj, tamen ili samtempe estis mirinda piroteknika spektaklo.

Unu drako preterfluge malsupreniĝis kaj buŝkaptis unu el la magiistoj lin forportante ĝis liaj krioj estingiĝis dum li estis englutita.

Tuj poste la falĉilo de Le'Daman baris la baton de la Vortumbra, kiu rekte eliĝis for de la ombra dimensio. Vedd eliris kune kun la klingo, la du armiloj ŝuŝis kaj fulmis ĉe la interfrapoj de unu kontraŭ la alia. Nigraj Fajreroj suĉis la lumon de la medio. Le'Daman kraĉis verdan fajron kontraŭ la vizaĝon de Vedd, kiu havis siajn harojn bruletigitaj kaj sindefende paŝis malantaŭen. Liaj okuloj larmis kaj ĉio fariĝis al li nebuleca. Vedd kunpremis la dentojn kaj preskaŭ falis, sentante ekbruli la cikatron de la brako.

La sorĉisto atake alĵetis sin kun la falĉilo, profitante la vundeblecon de Vedd, sed la estrino de la magiistoj ĝin repuŝis lastmomente per energihava vipo. Le'Daman tuŝis la vipon per sia bastono uzante la energion de la vipo por elsendi flamojn el verda koloro. Tio bruligis la manon de la sorĉistino kaj ŝi falis malantaŭen kriante el doloro.

Vedd profitis la oportunon por tranĉi la aeron kaj retiriĝi en la ombroj. Le'Daman kuris kontraŭ la vundeblan estrino, sed la alia magiisto antaŭeniĝis por ŝin defendi.

La ribeliĝinta sorĉisto flugigis la falĉilon en la direkton de la magiisto. Tiu provis levi protektan ŝildon, sed ĝi ne rezistis kaj estis trapikita de la nigra falĉilo. Lia brako kaj ŝultroj flanken flugfalis pro la tratranĉo de la klingo. La energio akumuliĝinta en lia korpo ŝprucis el la vundo kune kun la sango. Li falis surteren ĝemante, mortonta post momento.

En la ombroj, Vedd ankoraŭ palpebrumis per la fajre vunditaj okuloj, provante vidi trans la makuloj. Li sukcesis vidi, ke Le'Daman ne portis sian falĉilon kaj supren etendis la dekstran brakon kiel se por kontroli la flugon de la klingo.

Vedd antaŭeniris, elirante el la ombroj en la momento kiam la falĉilo returnis al sia posedanto. La pinto de la falĉila eniĝis en lian dorson trapasante lian dekstran pulmon. Li elkraĉis ŝprucaĵon da sango kontraŭ Le'Damanon kaj tuj poste li eniĝis la Vortumbran en la abdomenon de la sorĉisto.

La du klingoj eksuĉis el ili la vitalan kaj magian energion. Vedd apogis sin per unu el la manoj sur la ŝultro de Le'Daman. La du frontis unu la alian.

Le'Daman murmuris – la soldato?

– Vi antaŭe min savis, aĥ! – Vedd anhelis kaj sputis iom da sango – tempo por repagi.

– Repa... gi? – la okuloj de la sorĉisto montris konfuziĝon. – Min mortigante?

– Ne, vin savante... aah... de vi... mem.

La vitala energio de la sorĉisto ĉiam pli malintensiĝis. La haroj de Le'Daman fariĝis grizaj kaj poste tute blankaj, same kiel tiuj de Vedd. La haŭt-sulketoj ekaperis laŭmezure kiel iliaj haŭtoj sekiĝis. Vedd nun estis pli maljuna ol iam antaŭe, kvazaŭ li estus naŭdek-jara. Lia malfortika korpo ne plu sukcesis sin teni. Ambaŭ falis, kun la korpoj ankoraŭ traigitaj de la nigraj klingoj, kiujn neniu ekprenis evitante ricevi ilian energion.

Renkiono kuris por apudiĝi al la oldulo kaj eltiris la falĉilon el lia korpo. Li konformigis la kapon de la oldulo al sia brusto. La okuloj de la deformita princo estis plenaj je larmoj.

– Vi sukcesis, mia amiko, mortiganto de drakoj. Vi finpereigis Le'Damanon!

La oldulo ankoraŭ iel ekridetis. Liaj dentoj estis falantaj, lia buŝo pleniĝis de sango.

– La malfeliĉulo... aĥ... Estis li kiu kunigis... kunigis la noruk-patrinon! Mi vidis lin akompantan la Patriron Kullat!

– Je Fiste, Aveto!

– Detruu la Vortumbran. Kaj ankaŭ la falĉilon... Estis ĝi, kiu... humf... lin koruptis... Le'Daman estis la guldo... tiu kiu min savis... arrf... dum la milito. Ĉio... nun... havas... sencon...

Renkiono ne komprenis ĉion, kion Vedd volis diri per tiuj vortoj. Vedd penis pludiri ion, sed li ne havis sufiĉe da forto. Liaj okuloj fariĝis senmovaj, rigardante la malplenenon.

– Ripozu, mia amiko. La bardoj prikantos vian kanton. La legendo de la olda mortiganto kaj savanto de la regno de Kedpir neniam estos forgesita!

Le'daman kuŝis je du paŝoj de Renkiono, nura kadavro el haŭto kaj osto trapikita de l' terura klingo de la Vortumbra.

Lia ambicio havigi al si la regadon de la regno neniam konkretiĝis.

Epilogo

30 jarojn poste

La olda reĝo sidis sur sia trono. Ĉiuj tiuj personoj ĵus eliris, li fine povus ripozi dum kelkaj momentoj. Lia rutino kiel reĝo estis teda kaj plena de aŭdiencoj kaj ŝarĝoj. Li sopiris la tempon, kiam li estis erar-vaganta kavaliro kiu libere vojaĝis kun Eriana.

Li eltiris sian maskon el porcelano. Li estis konata kiel la Reĝo de la Blanka Vizaĝo. La vizaĝo sub la masko estis terure deformita. Li neniam forgesus la abomenindan Patrionon Gtu. Uzi maskon estis la plej bona maniero eviti ke la personoj estu ĝenataj de lia malbeleco.

Li memoris pri la tiama tempo, kiam li estis deklarita heroon de la regno de Kedpir, antaŭ tridek jaroj. Verdire li nur plenumis kunaktorinon. Post kiam ili venkis Le'Damanon, li havis la okazon koni la reĝon Hasgur de Kedpir, al kiu li amikiĝis. Kiam li malkaŝis sian sekreton: esti la lasta princo de Dera, li havis plenan apogon de Kedpir kaj gvidis milit-iron por eksigi la despotojn, kiuj regis lian naskolandon.

Ĉe la venko en la milit-iro, li postulis returne la tronon, kiu laŭleĝe apartenis al li. Dera kaj Kedpir fariĝis aliancitaj.

Nun, jam maljuna, li memoris la oldulon al kiu li ŝuldis sian vivon, kaj ankaŭ sian rekonon kiel heroon. Tiu certe estis posedita de timeginda destino. Kelkaj opinias, ke iu naskita sub la luno de la filino de Gidevan kunportas kun si la sorton dum la vivo. Tio eble estus vera, sed la Reĝo Renkiono estis sufiĉe skeptika pri tio. La bedaŭrinda Vedd vere estis malbenito. Iu elektita de la glavo por plenumi teruran destinon.

Pripensante la okazintaĵojn, ĉio ŝajnis al li granda koincido, kiu tute maleble okazus. Sed tiel same multaj aferoj ŝajnis neeblaj... Ĝis kiam ili okazis.

Ne plaĉis al la reĝo rigardi sin mem kiel ian marioneton movatan de l' fadenoj el la manoj de la dioj, sed en kelkaj momentoj li ne sukcesis alie pensi.

Li ekstaris kaj kun malfacilo iris al la fenestro. Ekstere sur la korto de la kastelo, en la mezo de belaj ĝardenoj estis la statuo kiun li starigis omaĝe al la olda Vedd. Antaŭ ol li tiun aprobis, li malakceptis tri modelojn, kiuj ŝajnis tro da forto, tro idealigitaj. Tiu pli-malpli fidele modlis lian figuron. Ordinara maljunulo, tenanta en la manoj ne la malbenitan glavon, sed arbaleston. Kian Renkiono vidis lin en la unua fojo, frontantan unu drakon sur la stratoj de Tedriso.

Estis oficialigita nova feria tago en Dera, en kiu oni celebrus memore al la olda Vedd.

La Festivalo de la Mortiganto de Drakoj.

Teatraĵo estis prezentata montrante la ĉefajn okazaĵojn dum lia vojirado. La Falo de Tedriso, la vojaĝo al Gin'uĵio, la periodo dum kiu li estis militkaptita de la norukoj, kiam li estis lancisto de la timeginda Patrino Gtu, la batalo de Ĵafo, lia kondamno kaj enkarcerigo kaj la venko super la multpova magiisto Le'Daman.

Renkiono ridetis. Post li, en la salono, troviĝis grandega pentraĵo, prezentanta lian propran portreton el lia junaĝo kaj tiujn de Eriana, Motokuo kaj de la oldulo. La grupo fiere pozis antaŭ mortinta drako. La urbo Tedriso en flamoj konsistigis la fonon.

Koncerne la malbenitan glavon, Renkion decide ĵetis ĝin en la fundon de la oceano, kune kun la falĉilo de Le'Daman. Li havis la esperon, ke iam en la estonteco ekregos erao de paco. Kaj tiajn armilojn neniam plu oni bezonos uzi.

Li enverŝis iom da vino en kalikon kaj ĝin levis.

– Al vi, Aveto Vedd!

Li tiam trinkis ĝian tutan enhavon, surmetis la maskon kaj eliris el la salono por plenumi sian tedan tagordon kiel suvereno de Dera.

FINO